VYTAUTAS GUDONIS

LA BLINDULO, KIU SURPRIZIS LA MONDON

Vasilij Eroŝenko

VYTAUTAS GUDONIS

LA BLINDULO, KIU SURPRIZIS LA MONDON

Vasilij Eroŝenko

Vasilij Eroŝenko
(aŭtoro N.Blaĵkov)

VYTAUTAS GUDONIS

LA BLINDULO, KIU SURPRIZIS LA MONDON

Vasilij Eroŝenko

2024, Šiauliai

ISBN 978-609-8167-97-9

Tiu ĉi libro estas eldonita kunlabore kun Litova-Esperanto Asocio

Sur la kovrilo estas bildo de Nakamura Tsune (中村彝, 1887–1924) *Portreto de s-ro Vasilij Eroŝenko*, 1920 (Tokia Muzeo de La Nuntempa Japana Arto, retaliro: https://gubkin.city/news/culture/9306/).

© Vytautas Gudonis, 2024
© Traduko al Esperanto de Gražina Opulskienė, 2024

La bibliografiaj informoj de la eldonaĵo haveblas en la Nacia Bibliografia Datenbanko (NBDB) de la Nacia Biblioteko Martynas Mažvydas de Litovio.

Mi dedîcas la libron al miaj edzino Ljudmila kaj filino Ljuda

ENHAVO

Libro pri homo, kiu surprizis la mondon	11
Enkonduko	14
La infanaĝo de Vasilij. Samvoje kun la blindaj almozuloj?	15
Esperanto kvazaŭ Aladina lampo	24
En Anglio: „Mi eksciis, ke *huligano* estas angla vorto“	30
Lando de la Leviĝanta Suno: la komenco de plensanga vivo	38
La humida pasero	44
La homaro estas unu familio	49
„Mi oferus unu jaron de mia vivo por ke mi ekvidu ĉi tiun portreton“	51
Amhistorio aŭ kvarangulo de amo	59
Socia aktivado kaj pasio por vojaĝoj	65
Disputo kun Rabindranath Tagore	72
Ĉinio: amikeco kun ĉina literatura klasikulo Lusin	75
En la iama Sovetunio: bloveto de gulago	83
En „Ĉukotka“ aŭ ĉevala salto	86
Propagandisto de Esperanto	89
Turkmenio: orfejo por blindaj infanoj	100
En la patrujo: fremdulo inter siaj homoj	106
Malfrua rekono de la verkaro	112
Esploroj de la biografio kaj de verkara heredo de Vasilij Eroŝenko	125
Blankaj makuloj en la biografio	132
Literaturo	148
Aldonaĵoj:	
Suplemento 1. Dokumentaj filmoj kaj televidprogramoj pri Vasilij Eroŝenko	162
Suplemento 2. Ekzemploj de la aŭtoraj libroj de Vasilij Eroŝenko kaj de libroj publikigitaj pri li	163
Pri la aŭtoro	172

Al profesorino habil. d-rino Marija Barkauskaitė, profesorino d-rino Renata Bilbokaitė, profesoro habil. d-ro Vytautas Bikulčius, Egidius Elijošius, akademiano Algirdas Gaižutis, doc. Renata Geležinienė, ĵurnalisto Ričardas Jakutis, profesoro Vaidotas Janulis, prezidanto de Litova Esperanta Asocio Povilas Jegorovas, profesorino habil. d-rino Palmira Jucevičienė, profesoro habil. d-ro Robertas Jucevičius, d-rino Margarita Jurevičienė, kolektanto Petras Kaminskas, doc. Irena Kaffemanienė, gvidanto de la bonfara fondaĵo „Espero“ de Vasilij Eroŝenko en Ukrainio, esperantisto Euĥen Kovtonjuk, profesoro dr. Romualdas Malinauskas, profesoro dr. Bronius Maskuliūnas, kolektanto, profesoro dr. Algirdas Mažuika, kulturologo Jonas Nekrašius, esperantistino tradukantino de tiu-ĉi libro Gražina Opulskienė, redaktorino de litovlingva versio Ligita Mikolaitienė, ukrainanino, esperantistino, tradukistino, membro de la internacia esplorgrupo „Vasilij Eroŝenko kaj lia epoko“ Julia Patlan, profesoro habil. dr., honora membro de urbo Šiauliai karmemora Vytenis Rimkus, redaktanto de tiu-ĉi libro en Esperanto, skota esperantisto Ed Robertson, esperantisto, honora membro de urbo Šiauliai Zenonas Sabalys, grafikistino, dezajnistino Vaiva Koveraitė-Trumpė, doc. Laima Tomėnienė, membro de la Kultura Komitato ĉe Sejmo de Litova Respubliko d-ro Stasys Tumėnas, Tadas Šerpetauskas, Frida Ŝifrisova, ĉefredaktoro de gazeto „Šiaulių kraštas“ Vladas Vertelis, profesoro d-ro Audronis Vilkas, profesoro, habil. dr., honora membro de urbo Šiauliai Kazimieras Župerka.

Al bibliotekoj, muzeoj, artgalerioj, posedantoj de la privataj kolektoj pro la ebleco uzi la materialon publikigitan en interneto, fotojn de reproduktaĵoj pri artaĵoj kaj aliaj objektoj de kultura heredo.

Dankoj

Al la familio

Mi esprimas mian dankemon al la familio – edzino Liudmila kaj filino Liuda pro ilia morala subteno kaj pro kreitaj favoraj laborkondiĉoj.

Fotoj el la persona arkivo de aŭtoro

Al kolegoj

Zenonas Sabalys (dekstre) kiu iniciatis ke tiu-ĉi libro estu tradukita kaj pubilikigita en Esperanto kaj kiu diversmaniere helpis al aŭtoro krei ĝin (foto de Petras Kaminskas)

Dr. Algirdas Mažuika (maldekstre) kiu riĉigis nian kolekton „Imago de blinduloj en belarto" kaj kiu helpis al aŭtoro krei ĉi-tiun libron (foto de Algirdas Mažuika)

Subtenantoj de la libro

- *UAB „SDG“ generalinis direktorius Eduardas Jasas*
- *Romas Cibas*
- *Rolandas Malaiška*
- *Povilas Jegorovas*
- *Zenonas Eimutis Sabalys*
- *Vytenis Povilas Andriukaitis*
- *Adomas Skiezgėlas*
- *Paulo Meliz*
- *Rožė Aukštikalnytė*
- *Virginija Gurskienė*
- *Arimantas Račkauskas*
- *Antanas Visockas*
- *Palmira Lukoševičienė*
- *Audronė Maksimaitenė*
- *Nijolė Žambaitė*
- *Sigita Barniškienė*
- *Vincentas Stanevičius*
- *Olga Ramenskaja*
- *Nijolė Stakėnienė*
- *Sergej Popov*

Libro pri homo, kiu surprizis la mondon

Profesoro Vytautas Gudonis, Kavaliro de la Ordeno de Ritera Kruco de Litovia Grandduko Gediminas – konata litova pedagogo kaj psikologo, aŭtoro kaj kunaŭtoro de ĉirkaŭ 900 sciencaj kaj publicistikaj artikoloj, 7 monografioj, 6 vortaroj eldonitaj en Litovio kaj eksterlando.

La aŭtoro de la prezentata libro bone konas la edukajn, psikologiajn kaj socialigajn problemojn de blinduloj. Dum siaj studoj, li akiris la profesiojn de speciala pedagogo kaj ortofonisto, kaj poste – de instruisto en elementaj klasoj en lernejoj por blinduloj. Li rekte komunikis kun blinduloj, ĉar post la fino de siaj studoj, li laboris en la tiama firmao de produktado kaj trejanado ĉe Litova Societo de Blinduloj en Šiauliai, kie li havis la postenojn de metodisto, fakestro pri produktado kaj ĉefinĝeniero por produktado-trejnado. Poste, en la jaro 1975, li forveturis al Ŝtata Pedagogia Instituto je la nomo A. Gertsen en Peterburgo por la trijaraj, ĉeestaj, postdiplomaj studoj kaj tie en 1979, li sukcese defendis sian doktoran tezon pri pedagogio „Lernomotivoj de blindaj plenkreskuloj kaj laborantaj junuloj". Surbaze de la disertacio, li publikigis sian unuan sciencan monografion en brajla skribo. Reveninte al Litovio, li eklaboris kiel sciencesplora kunlaboranto en la Pedagogia Instituto de Šiauliai, en la Speciala Pedagogia Esplorlaboratorio, financata de tiama Litova Societo de Blinduloj. En tiu laboratorio kunlaboris du blindaj sciencesploristoj. V. Gudonis kun siaj kolegoj analizis diversajn problemojn en edukado de blindaj kaj viddifektitaj infanoj, ilia profesia orientado, integrigo de blindaj plenkreskuloj en la socion. En 1995, en Moskvo, en la Esplorinstituto pri Korektanta Pedagogio li defendis sian memstare preparitan doktoran tezon „Socia, psikologia kaj pedagogia integrigo de blinduloj kaj viddifektitaj personoj". Surbaze de temo de la disertacio, estas publikigitaj sciencaj monografioj en Litovio kaj eksterlando. Laborante en la Universitato de Šiauliai, li helpis prepari instruistojn por laboro kun blindaj kaj viddifektitaj lernantoj.

Vytautas Gudonis havas grandan praktikan sperton pri laboro kun diversaĝaj blinduloj. La aŭtoro de la libro laboris en Šiauliai, en la tiama fako de la Kaunasa Lernejo por plenkreskaj blinduloj, li instruis al la blinduloj brajlon, donis psikologian helpon por infanoj de antaŭlerneja aĝo kun malbona vidkapablo en edukcentro de Petras Avižonis en urbo Šiauliai kaj en edukcentro „Linelis" en urbo Panevėžys, en urbo Klaipėda li kiel psikologo helpis al tiuj plenkreskuloj, kiuj subite perdis la vidkapablon pro traŭmato aŭ estis perdantaj vidkapablon pro diabeto aŭ pro aliaj malsanoj. Observante la evoluon de siaj lernantoj en la „Edukcentro de Petras Avižonis" en Šiauliai, la profesoro kreis dokumentan filmon „Irmutė – Irma", por kiu li dum pluraj jardekoj filmis blindan knabinon dum la diversaj aĝstadioj, montrante ŝian socian evoluon de tri ĝis tridek jaroj.

Strebante pli bone kompreni la psikologiajn kaj sociajn problemojn de blinduloj, la profesoro havis staĝon ĉe la Reĝa Nacia Instituto de Blinduloj en Londono (*The Royal National Institute of Blind People*), kie siatempe studis Vasilij Eroŝenko, en la lernejo por

blinduloj en Sheffield (Britio), en Ukrainio, en Odesa Esplorinstituto de Okulaj Malsanoj kaj Histoterapio je la nomo de akademiano V. Filatov ĉe Ukraina Akademio de Sciencoj kaj en aliaj institutoj, universitatoj, specialaj lernejoj kaj centroj por reabilitado de handikapuloj en Francio, Kanado, Usono, Pollando. Tial la problemoj de Vasilij Eroŝenko, kiu perdis la vidkapablon, estas proksimaj kaj kompreneblaj al la aŭtoro de ĉi tiu libro.

Ekde la aĝo de dek sep jaroj, Vytautas Gudonis kolektis reproduktaĵojn de artaĵoj pri la temo de blindeco kaj blinduloj. Tiun ĉi libron ornamas la ilustraĵoj el persona kolekto de la profesoro „Imago de blinduloj en belarto". La kolekton, konsistantan el pli ol 6000 reproduktaĵoj, li sukcese uzas por siaj libroj ilustrante la sociiĝon de blinduloj kaj la sintenojn de socio al ili. Analizante la rezultojn de siaj esploroj, la profesoro proponis noveman, interfakan koncepton pri la evoluo de la sociiĝo de blinduloj kaj pri la sinteno de la socio al blinduloj, rigardante tra la prismo de artaĵoj, kio aparte bone reflektiĝis en lia duvoluma monografio „Handikapo en socio kaj bildarto" (2020) kaj „Handikapo en socio, literaturo kaj en belarto." (2022). Tiu-ĉi duvoluma monografio ricevis pozitivan pritakson: laŭdaj recenzoj estis publikigitaj en revuoj „Santara", „Pedagogika", „Tiltai", „Metai", „Akademija" (Tartu, Estonio), reehoj aperis en la gazetoj „Mokslo Lietuva", „Respublika", „Šiaulių naujienos", „Šiaulių kraštas", „Tauragės žinios".

En sia recenzo de la monografio, profesorino habil. d-ro Palmira Jucevičienė notis ke „la esenca materialo de la monografio finiĝas per konkludoj, kiuj sendube povas esti rigarditaj kiel novaj sciencaj scioj, karakterizitaj per trajtoj de interfakeco kaj signifaj por sociaj kaj humanitaraj sciencoj, precipe antropologio, sociologio, psikologio, pedagogio, historio, kultursciencoj, artaj studoj. Domaĝe, ke nun eksterlandaj esploristoj kaj legantoj povas konatiĝi nur kun la resumo de la monografio (en la angla kaj en la rusa). Mi opinias, ke tiu ĉi monografio meritas vastan disvastigon pro sia scienca, kultura, kaj precipe pro humanisma valoro, tial estus konfirma celo traduki ĝin al angla lingvo. Tio estus unu plia paŝo informante la mondon pri la mondnivelaj sciencaj laboroj farataj en Litovio". En tiu ĉi libro Vytautas Gudonis, reagante al la antaŭe esprimita rimarko de profesorino Palmira Jucevičienė, prezentas al legantoj de la libro tekston en kelkaj lingvoj.

Tiu-ĉi nova libro de Vytautas Gudonis, kiel la aŭtoro mem asertas, ne pretendas esti la scienca studaĵo. Ĝia celo – prezenti al legantoj esperantiston, verkiston simboliston, instruiston de blinduloj, muzikiston, poligloton Vasilij Eroŝenko (1890–1952), por montri al publiko la eblecojn de blinda homo.

Por profesoro Vytautas Gudonis la biografia ĝenro ne estas nova. Jam en 2001, li kompilis kaj eldonis 599-paĝan „Vortaron de tifologiaj nomoj", en kiu li donis la nomojn kaj familiajn nomojn de 1 135 famaj blinduloj kaj iliajn kurtajn biografiojn. La temo de Vasilij Eroŝenko por la aŭtoro de la libro ankaŭ ne estas fremda. Ekde la jaro 1985, profesoro Vytautas Gudonis publikigis plurajn artikolojn aŭ libropartojn pri Vasilij Eroŝenko

en gazetoj, revuoj kaj en aliaj eldonaĵoj. En la jaro 2023 dek ĉaptiroj de tiu ĉi libro estis publikigitaj litovlingve en la gazeto „Šiaulių kraštas“ (vidu bibliografion).

En la publikaĵoj de diversaj aŭtoroj la informoj pri Vasilij Eroŝenko estas nesufiĉaj kaj refoje eĉ kontraŭdiraj. Pri tio la aŭtoro de tiu ĉi libro konvinkiĝis mem, kolektante la materialon pri Vasilij Eroŝenko. Tial la aŭtoro en la libro kelkfoje prezentas kelkajn versiojn de datoj aŭ faktoj. Tamen la tuto de la disponeblaj faktoj kompilas tiom fantazian vivrakonton de blinda homo, ke ĝin ne eblus elpensi.

Ĝis nun, la dosiero de Vasilij Eroŝenko, la persono ne fidinda laŭ la pritakso de tiutempa registaro, estas ensekretigita. La aŭtoro de la libro kredas, ke informoj, estantaj kaj iam publikigotaj en tiuj dokumentoj, helpos kompletigi kaj precizigi la biografion de la verkisto. Tamen la plej atendataj estas la esplorrezultoj de la esplorgrupo „Vasilij Eroŝenko kaj lia epoko“.

Legante la libron eblas kompreni, ke ĝi estis preparita de zorgema sciencisto, por kiu gravas ne nur doni novajn sciojn al la leganto, sed ankaŭ kun la helpo de ilustraĵoj precizigi aŭ krei por la vidpova leganto imagojn pri Brajla alfabeto, iloj por la skribado, blinda ŝako kaj aliaj kun blindeco ligitaj aferoj. La libron riĉigas la ilustraĵoj el la aŭtora kolekto de reproduktaĵoj prezentantaj blindulojn. Tiu ĉi libro de profesoro Vytautas Gudonis refoje malkovras la grandegan potencialon de blindaj homoj tial espereble ĝi helpos plibonigi, ŝanĝi la sintenon al handikapuloj ne nur en Litovio, sed ankaŭ en aliaj landoj.

Membro de la Komitato pri Kulturo en Sejmo de Litova Respubliko d-ro Stasys Tumėnas.

Enkonduko

Unu el la unuaj, kiuj eksciis pri Vasilij Eroŝenko, estis la ĵurnalisto kaj ĉinologo Vladimir Rogov (*Рогов Владимир Николаевич*, 1906–1988), kiu en 1939 laboris en Ĉinio kaj studis la verkojn de la verkisto, ĉina klasikulo Lusin. Nome Vladimir Rogov en „Historio de la anasoj" de Lusin trovis menciitan ruson Ailosianke. En Japanio Vladimir Rogov, renkontinte la japanan verkiston Akita Ujaku, membrojn de la familio de Kokkō Sōma, ĵurnaliston Fukuoka Seiti, kiuj konis tiun homon, komprenis, ke Vasilij Eroŝenko estas pli konata en Japanio ol en Rusio. Kvankam la nomo de Vasilij Eroŝenko estas enkluzivita en japana kaj esperanta enciklopedioj, li estas apenaŭ konata ankaŭ en Amerika kontinento. La usona aŭtoro en la libro pri la famaj blinduloj en iama Soveta Unio mencias nur du tiajn homojn: sciencistinon doktorinon Olga Skorochodova (*Ольга Ивановна Скороходова*, 1911–1982), kiu same kiel usonanino Helen Keller (*Helen Adams Keller,* 1880–1968) estis blinda kaj muta kaj verkiston Nikolaj Ostrovskij (*Николай Алексеевич Островский*, 1904–1936)

En patrujo nur malmultaj homoj aŭdis la nomon de Vasilij Eroŝenko. Oni supozas, ke tion kaŭzis eksterordinaraj liaj streboj kaj multflankeco de liaj interesoj, kiuj dum multaj jaroj kontraŭis al deklarataj oficialaj konceptoj. La formadon de la mondkoncepto de Vasilij Eroŝenko influis aktiva partopreno en la esperantista movado, la verkoj de Lev Tolstoj (*Лев Николаевич Толстой*, 1828–1910), Piotr Kropotkin (*Пётр Алексеевич Кропоткин*, 1842–1921), studoj pri bahaismo, budhismo kaj la tradicioj de Orientaj landoj. Estas ankaŭ alia kialo de forgeso pri la verkisto: ripeta kaj intenca detruo de liaj arkivoj kaj dum lia vivo, kaj post lia morto. La unuaj studoj de lia vivo kaj verkado en iama Sovetunio komenciĝis nur post kvin jaroj ekde lia forpaso. Plia kialo de tiu forgeso estas por esploristoj neeviteble aperantaj lingvaj baroj kiujn Vasilij Eroŝenko en sia vivo tiel facile venkis. Liaj tekstoj estas verkitaj en Esperanto kaj japana lingvoj kaj kelkaj estis tradukitaj al la ĉina. En lia patrujo ĝis nun ne estas publikigita kompleta kolekto de liaj verkoj. (*Патлань*, 2003).

Kiu en la unua duono de la XX jarcento povis kredi, ke blindulo povas loĝi kaj studi en Moskvo, Londono, Tokio, Parizo, Leipzigo, sola vojaĝi tra Hindujo, Birmo, Japanio, Ĉinio, Tailando, kaj poste tra Turkmenio kaj, laŭ liaj propraj vortoj, vidi la mondon?

Strange, sed pri Vasilij Eroŝenko, blinda esperantisto, vojaĝanto kaj verkisto, liaj samlandanoj eksciis de la japanoj kaj ĉinoj. Estas strange ankaŭ pro tio, ke el siaj 63 vivojaroj li pasigis ĉirkaŭ dek jarojn en Orientaj landoj. Li diskutis kun Rabindranath Tagore, amikiĝis kun la ĉina verkisto Lusin, loĝis en ties domo, kaj instruis en la universitatoj de Pekino kaj Tokio.

Vasilij Eroŝenko ne estis rekonita pro diversaj kialoj: povis havi la influon ankaŭ liaj politikaj konvinkoj – li estis konsiderata anarkiisto, bahaano – adepto de la islama religia gvidanto Baha'u'llah, li subtenis la kosmopolitismon de Ludoviko Zamenhof, juda kuracisto el Pollando kaj ankaŭ propagandis de tiu kreitan la internacian lingvon Esperanto.

Aŭtoro petas pardonon pro eblaj malprecize skribitaj familiaj nomoj.

N. Malinka. La lumo de la animo (foto el persona arkivo de la aŭtoro)

La infanaĝo de Vasilij. Samvoje kun la blindaj almozuloj?

Vasilij Eroŝenko venis en tiun ĉi mondon dum la Silvestro – la 31-an de decembro 1890 (laŭ malnovstila kalendaro) en la familio de riĉaj kamparanoj, elmigrintoj el Ukrainio Jakov (1866–1942 (1948?) kaj Jevdokia (*Семыкина*, 1866–1942 (1948?)) en vilaĝo Obuĥovka, Kurska provinco, ne malproksime de antikva urbo de Rusio Staryj Oskol. En la familio naskigis:

Neonila (02-10-1887–1972),
Alexander (31-11-1888–02-11-1942),
Vasilij (31-12-1889–24-12-1952),
Supozeble Ekaterina (1890?–1896?),
Pelagea (20-09-1891–24-02-1947),
Stefano (02-08-1893–?),
Maria (23-02-1897–13-09-1979),
Ana (23-06-1898–16-10-1900),
Boris 1899?–12-10-1901),
Ivan (23-02-1901–?),
Antonina (04-08-1902–1980 aŭ pli poste),
Jelisaveta (23-04-1906–22-05-1906) (Patlan, 2015a).

La patro de la estonta verkisto luis parcelon de grafo Aleksej Orlov-Davydov (*Алексе́й Анато́льевич Орло́в-Давы́дов,* 1871–1935) kaj komercis per ligno. La loĝantino de la vilaĝo Obuĥovka F. Soldatova, memoras, ke „lia patro Jakov Eroŝenko estis eta komercisto, li havis ĉirkaŭ 200–300 hektarojn da arbaro de Bondarevsky kaj butikon. Li luis ne nur la teron, sed ankaŭ la fruktĝardenojn. Jakov Eroŝenko estis afabla kaj simpatia homo. Li respektis malriĉulojn kaj helpis ilin. Nia familio vivis en mizero. Li ofte helpis nin, li bone pagis mian patron pro la ĉarpentistaj laboroj" (El la memuaroj de *F. Soldatova*, Obuĥovka, 1972, retaliro: http://eroshenko.org.ru/eroshenko-glazami-ego-sovremennikov).

Kiel multaj tiamaj dikredantoj, la patro de Vasilij akceptis la blindecon de sia infano kiel punon de Dio: „Kaj la unua abismo en lia bone ordigita vivo estis la neatendita

La gepatroj de Vasilij – Jevdokia Vasilijevna (Siomykina) kaj Jakov Vasilevič Eroŝenko, 1939 (foto el la persona arkivo de B. Osykov, retaliro: http://www.Belgorodbiblioteka.ru/Files/foto.html)

blindeco de lia fileto. Sciante kiel resti trankvila en momentoj de ĝojo kaj malĝojo, la patro, kiam ne plu estis dubo pri la definitiva malfeliĉo, kiu trafis lin, ne unu nokton, kliniĝante antaŭ la ikonoj, provis ne peti senkulpigon pro sia kulpo antaŭ la Sinjoro Dio, sed ekscii, <...> pro kio li estas kulpa, pro kio li estas punita..." (citita laŭ *Поляковский*, 2000). Ĉi tie iĝas klara la koncepto, kiu restas en la konscio de kelkaj dikredantoj ĝis nun, ke blindeco de infanoj estas puno de Dio.

Pri la kialoj de la blindeco de Vasilij Eroŝenko oni parolas diversmaniere. Laŭ unu el fontoj, estante kvarjarulo li ricevis morbilon, sed la gepatroj ne vokis kuracistojn. Pia onklino, sekrete de liaj gepatroj, en ekstrema malvarmo portis la malgrandan Vasilĉjon al la preĝejo, kie oni ŝprucis lin per sankta akvo. Poste, dum la sama veteraĉo, la onklino kun infano revenis hejmen. Al la morbilo aldoniĝis ankaŭ pneŭmonio. La malsano komplikiĝis, la infano blindiĝis. En la memoro de Vasilij por la tuta vivo restis kvar imagoj: la blua ĉielo, kolomboj, la vilaĝa preĝejo kaj la vizaĝo de lia patrino.

Poste Vasilij Eroŝenko rakontis, ke komence li estis kiel lupido enpelita en angulon. Li kaŝis sin for de homoj en la plej malproksiman angulon de la ĉambro, pro la plej eta kialo bruske parolis kaj dum tagoj ploris. En laborema kaj amika familio, la knabo estis bone prizorgata kaj se estis ebleco, eĉ dorlotita. Gepatroj kaj gefratoj helpis al Vasilij kiom ili povis.

Fari la unuajn paŝojn al infano helpis lia patrino: ŝi kondukis sian filon al la mezo de la ĉambro, de kie li devis memstare atingi sian angulon. Poste ŝi ankaŭ kuniris kun li en la korton. Tiel Vasilij akiris la unuajn kapablojn kiel orientiĝi en la spaco. Baldaŭ la infano lernis orientiĝi en la vilaĝo, arbaro, kampoj ne pli malbone ol en la domo de siaj gepatroj. Liaj gepatroj, rimarkinte la bonan aŭdokapablon de Vasilij, instruis lin ludi per gitaro kaj violono, poste ankaŭ ludi per piano.

La familio de Eroŝenko (retaliro: www.belgorodbiblioteka.ru/Files/foto.html)

La familio de Eroŝenko (retaliro: http://www.belgorodbiblioteka.ru/Files/foto.html)

En la vilaĝo Obuĥovka, kie inter la ĉerizĝardenoj pace kunvivis blankaj ukrainaj kabanoj kun malhelaj rusaj ŝtipdometoj, homoj rapide alkutimiĝis al la juna blindulo kaj ĉesis miri, ke li promenadis sen bastono. Lia patrino instruis al li kiel uzi fajron kaj mastrumi. Ŝiaj mildaj, sed decidemaj agoj destinis, ke Vasilij dum la tuta vivo havis la memfidon pri sia orientiĝo en la spaco. Aspektas, ke li uzis ĉiujn eblecojn por blinduloj naviĝi en la spaco: determinon de la distanco surbaze de muskola laceco, eĥon de sono, ŝanĝojn de temperaturo, la sunon. Patrino, instruante lin orientiĝi en la spaco enradikigis ankaŭ la konfidon je siaj propraj fortoj kaj konstruis la bazon de sendependeco.

La blinda knabo obstine lernis la irmanieron de vidanto, sed la iamaj kunludantaj amikoj timis eĉ alproksimiĝi. La vilaĝanoj nomis la knabon: „Obskura“ (*Темный*). Kompreneble, neniu volis vundi lin intence, sed infano estis ignorata.

La perspektivo de la vivo ankaŭ ne estis alloga. Fine de la 19-a jarcento, blinduloj en vilaĝoj de Rusio aŭ Ukrainio povis aliĝi al almozpetantaj aŭ vojaĝantaj blindaj kobzaroj. Ekzistis neniu alia vivopcio en tiu tempo (*Мурашковска, Мурашковский*, 1986–1987). Bulgara etnografino Katia Michailova difinas, ke de la mezepoko ĝis la 30–40-jaroj de la 20-a jarcento blinda vojaĝanta muzikisto estis konata en multaj landoj. Rusoj nomis tiajn homojn blindaj almozuloj (*слепые нищие*), ukrainoj – kobzaroj, gurdistoj, bandonistoj, (*кобзарі, лірники, бандуристи*), belorusoj – maljunuloj (*старци*), poloj – maljunuloj (*дзяды*), slovakoj – almozuloj (*žobracy*), serboj – blindaj guzlistoj (*слепи гуслари*), bulgaroj – blindaj ŝalmludantoj (*слепи гъдулаи*), makedonoj – almozuloj (*питачи*) (*Михайлова*, 2004). Ne malofte en Rusio kaj Ukrainio, naskitan blindan infanon kontraŭ la certa pago oni fordonis al blinda gurdisto por ke tiu instruu lin muzikon. (*Боржковский*, 1889). Estas informoj **ke infanojn oni eĉ blindigis por ke ili iĝu muzikistoj-almozuloj. La guculoj de Galicio tradicie transdonis tiun „profesion“ de generacio al generacio, speciale tiucele blindigante sian plej aĝan filon** (*Василевский*, 1900)**. Komence de la 20-a jarcento en Bulgario, malriĉa patrino ne malofte blindigis kaj vendis unu el siaj infanoj al blindaj almozuloj, ke tiameniere ŝi povus nutri la familion.** (*Каравелов*, 1930). Similaj kazoj estas ankaŭ konataj en serbaj regionoj. (*Murko*, 1951; *Михайлова*, 2004). Tio ankaŭ reflektiĝas en la folkloro de tiuj landoj:

Выколю твои черные очи,	Mi elpikos viajn nigrajn okulojn.
Дам тебе гусли яворовые,	Mi donos al vi gudron belsonan
И пойдешь ты от города к городу...	Kaj vi iros de urbo al urbo...

(Matiħ, 1964, p.)

Ĉar la familio de Vasilij Eroŝenko estis bonhava, lin ne minacis la sorto de vaganta muzikisto. Kaj kantadon de blindaj kobzaroj, same kiel ukraina poeto, pentristo Taras Ŝevĉenko (*Тарас Григорьевич Шевченко*, 1814–1861), la eta Vasilij estis aŭdinta, kiam lia patro veturigis lin al foiroj, okazintaj en urbo Stary Oskol.

M. Deregus. Etulo Taras (Ŝevĉenko) aŭskultas la kobzaron (foto el la persona arkivo de la aŭtoro)

G. Toma. Lernejo de blindaj punto-trikistinoj (foto el la persona arkivo de la aŭtoro)

Rimarkinte la esceptan muzikan aŭdadon de la knabo, liaj gepatroj aĉetis la pianon kaj hejme instruis al li muzikon. Bienmastro grafo Aleksej Orlov-Davydov, de kiu la patro de Vasilij luis la parcelojn, prizorgis, ke estante la naŭjara, knabo komencu studi. La patro jam delonge pensis kiel eduki sian filon. Blinda homo en Rusio ne havis multe da elekto: aŭ al rifuĝejo de blinduloj (kien ne estis facile eniri), aŭ al blindullernejo kiuj en la lando estis nur kelkaj: en 1806 fondita de la franco Valentin Haüy (1745–1822) en Peterburgo – por nobeluloj kaj en Moskvo funkcianta lernejo, destinita por ordinaraj homoj (*Харьковский*, 1978).

La 15an de julio 1899 Vasilij Eroŝenko estis akceptita en edukan institucion, kiun kuratoris la Moskva Bonfara kaj Eduka Societo por Blindaj Infanoj kaj protektadis la imperiestrino Maria Feodorovna. Tiun ĉi edukan institucion por blinduloj en 1882 fondis la luterana pastro Heinrich von Dieckhoff (1833–1911). La eduka institucio, kie Vasilij studis en 1899–1908, situis sur la Dua Meshchanskaja strato en Moskvo,.

La knabo el la vilaĝo trovis sin en la mondo de infanaj kazernoj. Grandega konstruaĵo de lernejo, hermetika barilo, malgranda korto, de infanoj nomata – la pato. Ĉi tie estis permesite promeni nur unu horon dum la tago, aparte knabinoj, aparte knaboj. Tage kaj nokte la vipilo de la lerneja direktoro, rezerva artileria kolonelo A. Witte, fajfis super la kapoj de la infanoj – ili estis senkompate punataj pro la plej eta malobeo (*Харьковский*, 1978). **En la artikolo „Blinduloj“ de la enciklopedia vortaro de Brockhaus kaj Jefron, oni notas, ke post la foriro de la fondinto de tiu eduka institucio Valentin-Haüy, laŭ la peto de la nova direktoro M. Pileckis** (*Мартын Степанович Пилецкий-Урбанович* 1780–1859) **en 1824 fizikaj estis enkondukitaj**



Tabelo por skribi brajle

Skribiloj por brajla skribo (fotoj de neidentigita fotisto)

punoj kiel rimedo por moderigi malobeemajn blindajn lernantojn. Ŝajnas, tiun ĉi „pedagogian" sperton de la eduka institucio en Sankt Paterburgo oni transprenis ankaŭ por blinduloj de analoga institucio en Moskvo.

Ĝi estis stranga eduka institucio, apartigita de la cetera mondo. Al lernantoj oni ne permesis forlasi la lernejan teritorion post lecionoj, ne eblis reveni dum la ferioj al sia hejmo. (*Пашнев*, 1971).

La eduka institucio estis financata per la donacoj de komercistoj, kaj en la jarraportoj, unue oni notis kiom multe kiu el la komercistoj donacis. El 24 horoj destinitaj por instruado, 4 estis por la studado de Dia leĝo. Estas pozitive aprezenda la fakto, ke en ĉi tiu eduka institucio oni multe atentis pri estetika edukado. Krom la tradiciaj instruaj fakoj la infanoj lernis preĝejan kantadon en malgranda lerneja preĝejo. Oni instruis ankaŭ la laikan kantadon. La artistoj de la imperiaj teatroj instruis infanojn ludi per diversaj muzikinstrumentoj. En la komenco, la lernejan orkestron, kiu poste fariĝis profesia blindulorkestro, senpage gvidis A. Jeromolov kaj F. Šving. La pli kapablaj lernantoj de la superaj klasoj estis invitataj por kanti en tiutempe pli kaj pli fama preĝeja koruso. La fama tiama aktoro kaj reĝisoro, Konstantin Stanislavskij (*Константин Сергеевич Станилавский*, 1863–1938), kiu aŭdis la blindulan koruson en la kolona halo de la Asembleo de Nobeloj, estis tiel impresita, ke li permesis al ĉiuj blinduloj en Moskvo senpage viziti teatrajn prezentadojn. Tiutempe en la repertuaro de la Moskva Arta Akademia Teatro estis „Tri fratinoj", „La Blua Birdino" de A. Ĉeĥov, „Malĝojo pro saĝo" de A. Gribojedov, „En la Fundo" de F. Dostojevskij kaj aliaj teatraĵoj (*Поляковский*, 2002). Ankaŭ en la lernejo estis fondita kordinstrumenta kaj blovinstrumenta orkestro, kies muzikistoj koncertis sur eksteraj urbaj scenejoj dum la somero, kaj en restoracioj dum la vintro.

Tiun ĉi profesian koruson gvidis la artisto de la Imperiestra Teatro J. Sorokin. Li ankaŭ instruis al blinduloj konservatorian kurson pri historio kaj teorio de muziko laŭ la lernolibro de N. Rimskij-Korsakov – tio pruvas la bonan nivelon de muzika instruado. Post trapaso de la unuanivelaj ekzamenoj de kvar klasoj, la infanoj ricevis la statuson de pli altrangaj lernantoj kun ebleco memstare elekti la metion. La elekto ne estis abunda: por knaboj – la metio de produktantoj de brosoj aŭ plektado el vimenvergoj, por knabinoj – trikado aŭ brodado (*Патлань*, 2020a).

Lernante en tiu eduka institucio Vasilij Eroŝenko studis la anglan kun helpo de pli aĝaj progresantaj lernantoj. Ĉi-tie li konatiĝis kun la reliefa sespunkta Brajla alfabeto, kiun kreis la blinda franca pedagogo, orgenisto Louis Braille (1809–1852). Louis Braille perdis sian vidkapablon en la aĝo de tri jaroj post kiam en la metiejo de sia patro li vundis sian okulon per aleno. Louis studis en la Pariza Instituto por Blinduloj (tiel estis tiutempe nomitaj blindulaj lernejoj en Eŭropo). En 1821, la instruejon vizitis iama militisto Charles Barbier, kiu demonstris sian inventon de la jaro 1815 – noktan skribon (ecriture nosturne). Ĝi estis kodo de 12 elstaraj punktoj, kiuj permesis al soldatoj disdividi sekretegajn informojn pri la progreso de la batalo sen parolado. Bedaŭrinde, ĉi tiu kodo estis tro komplika por soldatoj, sed ne por dekdujara Louis, kiu lasis ses punktojn el dek du. En 1829, L. Braille publikigis la unuan libron kun tiu ĉi skribo (retaliro: https://louisbraillebio.weebly.com/biography.html). L. Braille, kreante la punktan reliefan skribon, kun iom da perfektigo adaptis la skribilaron inventitan de Charlie Barbeu.

La densa, punktita papero parolis, sonis al Vasilij per la voĉoj de la herooj el fabeloj de Puŝkin, el poemoj de Nekrasov kaj Ŝevĉenko. Nokte, kiam en la lernejo estis silente, li prenis libron, kaj tuŝante la punktojn per la fingroj, legis, legis. Kiam ĉiuj brajlaj libroj en la biblioteko estis legitaj, Vasilij kreis en sia menso proprajn versiojn de ili, kaj poste komencis ilin noti. Tiel aperis la unuaj noveloj. En la lernejo Vasilij havis la kromnomon „Jerolei“ (*Панков*, 2017)

Vasilij havis ne nur bonan aŭdkapablon, sed ankaŭ la belegan voĉon. Li kantis en la lerneja koruso, insistante akiris la rajton ĉeesti la klason de piano, kvankam en tiu tempo nur knabinoj estis instruataj ludi per tiu instrumento. Li ellernis ludi violonon kaj gitaron. Instruistoj antaŭdiris al li karieron de muzikisto.

En la eseo „Paĝoj de mia lerneja vivo“, li elvokive priskribis la viziton de la ĉina diplomato Li-Chun Zhang (1823–1901) al la lernejo. Vasilij Eroŝenko rememoris, ke verŝajne la instruistoj diris al la blindaj infanoj, ke la blanka raso estas pli supera kaj ĉiuj aliaj pli malvaloraj, sed sinjoro Li, kvankam apartenis al la „malsupera“ raso, afable permesis al la infanoj tuŝi liajn vestaĵojn, eĉ la harplektaĵon sur la kapo. Al la infanoj, lia konduto aspektis pli afabla ol tiu de la bruska lerneja gardisto, kiu apartenis al la „supera raso“. Eble tiu ĉi unua renkontiĝo kun la ĉino vekis la intereson de juna Vasilij pri la Orientaj landoj, ilia kulturo.

La konstruaĵo de la Moskva Societo por protektado, edukado kaj instruado de blindaj infanoj, kie Vasilij Eroŝenko lernis en 1908 (foto el „Verkisto kaj publicisto V. J. Eroŝenko", kompilis A. I. Sizova, 1990)

Preĝejo de Adriano kaj Natalia en Moskvo, kie kantis koruso de blindaj lernantoj (foto el la libro „Verkisto kaj publicisto V. J. Eroŝenko". kompilis A. I. Sizova, 1990)

En 1908, la 15-an de majo, post la trapaso de la finaj ekzamenoj, Vasilij Eroŝenko akiris la elementan kvarklasan kaj bazan muzikan edukon, ankaŭ havis la bazajn sciojn pri la produktado de brosoj kaj korboj. Krom tio li ellernis legi kaj skribi per brajlo, bindi librojn, glui skatolojn, ludi per gitaro, balalajko, ludi per violono, kaj havis la bazon de ludado per piano. La malkovritaj kapabloj por muziko poste estis tre utilaj por li.

Gajninte la konkurson, Vasilij Eroŝenko estis akceptita al la Moskva Simfonia Orkestro de Blinduloj kiel la dua violonisto. Protektantoj helpis al Vasilij trovi lokon por loĝi. Li estis loĝigita en la fama kaj malmultekosta multloĝeja domo de Salodovnikov en Moskvo, en la parto por solecaj loĝantoj. La restoracio „Jakor“ („Ankro“), kie la orkestro ludis dum vesperoj, estis tute proksime, tial Vasilij plej ofte piediris al laboro kaj reen (*Патлань*, 2012c). Blindaj muzikistoj ludis en du salonoj de tiu ĉi restoracio kaj ilia repertuaro konsistis el preskaŭ kvincent muzikpecoj (*Панков*, 2017).

Sur la fasado kun speciala ariktekturo de la lerneja konstruaĵo, kiu konserviĝis (nun, estas V. Giliarovski strato, n-ro. 6), oni metis la memortabulon kun la nomo de la verkisto Vasilij Eroŝenko.

Esperanto kvazaŭ Aladina lampo

Printempe de 1908, sur la scenejo de la restoracio „Jakor", kiu estis en la placo Suĥarevskaja, ĉiun vesperon aperadis alta junulo. Trista rideto lumigis mildan, eĉ iomete inan vizaĝon. Li skuis malantaŭen siajn ondantajn, linkolorajn harojn, kiuj falis sur liajn ŝultrojn kaj ekkantis. Plej ofte vizitantoj mendis „ciganajn" kantojn, por kiuj bone pagis. Veterano de la orkestro M. Velikanov poste multfoje memoris tre strangan muzikiston, kiu ne trinkis alkoholaĵojn, ne fumis, ne interesiĝis pri junulinoj kaj manĝis sekajn panpecetojn. „Ho, kiel ni incitis Vasjan, – skribis li, – ni eĉ nomis lin monaĥo. Tiu silentante aŭskultis, ridetis, obstine klinis la kapon kaj daŭre kondutis same. Li estis specife malĝoja" (citita laŭ *Мурашковска, Мурашковский*, 1986–1987).

Tiel komenciĝis la sufiĉe monotona, enuiga vivo de blinda restoracia muzikistoVasilij Eroŝenko. Frumatene Vasilij revenadis al sia Moskva multloĝeja domo por blinduloj sur la strato Meŝĉanskaja, kie en malgranda ĉambro estis lia kuŝloko. Ofte la perlaboritan monon li donis al senlabora aktoro, kiu rekompense laŭtlegis la verkojn de Puŝkin, Andersen, Ŝekspiro. Kaj vespere – denove estis la restoracia fumo, sufoka aero, babiladoj de ebriuloj. „Kiom da fojoj mi volis endormiĝi kaj neniam vekiĝi" (citita laŭ *Харьковский*, 1978, p. 35) – tiel poste ĉi tiun periodon rememoris la verkisto Vasilij Eroŝenko.

La samtempuloj rememoris lin tia: iom naiva, preskaŭ infana esprimo sur la vizaĝo, ondiĝantaj linaj harfasketoj, longa ĉemizo portita super la pantalono, larĝa zono kun buko, la kapo ĉiam iomete klinita dekstren – tuta lia aspekto estis penetrita de iu arta digno. Precipe bela estis lia silenta voĉo, kiu atestis pri la pasia kaj revema naturo. Sur la vizaĝo – trista rideto, kiun poste klasikulo de ĉina literaturo, Lusin, nomos „rideto de sufero". Laŭ A. Poliakovskij, Vasilij apartenis al la speciala grupo de blinduloj, ĉar li havis la vivspertojn kaj sciojn akiritajn dum longaj jaroj da vagado, kiuj tiam apenaŭ estis alireblaj por blinduloj. La bastoneto de blindulo – sentema etendaĵo de lia korpo kaj nervoj, ne multe pli malbona ol mindetektila sondilo, avertanta ĝian posedanton esti konstante atentema. La sento de memprotekto malofte perfidis Vasilij Eroŝenko (*Поляковский*, 2000).

La vivo kunigis la talentan junulon Vasilij Eroŝenko kun la tradukistino, esperantistino Ana Nikolajevna Ŝarapova (1863–1923) Estis ŝi, kiu rakontis al Vasilij pri la artefarita ingvo de internacia komunikado – Esperanto, kiun en 1887 kreis pola okulkuracisto de juda deveno – Ludoviko Lazaro Zamenhof, rakontis pri la Peterburga societo de esperantistoj, kies membro estis ankaŭ la verkisto Lev Tolstoj. Ana Ŝarapova esperantigis kelkajn verkojn de Lev Tolstoj. Energia esperantistino pri tiu lingvo ekinteresigis verkiston Lev Tolstoj kiu same kiel Vasilij Eroŝenko ellernis ĝin dum du monatoj (*Панков*, 2017). Ne ekzistis en tiu tempo fremdlingvaj instrulibroj por blinduloj. Instrui Esperanton por Vasilij al Ana Ŝarapova helpis ŝia dekkvinjara nevo (*Ауербах*, 1961).

Oni asertas ke Esperanto havas du gravajn trajtojn: ĝi estas facile lernebla pro sia simpla gramatiko kaj foresto de esceptoj en la reguloj kaj ĝi estas absolute neŭtrala, t. e. ne estas ligita kun iu ajn ŝtato aŭ nacio.

Ludoviko Lazar Zamenhof (*Ludwik Lejzer Zamenhof, 1859–1917*, 1859–1917), naskiĝis en Bjalistoko (Pollando tiam ankoraŭ estis parto de Rusia Imperio), en familio de instruisto pri fremdaj lingvoj. En gimnazio li diligente studis fremdajn lingvojn. Post la fino de medicinaj studoj en Moskvo kaj Varsovio, en 1885 Ludoviko venis al sia bofrato en Litovio, en Veisiejai. Tie L. L. Zamenhof praktikis kiel kuracisto kaj restarigis la manuskripton pri Esperanto.

En Litovio la nomo de la plej fama litvako Liudoviko Zamenhof estas taŭge eternigita. En Veisiejai pro li estas starigitaj du monumentoj, stratoj je lia nomo estas en Veisiejai, Kaunas kaj Vilno. En Kazlų Rūda estas Esperanto strato. Litovlingve pri tiu-ĉi granda humanisto estas eldonitaj multaj biografiaj libroj (Jegorovas, 2019)

Anna Ŝarapova (1863–1923) – aktiva propagandistino de Esperanto (foto el libro „Verkisto kaj publicisto V. J. Eroŝenko“, kompilis A. I. Sizova, 1990)

Tial litovoj nomas Veisiejai la naskiĝloko de Esperanto, kie en 1998, en la grandbiena parko, estis starigita busto dediĉita al L. L. Zamenhof, kreita de la litova skulptisto Julius Narušis. Omaĝe al la memoro de L. L. Zamenhof kun lia bildo estis eldonitaj memormedaloj, simbolaj monbiletoj, poŝtmarkoj. Ekzistas informoj, ke L. L. Zamenhof ĉiujare eldonadis adreslibrojn de esperantistoj „Adresario“ (*Bernhard Struc*, 2021).

Sekve, Ana Ŝarapova instigis la estontan verkiston Vasilij Eroŝenko ĉeesti Esperanto-lingvan kurson. Lerni ne estis facile, sed post kelkaj monatoj la junulo ekparolis Esperanton. Ĉu tion rezultigis la facileco en lernado de Esperanto aŭ la eksterordinaraj lingvaj kapabloj de la blinda junulo? En ĉiu kazo jam en 1911, Vasilij Eroŝenko vizitadis la Moskvan Esperanto-klubon, kie li rapide adaptiĝis kaj sentis sin kvazaŭ hejme. En tiu ĉi klubo kunvenadis pentristoj, verkistoj, poetoj oftaj gastoj estis ankaŭ eksterlandanoj.

Esperanto ampleksigis la rondon de konatoj ĉe Vasilij, kio estis tre utila por li poste, en liaj vojaĝoj. Pri tio Vasilij Eroŝenko skribis: „Mi vere povas diri, ke la lampo de Aladino ne povus helpi min pli ol la verda steleto – la simbolo de Esperanto. Mi estas certa: neniu ĝino el arabaj fabeloj povus helpi min pli ol geniulo Zamenhof, kreinto de Esperanto“ (citita laŭ *Харьковский*, 1978, p. 37). En Rusio Esperanto estis malsame taksata dum diversaj tempoj. En la antaŭrevolucia Rusio, esperantistoj disdonis lernolibrojn de

Memorŝtono en Veisiejai (Litovio) sur kiu estas skribite en Esperanto (foto de Litova Esperanto – Asocio)

Busto de la kreinto de Esperanto, Ludoviko Lazaro Zamenhof, en la parko de la grandbieno en Veisiejai (retaliro: https://tyt.lt/picture/33045/category/2150-veisieju-dvaro-parkas-2019-vasara)

tiu ĉi lingvo eĉ en malliberejoj kaj lokoj de ekzilo. Estas menciitaj informoj, ke iam Stalin, estante en ekzilo, volis lerni Esperanton (unu el politikaj ekzilitoj alportis lernolibron), sed rapide rezignis pri tiu ideo. La 1-an de majo 1917 en Moskvo okazis manifestacio de esperantistoj sub ruĝa flago, sur kiu en blanka kvadrato estis pentrita kvinpinta verda stelo kaj slogano „Proletoj de ĉiuj landoj, unuiĝu!" La organizantoj kredis, ke la internacia lingvo Esperanto fortigos la internacian unuecon. Similaj manifestacioj de esperantistoj okazis ankaŭ en Petrogrado, aliaj rusaj urboj. En 1917, en Petrogrado, dum la kunveno en Cirko Cinizelli, esperantistino Kalinina enmanigis la lernolibrojn de Esperanto al la socialisto ministro Aleksandr Kerenskij, al sinjoroj Grigorij Zinovjev, Isaak Livŝits kaj al aliaj membroj de la tiama Konsilio de Laboristaj kaj Soldataj Deputitoj (*Сидоров*, 2012) (retaliro: http://historio.ru/antaurev-movado-ru.php).

Oni povas supozi, ke Esperanto poste helpis al Vasilij Eroŝenko lerni ankaŭ aliajn lingvojn. Al junulo ellerni lingvojn helpis la instigo progresi kaj karakteriza por multaj blinduloj, bonega memoro. Restis la informoj ke en Japanio la memoro de lernantoj estis speciale disvolvata en edukaj institucioj por blinduloj. Ne ricevante vidajn informojn, blinduloj estas devigataj rememori pli multe, kaj tio ankaŭ disvolvas la memoron. La aŭtoro de la libro havis ŝancon fari sciencan esplorlaboron kun blindaj kolegoj. Tiam oni ne devis ĝeniĝi serĉante la ĝustan telefonnumeron: se blindaj kolegoj iam vokis tiun numeron, ili tuj diris ĝin senerare. Verŝajne, la bona memoro helpis al Vasilij Eroŝenko fariĝi ankaŭ bona ŝakludanto. Iuj blinduloj kapablas unu kun alia ludi tiun ludon eĉ sen ŝaktabulo.

Memormedaloj kaj moneroj kun la bildo de L. L. Zamenhof

Poŝtmarkoj kaj bareliefo de N. Blazkov kun la bildo de L. L Zamenhof (fotoj de neidentigitaj fotistoj)

Tiutempe la junulo komencis ŝpari monon por sia unua vojaĝo eksterlanden. En la jaro 1911 la estonta verkisto kaj vojaĝanto veturis kun orkestro al Kaŭkazo. Oni ne scias, kiajn lokojn li vizitis tie, kiuj aŭskultis liajn tristajn kantojn, sed Vasilij al la vojaĝo kunportis la lernolibron de Esperanto kaj studis ĉi tiun lingvon dum ĉiu libera minuto (*Пашнев*, 1971). Kvankam li ellernis la lingvon dum kelkaj monatoj, tamen poste ĝin konstante perfektigis.

En 1937, en la eksa Sovetunio, Esperanto estis malpermesita, kaj iuj propagandistoj de Esperanto estis akuzitaj pri spionado, kontraŭrevolucia agado pro kio poste estis mortpafitaj aŭ senditaj al koncentrejoj. Tiel okazis al aktoro Nikolaj Rytkov el Lenina komsomola teatro. En 1938, li estis alvokita al Lubjanka (konstruaĵo en Moskvo, la centra malliberejo de la rusaj specialservoj de 1920 ĝis 1991), kien li venis pensante ke oni bezonas helpon de tradukisto el Esperanto. Alveninta li estis arestita kaj juĝita al ok jaroj da koncentrejo. Post plenumo de la puno Nikolaj ne trankviliĝis. En la jaro 1948, li skribis leteron al Stalin petante la restarigon de Esperanta Asocio. Oni rakontas, ke tiam Stalin furioziĝis: „Mi forĵetos ĉi tiun malpuran kolieron de la kolo de Moskvo“ (citita laŭ *Дашевский*, 2022). Nikolaj Rytkov estis kondamnita al pliaj 25 jaroj en la koncentrejoj, sed, feliĉe, post la morto de Stalin, li estis liberigita. Eble Stalin hatis Esperanton, ĉar li mem ne sukcesis ekregi ĝin? Vasilij Eroŝenko, defendante Esperanton kaj esperantistojn, ankaŭ skribis al Stalin. Oni povas supozi, ke liaj leteroj ne atingis la „grandan komandanton“, sed kiel nefidinda persono li estis konstante observata de la lokaj sekureculoj. La malamon al tiu ĉi lingvo vaste priskribis Ulrich Lins en la libro „La danĝera lingvo. Studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto” (1999).

Oni ne povas diri, ke la iniciatintoj de la lingvo Esperanto tro malmulte klopodis por la agnosko de tiu ĉi lingvo en la mondo. Ĉina aŭtoro Zhao Jianping. en la artikolo „Esperanto kaj Unuiĝintaj Nacioj“ skribas, ke post la Dua Mondmilito, por antaŭenigi la esperanto-movadon, Internacia Esperanto-Ligo decidis ekde 1946 peti subskribojn de internaciaj organizaĵoj kaj individuoj por subteno de Esperanto, por ke en 1949 oni lanĉu tutmondan movadon fokusitan al la disvastigo de Esperanto. La peticio por subskriboj asertis, ke solvo de la internacia lingvoproblemo havas grandan praktikan gravecon al la tuta mondo, tial Unuiĝintaj Nacioj devus serioze pritrakti tion. Internacia lingvo ne

malgravigas la naciajn lingvojn – ĝi estas kiel helplingvo, kiu multon aldonas al plibonigo de rilatoj inter homoj kaj akcelas socian progreson. Esperanto estas la sola internacia lingvo kiu atingis tiom grandan sukceson, tial Unuiĝintaj Nacioj estis petitaj uzi ĉiujn disponeblajn rimedojn por grandigi la rolon de tiu ĉi lingvo. La peticio estis tradukita al 25 ĉefaj lingvoj kaj sendita al diversaj landoj. Ĝis la fino de 1949, la peticion subskribis 492 internaciaj kaj naciaj organizaĵoj entute havantaj 15,45 milionojn da membroj. Aparte estis prezentitaj 895 000 individuaj subskriboj el 76 landoj per kiuj ili pruvis sian aprobon al tiu iniciato. Du jarojn poste, la tuto estis metita en kvar volumojn kaj en 1950 prezentita al la Unuiĝintaj Nacioj. Benjamin A. Cohen, la tiama vic-ĝenerala sekretario de Unuiĝintaj Nacioj, transdonis la dokumentojn al UNESKO. En 1953, UNESKO prezentis la dokumentojn al la membro-ŝtatoj. En 1954 UNESKO okazigis la ĝeneralan konferencon en Montevideo, en Urugvajo, kie akceptita rezolucio deklaris, ke Esperanto proksimigas la popolojn de la mondo, kio kongruas kun la celoj kaj idealoj de UNESKO, notis, ke kelkaj membro-ŝtatoj informas pri sia preteco komenci la instruadon de Esperanto en siaj edukaj institucioj. En la rezolucio tiuj membro-ŝtatoj estas petataj informadi la ĝeneralan direktoron pri la atingitaj rezultoj, la ĝenerala direktoro estis komisiita sekvi la progreson rezultitan de Esperanto en diversaj agadkampoj. Tio estis la unua fojo, ke UNESKO oficiale agnoskis la edukan, sciencan kaj kulturan valoron de Esperanto. En tiu ĉi konferenco UNESKO ankaŭ decidis rekoni L. L. Zamenhof, la kreinton de Esperanto, kiel meritoplenan homon de la monda kulturo. (*Zhao Jianping*, retaliro: http://www.elerno.cn/movado/movado183.htm). Bedaŭrinde, la monda socio ne atentis pri tiu racia propono de UNESKO. Multaj homoj el diversaj landoj ekŝatis tiun artefaritan lingvon kiu ebligas interkomuniki, helpi unu la alian, partopreni en esperantlingvaj kongresoj. Vasilij Eroŝenko estis delegito en tri tiaj kongresoj. La vojaĝo al Kaŭkazo vekis la emon vagadi kaj la deziro pli lerni, perfektiĝi neniam forlasis lin.

Litova ĵurnalistino Jolanta Miškinytė, transdonante la impresojn de sia vojaĝo al Hispanio, skribas, ke la fama Alhambra Palaco en la urbo Granado estas ne nur la plej grava verko de la iamaj majstroj de Granado, sed ankaŭ simbolo de la tuta Andaluzio. Nur rigardante ĝin, oni povas kompreni la doloran suspiron de blinda almozulo, enskribitan ĉe la pordego de la Alhambro, kie li, laŭdire, staris kun eltendita mano: „Oferu al mi, je la nomo de Dio, ja estas nenio pli malbona ol esti blinda. en Granado..." (*Miškinytė*, 2018). Ĉi tie vidiĝas la stereotipo de vidantoj: kial blindulo vojaĝu, se li ne povas vidi la belecon ĉirkaŭ si. Mia iama lernantino, nun kolegino, blindulino Irma Jokštytė, pri kiu mi faris la dokumentan filmon „Irmutė – Irma" prezentanta ŝian socialiĝon de la 3-a jaro de ŝia aĝo ĝis la 30 jariĝo, kaj kiu vizitis ne unu landon, rimarkas, ke starante sur la supro de la monto, ŝi aŭdas la rakontojn de la kunvojaĝantoj pri tio, kion ili vidas kaj kion ili sentas. Ŝi transprenas iliajn emociojn kaj laŭ la rakontoj de siaj amikoj, kreas propran bildon kaj mem ĝuas ĝin.

Mi kredas, ke al la legantoj de tiu ĉi libro ne aperos demando kial Vasilij Eroŝenko ŝatis vojaĝi, kvankam li estis blinda.

En Anglio: „Mi eksciis, ke *huligano* estas angla vorto“

Anna Ŝarapova konsilis al Vasilij daŭrigi siajn muzikajn studojn, sed en Rusio blinduloj ne estis akceptataj en la konservatorion. La bonfarantino rakontis al Vasilij ke en antaŭurbo de Londono, ekzistas la Reĝa Akademio de Muziko kie lernas blinduloj kaj proponis al li tie studi. Vasilij daŭre lernis la anglan. kaj Ana prezentis la peton, ke Vasilij Eroŝenko estu akceptita al tiu akademio. Baldaŭ ilin atingis pozitiva respondo de Londono. La Rusa Esperantista Societo sendis Vasilij Eroŝenko al Londono. Havante ŝparitan monon kaj ricevinte ferian forpermeson de la orkestro, li preparis sin por la vojaĝo, al kiu li iris sen akompananto.

Anna Ŝarapova, kun sia specifa energio, komencis prepari Vasilij Eroŝenko por la vojaĝo tra kvar ŝtatoj. Rapide ŝi ricevis la respondojn al siaj leteroj de eksterlandaj esperantistoj. De Varsovio, Berlino, Kolonjo, Bruselo, Calais kaj Londono venis la sciigoj, ke esperantistoj volonte helpos al blinda junulo atingi Anglion: oni transdonos lin de manoj al manoj kaj organizos „verdan stafeton“ (*Харьковский*, 1978). Vasilij dum sia tuta vivo estis dankema al tiu virino, sed, kiel multaj el ni, ĝuste aprezis tion, nur kiam perdis Ana: „Kia estus mia vivo, se mi ne estus renkontinta la kolombinon Anna Nikolaevna?“ – <...> li pensis, forlasante malgrandan grupeton da homoj en la tombejo kaj marŝante al la stacidomo. Ĉi-foje korniko silentis, ne ĝenis adiaŭi la virinon, kies gravecon en sia sorto Vasilij alte taksis, <...> ege alte. Nek patrino, nek patro – neniu sur la tero kreis tion, kion vekigis, tiu ĉi virineto, malriĉa instruistino, <...> mentoro, grandanima patrino, kiu estis la gvidstelo por li“ (citita laŭ *Poliakovskij*, 2000). Verkisto Vasilij Eroŝenko komparis Esperanton kun menciata en mezorientaj fabeloj magia lampo de Aladino kiu malfermis por li vojon al la mondo.

En februaro de 1912, la blinda muzikisto, aĉetinte bileton de tria klaso, foriris sola al sia unua eksterlanda vojaĝo – al Britio. Julia Patlan rekonstruis la itineron de tiu vojaĝo: Moskvo – Varsovio – Berlino – Kolonjo – Bruselo – Calais – Dovero – Kent – Londono – Southwick – Brajtono – St Leonards – Hastings – East Sussex – Londono – St Peterburgo – Moskvo (*Патлань*, 2014b).

En Varsovio, devis renkonti Vasilij polaj esperantistoj, sed kiam alvenis la Moskva trajno, neniu akceptis lin sur la kajo. Nekonata komercisto el Vilno proponis al li helpon: kaj akompanis al la ĝusta stacidomo, kaj aĉetis la bileton al Berlino kaj regalis per kafo kaj bulketo. Aliaj aŭtoroj asertas, ke la blinda esperantisto estis bonvenigita, nur la akceptantoj malfruis.

Poste, en aliaj lokoj de la vojaĝo – Kolonjo, Bruselo, Calais, Berlino – amikoj esperantistoj ĉie helpis la blindulon. Tiel Vasilij Eroŝenko sukcese atingis Londonon.

En Londono, ĉe la stacidomo „Charing Cross“, la blindan junulon de Moskvo renkontis esperantistoj geedzoj Paul (1880–?) kaj Margaret Lily (1878–1935) Blais. Paul Blais estis la sekretario de la Belga Komerca Ĉambro en Londono. Margareta –

konata esperantisto, aŭtorino de „Gvidlibro de Esperanto" (1908), „La profito pere de Esperanto" (1909) kaj de precipe populara, „La monda lingvo: kial ne Esperanto" (1916). Vasilij restis en tiu ĉi familio dum dek tagoj. En siaj memoraĵoj, li poste skribis: „Mi pasigis dek tagojn kun gesinjoroj Blais, kaj tiuj tagoj estis la plej feliĉaj de mia vivo en Anglio. Sinjorino Blais, kiel bona patrino, komencis instrui al mi bonajn manierojn" (citita laŭ *Kerziouk*, 2010). Cetere, bonaj manieroj al junulo mankos ankaŭ en Japanio. Kvankam la plej multajn kondutmanierojn infanoj lernas imitante plenkreskulojn, ĉi tiun mankon ne eblas plene atribui al blindeco. Eĉ se Vasilij estus vidanta, li kaj en Britio kaj en Japanio trafus la saman mankon de kono pri konduto, etiketo. La ĉefa kaŭzo – la medio. Junulo el rusa vilaĝo kaj el sufiĉe fermita Moskva eduka institucio por nenoblaj blinduloj, ne povis scii pri rafinita brita aŭ specifa japana etiketo. Familio Blais, kiu akceptis Vasilij en Londono kaj poste prizorgis lin, konsciis, ke kun la tiama nivelo de la angla lingvo li ne estos akceptita al la akademio. Dezirante ne traŭmatigi Vasilij, ili organizis kvazaŭ kelkmonatajn preparajn kursojn, tiel strebante plibonigi lian lingvon, kaj instrui la taŭgan konduton.

En Londono, Vasilij Eroŝenko trovis multajn amikojn kaj samideanojn, sed precipe proksime ili komunikis kun la blinda brita esperantisto, folkloristo, konsulo de blindaj esperantistoj William Percy Merrick (1868–1956) kaj kun esperantisto, sia instruisto pri angla lingvo William Phillimore (1844–1934). Tiam 67-jaraĝa William Phillimore memstare lernis brajlon jam en 1905 kaj li transskribis multajn librojn por blinduloj per reljfa skribo. Dezirante, ke Vasilij havu pli da ŝancoj plibonigi sian anglan, Vilhelmo trovis al li ĉambron en neesperantista familio. Vilhelmo, kiu iĝis la plej bona amiko dum la tuta restado en Anglio, administris la financajn aferojn de Vasilij. Vasilij Eroŝenko kun siaj novaj amikoj ĉeestis la Londonan Esperanto-klubon kaj intense lernis la anglan. Post tri monatoj gesinjoroj Blaise kaj William Phillimore veturigis la blindan gaston al Norwood kie funkciis Reĝa Kolegio por Blinduloj kaj en 1871 fondita Akademio de Muziko por Blinduloj. La fondintoj de tiu ĉi eduka institucio estis du blinduloj – la anglo Thomas R. Armitage (1824–1890) kaj la usona lordo Francis Josef Campbell, (1832–1914).Vasilij Eroŝenko estis prezentita al lordino Campbell, la edzino de la fondinto de la institucio. En ĉi tiu eduka institucio, speciala atento estis donita al la edukado kaj fizika trejnado de blinduloj, naĝado, gimnastiko, remado, biciklado, rajdado (*Патлань*, 2020). Vasilij Eroŝenko studis en la menciita institucio de la 20-a de majo ĝis la 23-a de julio, en la jaro 1912 (*Kerziouk*, 2010).

Enirante la Akademion de Muziko por Blinduloj (*Royal Normal College and Academy of Music for Blind*) apartenanta al Reĝa institulo de blinduloj en Norvud (*Рогов*, 1958) la junulo havis eblecon kompari la edukadon en la Norwood Akademio kun tiu de fermita eduka institucio por blinduloj en Moskvo, kie al lernantoj oni malpermesis forlasi la lernejan teritorion kaj estis aplikataj fizikaj punoj. Vasilij

Vasilij Eroŝenko, 1912 (retaliro: https://uramdb.ru/writters/writter/5257443-vasilij-eroshenko.html)

precipe estis mirigita, ke en angla lernejo la tuta edukado celis, ke blinduloj eksentu sin plenrajtaj homoj: en la lerneja naĝejo oni instruis ilin ne nur naĝi, sed ankaŭ savi dronantajn homojn, en lernejo estis faritaj trakoj por rulskedado, perfekta stadiono por blinduloj.

En la angla eduka institucio koncertis famaj artistoj, kaj la studentoj mem prezentadis sin. Ĉi tie Vasilij havis la okazon aŭskulti komponaĵojn de L. van Beethoven, J S Bach, G F Handel kaj aliaj klasikuloj, multe legis. Dum tiu periodo aperas la unuaj poemoj de Vasilij Eroŝenko, kiuj komenciĝas per la vortoj: „Ne ekzistas pli feliĉa homo en la mondo,/ Mi vidas la sunon, mi vidas la lumon...“

La junulo rapide konsciis, ke por fariĝi bona muzikisto, komenci tion studi je 22 jaroj – tro malfrue. Esti meznivela muzikisto Vasilij ne volis. Al tia versio aliĝas parto de aŭtoroj, provante klarigi kial en la Norwood Akademio de Muziko Vasilij Eroŝenko studis nur dum kelkaj monatoj.

Kelkaj aŭtoroj indikas, ke junulo estis forpelita el ĉi tiu eduka institucio pro rajdado sur ĉevalo en la aleoj de Norwood Parko: „– Sinjoro Eroŝenko, kiel vi aŭdacas? Vi povintus vundi homon – vi estas blinda – Jes, mi ne vidas, sed la ĉevalo povas vidi! – Sed vi malobservis la rajton pri privata proprieto – vi eksidis sur la ĉevalo de alia homo“ (citita laŭ *Харьковский*, 1978, p. 44). Estis ankaŭ pli multaj miskomprenoj: „<...> en la sama semajno mi havis la ideon baniĝi nokte en la plej proksima

artefarita lageto. Kaj denove iĝis tumulto, oho, aĥ, kaj la severa publika riprocĥnoto. Tiam mi eksciis, ke la vorto *huligano* estas de angla origino. Pro tiu ĉi stigmo, mi estis forpelita el la Reĝa Instituto por Blinduloj" (citita laŭ *Полаяковский*, 2000).

Ekzistas ankoraŭ unu versio pri la forpelo de tiu estiminda institucio – pro la rilatoj kun elmigrintoj anarkiistoj. Oni opinias, ke la forpelo el la eduka institucio ne ĉagrenis la junulon: la ĉefan celon li atingis – li konatiĝis kun la plej progresivaj metodoj de la instruado al blinduloj. Estonte, esploristoj de la biografio de la verkisto eble konfirmos aŭ neos la ĉi tie prezentitajn versiojn, eble indikos alian kaŭzon, kial Vasilij Eroŝenko forlasis akademion.

Forlasinte akademion Vasilij Eroŝenko loĝis en Londono kaj studis memstare. Li tiutempe ankaŭ laboris en la Brajla Sekcio de la Brita Muzea Biblioteko. Evidentiĝas la altruismo kaj empatio de esperantistoj rilate al blinduloj. Al kelkaj blindulaj bibliotekoj krom presitaj libroj apartenis ankaŭ man-reliefe reskribitaj libroj en Esperanto. Jam en 1910, ĉefe pro la dungo de esperantisto A. J. Adams, la vidantaj esperantistoj komencis brajle transskribi Esperanto-librojn por blinduloj. La kvanto de tiaj volontulaj kopiistoj en la Nacia Biblioteko por Blinduloj en Londono ĉiujare kreskis. (*Historio de la Esperanto-movado inter la blinduloj* 1888-2015, Keuruskopio Oy, 2016).

En bibliotekoj de Londono, Vasilij Eroŝenko studis filozofion, religion, precipe budhismon, kaj lernetis la sanktan lingvon de sanktaj libroj por budhismaj monaĥoj – la palion. Kun siaj amikoj, li dungis senlaboran aktoron, ke tiu laŭtlegu librojn por ili. Li komencis verki fabelojn por infanoj en la angla. Kun sia franca amiko Marcel Simonet, kiu instruis al li la francan, li vizitadis muzeojn kaj bibliotekojn. Loĝante en Anglio, Vasilij ankaŭ vizitadis la klubon ĉe Societo de Rusaj Politikaj Elmigrintoj, renkontis la granddukon, geografon kaj geologon, anarkiistan teoriiston Pjotr Kropotkin (1842–1921), aŭskultis liajn prelegojn kaj eĉ gastis en lia hejmo. Dum tiu gastado, inter la gastoj, li renkontis grafon Aleksej Orlov-Davydov, de kiu la patro de Vasilij luis parcelojn. La ideoj de P. Kropotkin respeguliĝis poste en multaj fabeloj de Vasilij Eroŝenko kreitaj en Japanio kaj Ĉinio. Esperanto, kune kun la ideoj de anarkiismo, estis tiutempe ege popularaj en Orientaj landoj. La ĉina anarkiisma revuo „Xinshiji" tiam eldonata en Parizo, proponis anstataŭigi la ĉinan per Esperanto, por ke Ĉinio povu marŝi piedo al piedo kun la civilizacio (*Кучер*, 2016).

Vasilij Eroŝenko ne restis longe en Anglio. La nebulon de Londono li perceptis kiel mallumon, la varmo de la suno por blinduloj tre helpas orientiĝi en spaco – ĝi estas kvazaŭ kompaso por vidanta homo. En Londono ne nur orientiĝi estis malfacile – lin logis Oriento, kie en la ĉielo regis la suno. Poste, Eduard Pašniov verkante sian novelon pri Vasilij Eroŝenko donos nome tian titolon: „La Suno – lia gvidisto" (*Пашнев*, 1971).

Post lernado en akademio por blinduloj kaj sendependaj studoj en Londono, la junulo decidis reveni hejmen. Fine de septembro lia instruisto de angla lingvo,

Vasilij Eroŝenko kun la angla esperantisto kaj sia instruisto pri la angla William Phillimore (retaliro: http://www.belgorodbiblioteka.ru/Files/foto.html)

William Phillimore, ĉe kiu li ankaŭ lastatempe vivis, sidigis lin en vaporŝipon irantan al Hamburgo. En Germanio Vasilij Eroŝenko estis bonvenigita de lokaj esperantistoj. La stafeto daŭris. Oni povas supozi, ke la amikeco inter Villiam kaj Vasilij inspiris la britan esperantiston verki libreton pri la graveco de Esperanto por homoj kun vidhandikapo.

Vasilij precipe ĝojis pri la brajla skribmaŝino donacita de William Merrik. Brajlaj skribmaŝinoj aperis nur en la fino de la19-a jarcento kaj multe plifaciligis la skribadon de blinduloj. Lerta blindulo povis skribi 30–50 vortojn dum minuto.

En 1912–1913 aperis en la gazetaro kelkaj mesaĝoj pri tiu ĉi vojaĝo de Vasilij Eroŝenko: la publikaĵo de la sekretario de Londona Esperanto-Klubo en la gazeto „The Daily Herald" („La ĉiutaga heroldo") en la rusaj revuoj „Blindulo" („Слепец"), „Aplink pasaulį" („Вокруг sveta"), en 1913 publikigita la artikolo de A. Ŝarapova en „La Ondo de Esperanto", k.t.p. Memstara vojaĝo de blindulo al alia lando tiutempe estis sensacio.



Kovrilo de la libro de William Phillimore „La Graveco de Esperanto por Blinduloj", eldonita en 1914 (retaliro: https://blogs.bl.uk/european/2014/12/i-raised-a-fire-in-my-heart-remembering-eroshenko.html)



Esperanta Brajla Alfabeto

(Retaliro: https://www.transnationalhistory.net/esperanto/en/2021/12/10/vasilij-eroschenko)

Brajla tajpmaŝino de V Eroŝenko (retaliro: http://ngosbs.info/chelovek-novoj-epohi/)

Nuntempa brajla tajpmaŝino (retaliro: https://www.elitagroup.ru/pages/prod-TatraPoint.php)

Julia Patlan, citante Viktor Pershin, notas, ke en la revuo „La Ondo de Esperanto", en la aprila numero de 1912, kie la informo de Anna Ŝarapova „Helpo de esperantistoj" estis publikigita, estas skribita: „Sinjoro Vasilij Eroŝenko, blinda esperantisto el Moskvo, kiu regas la anglan kaj internacian lingvon Esperanto, decidis daŭre perfektiĝi en ambaŭ lingvoj. Tiucele, la 9-an de februaro, li tute sola, sen akompananto, forveturis al sia unua vojaĝo – de Moskvo al Londono. Dum la tuta vojaĝo, esperantistoj el diversaj landoj sin proponis por helpi lin. Dufoje por renkonti sinjoron Eroŝenko iris al la stacidomo, publicisto sinjoro Hirszowski el Varsovio, sed ili ne sukcesis renkontiĝi. Laŭ s-ino Sophie Matard, la esperantistoj en Berlino ne nur renkontis sinjoron Eroŝenko en la fervoja stacidomo, sed ankaŭ kune vizitis la Reĝan Societon de Blinduloj. Sinjoro Eroŝenko pasigis agrablan vesperon en Kolonja filio de Universala Esperanta Asocio - tion multe helpis la loka telegraf-oficisto sinjoro Max Coblenzer. Sinjoron Eroŝenko varme bonvenigis en Parizo konataj blindaj esperantistoj, geedza paro, gesinjoroj Zapater-de-Chalmont, hispano kaj germanino laŭ naciecoj. En Calais lin renkontis la leŭtenanto, sinjoro Léelancher, kaj la eldonisto, juristo sinjoro Perrin, kiuj aĉetis al sinjoro Eroŝenko bileton al Londono, kaj akompanis lin ĝis la vaporŝipo, zorgante pri liaj pakaĵoj kaj vojaĝdokumentoj. Sinjoro Finez, el Dovero, renkontis lin ĉe la varfo, akompanis lin al la trajno iranta al Londono kaj telegrafis al kolego en Londono. En Londono, la geedza paro gesinjoroj Blaise, renkontis sinjoron Eroŝenko kiel parencon. La kompatemo kaj nobla konduto de la reprezentantoj de la Esperanto-asocio devus esti bona ekzemplo por aliaj. A. Š-a" (citita laŭ *Патлань*, 2020, retaliro: https://tiflo.info/tag/viktor-pershin/). La mesaĝo konfirmas la supozon, ke tiu „stafeto" estis organizita de Ana Ŝarapova, ĉar ŝi plej precize konis la familiajn nomojn de ĉiuj bonfaruloj, kiuj helpis ŝian protektaton. Publikado de nomoj de tiuj esperantistoj en la revuo estis la oficiala danko al ili. La unueco kaj altruismo de tiamaj esperantistoj estas vere fascinaj.

Inter la aro da aliaj celoj dum tiu ĉi vojaĝo, la junulo havis ankoraŭ unu celon, kompreneblan por ĉiu blindulo: „Ĉu mi estus foririnta al tia vojaĝo sen espero renkontiĝi kun famaj oftalmologoj de Anglio?! <...> mi ne estas malgranda infano por ke mi ne komprenus: apenaŭ iu ŝanĝos tion kion la sorto destinis...“ (citita laŭ *Поляковский*, 2000). Eblas supozi, ke Vasilij Eroŝenko kontrolis la okulojn en Londono. Tiu ĉi vojaĝo estas sufiĉe bone dokumentita – pri ĝi oni skribas en preskaŭ dek kvin eldonaĵoj (*Патлань*, 2014). La vojaĝo de rusa blindulo eksterlanden estis la parto de la propaganda kampanjo dediĉita al la 25-a datreveno de kreado de Esperanto, sed samtempe, per ekzemplo de Eroŝenko, estis pruvita, ke blindulo povas vojaĝi memstare, akceptante la helpon kiun donas al li konataj kaj nekonataj homoj (*Патлань*, 2020). La rememoroj pri la vojaĝo al Anglio, publikigitaj en revuo „La Ondo de Esperanto“ en Rusio iĝis la una publikaĵo de Vasilij Eroŝenko (*Бронштейн*, 2020). La junulo revenis el Anglio pli bone edukita, ricevinta kuraĝon kaj scivolemon, persono strebanta al perfektiĝo.

Lando de la Leviĝanta Suno: la komenco de plensanga vivo

Reveninte el Anglio, Vasilij Eroŝenko komencis preparojn por vojaĝo al Japanio. Li denove al la vojaĝo estis sendita kun subteno de Rusa Esperantista Societo. Oni opinias, ke Vasilij unue ekinteresiĝis pri Orientaj landoj kiam li ankoraŭ studis en la Moskva lernejo por blinduloj kaj poste en Londono.

La junulo konis Sergej, filon de la vojaĝanto kaj verkisto Vladimir Obruĉiov (*Обручев Владимир Афанасьевич*, 1863–1956), kiu estis la aŭtoro de la fama libro „Lando de Sanikov", gastis en la domo de Obruĉiovoj. Iun tagon, aŭskultante la rakontojn de la sciencisto pri liaj vojaĝoj tra Ĉinio, Vasilij demandis: „Ĉu vi kunportus al vojaĝoj blindulon?" (*Ерих*, 1998, p. 38). La citita epizodo montras ke la planoj deVasilij Eroŝenko pri Oriento estis pli seriozaj – ne nur Japanio.

William Merrick, ĉe kiu Vasilij Eroŝenko loĝis iom da tempo, atestis, ke Japanio estas la sola lando, kie la blinduloj estas tre respektataj. Fakte, blinduloj estas respektataj en Japanio, ĉar ili de pratempoj solaj ludis per tradiciaj japanaj muzikiloj kotoo kaj ŝamiseno, praktikis masaĝadon. La monopolo de tiuj profesioj por blinduloj havas longan historion, kiu reflektiĝas ankaŭ en la japana belarto.

En Japanio en 858, post la morto de la blinda princo Hitoyasu, por honori memoron de li estis kolektitaj impostoj favore al blinduloj. En tiu lando blinduloj povis okupiĝi pri literaturo, muziko, povis muziki, esti tre bonaj specialistoj de masaĝado, akupunkturo (*Jan, Reger, Freeman, Scott,* 1977). Ĝis hodiaŭ en Japanio estas popularaj blindaj masaĝterapiistoj, muzikistoj per ŝamiseno kaj kotoo.

Anna Ŝarapova konatigis Vasilij Eroŝenko kun kunlaborantoj de la japana konsulejo en Moskvo kiuj trovis instruiston, ne tro multe postulantan pro sia

Nishikawa Sukenobu. Blinda ŝamisen-muzikisto (foto el la persona arkivo de la aŭtoro)

Vasilij Eroŝenko, 1914 (retaliro http://pmu.in.ua/nogroup/eroshenko/)

laboro – post ses monatoj Vasilij Eroŝenko sciis paroli ne nur en angla, sed ankaŭ iom jam en la japana. Vasilij korespondis kun esperantistoj el Japanio, Koreio, Birmo. La 15-an de februaro, 1914 direktoro de la Tokia Lernejo por Blinduloj Machida Noribumi (町田　則文, 1856–1929), ricevis peton de Vasilij Eroŝenko pri akcepto studi kaj li direktis tiun peton al la ministerio, petante la permeson.

En 1914, en Moskva Esperanto-revuo „La Ondo de Esperanto“ oni skribis: „Blinda esperantisto el Moskvo, sinjoro Eroŝenko, kiu pasintjare iris al Anglio, nun forveturas al Tokio (Japanio). Sinjoro Eroŝenko vojaĝas sen gvidanto. Li bone parolas Esperanton kaj intencas uzi servojn de Universala Esperanto Asocio“ (citata laŭ *Харьковский*, 1978, p. 48).

Sendata de esperanta societo, en aprilo 1914 Vasilij Eroŝenko estis preta vojaĝi al la Lando de la Leviĝanta Suno. Li metis en sian vojaĝsakon brajlan vortaron de Esperanto, gitaron, brajlan skribmaŝinon, donacitan de la brita bonfaranto William Merrick, eniris trajnon kaj komencis sian longan vojaĝon. En aprilo Vasilij Eroŝenko per la velŝipo „Amuro” de Vladivostoko foriris al Japanio. Li alvenis al Tokio la 27-an de aprilo, 1914, t. e. tri monatojn antaŭ la komenco de la Unua Mondmilito.

Hodiaŭ estas malfacile diri, ĉu Rusa Esperanto-Societo klopodis aŭ Vasilij mem, korespondante per Esperanto, konatiĝis kun Nakamura Kiyoo (中村　精男, 1855–1930), profesoro de la Universitato de Tokio, doktoro pri sciencoj, direktoro de Centra Meteologia Observatorio de Japanio kaj esperantisto. Nakamura Kiyoo en 1879 finis la Tokyo Imperiestran Universitaton kaj akiris diplomon de fizikisto. Dum 1886–1889, li studis en Germanio, en la Universitato de Berlino li finis siajn meteologiajn studojn, laboris en Mara Meteologia Observatorio en Hamburgo. En 1890 li fariĝis inĝeniero ĉe la Japana Centra Meteologia Observatorio, kaj en 1895 direktoro de la observatorio. En 1902 li ricevis la rangon de doktoro pri scienco, ekde la jaro 1908 – membro de la Imperia Akademio de Japanio. Krom siaj oficialaj devoj, la profesoro multe kontribuis al la popularigo de Esperanto, estis unu el la gvidantoj de Japana Esperanto-Societo.

Profesoro Nakamura Kiyoo (中村　精男) (retaliro: https://www.vastalto.com/librejo/VeDNa/VeDNa.html)

Profesoro Nakamura Kiyoo renkontis Vasilij en Tokio kaj enloĝigis lin en sia hejmo. Dum la unuaj tagoj Vasilij rakontis al la profesoro pri sia vivo – de infanaĝo ĝis la alveno al Japanio. Nakamura estis amika kun la blindulo. Preskaŭ ĉiujn vesperojn ili pasigis kune. Profesoro veturigis Vasilij tra Tokio, ili ofte per aŭtomobilo iris ankaŭ ekster la urbo. La impresojn de junulo en tiu tempo ilustras la fragmento el la taglibro de Vasilij Eroŝenko: „<...> Hodiaŭ je la sepa matene mi renaskiĝis.

Konstruaĵo de lernejo de masaĝistoj en Tokio (foto el „Verkisto kaj publicisto V. J. Erošenko", kompilis A. I. Sizova, 1990)

Kaimei (tradicio pri nomŝanĝo) ankoraŭ ne okazis, do mi ankoraŭ ne havas nomon. Mi daŭre ne konas la japanan lingvon. Nia familio – patro, patrino kaj sep infanoj, inter ili ankaŭ mi. Mi – la dua filo. La plej aĝa frato estas la posteulo de profesoro Nakamura. Ni ĉiuj devas respekti lin kaj nomi „niisan" kio signifas „sinjoro pli aĝa frato" <...> En la unua tago post alveno, la profesoro instruis al mi etiketon, kiam mi senintence preskaŭ ofendis lian edzinon: mi provis eniri la domon en miaj ŝuoj – ja ekstere estis seke kaj, krome, ni alvenis per aŭtomobilo. Nakamura haltigis min por ke mi ĉe la pordo ŝanĝu miajn ŝuojn al pantofloj. Kvankam la profesoro ricevis la edukon en Eŭropo, li, kiel la plej multaj japanoj, loĝis en unuetaĝa ligna domo. La sama ĉambro servis kiel salono, manĝoĉambro kaj dormoĉambro. Nokte oni forigis la tablon ĉe kiu ni vespermanĝis kaj pretigis por mi liton: oni metis sur la plankon tatamojn – ĉirkaŭ du metrojn longajn kaj unu metron larĝajn matojn: kovris ilin per dikaj litkovriloj – futonoj. Mi surmetis kotonan robon similan al noktosurtuto, jukaton, kaj ekdormis" (citita laŭ *Харьковский*, 1978, p. 53–53). Vasilij ne sentis sin fremda en Japanio, ĉar li rapide komprenis kaj akceptis proksimajn al li tradiciojn de tiu ĉi lando. Baldaŭ, li estis surprizita rimarkante, ke lerni kiel konvene kliniĝi kaj dece sidi estas vera arto. Verŝajne, antaŭ sia foriro Vasilij ne konatiĝis bone kun tradicioj de la Lando de la Leviĝanta Suno.

Kiel gasto kaj protektito de profesoro Nakamura en la blindullernejo, Vasilij ĝuis esceptajn kondiĉojn: li havis apartan ĉambron kien venis masaĝ-instruistoj kaj kurson de

Vasilij Eroŝenko kun gitaro inter la japanaj amikoj (retaliro: http://ngosbs.info/chelovek-novoj-epohi/)

Vasilij Eroŝenko kun balalajko inter japanaj amikoj (retaliro: https://www.jp-club.ru/Vasilij-eroshenko-koncert-v-mito-okonchen/)

Baigetsu. (19-a jarcento) Blinda masaĝisto kun sia kliento. Netsuke

Baigetsu. (19-a jarcento) Blinda masaĝisto kun sia kliento. Netsuke

Okimino. (19-a jarcento) Blinda masaĝisto kun kliento kaj hundo. Netsuke

(Fotoj el la persona arkivo de la aŭtoro)

japana literaturo instruis la profesoro parolanta la rusan lingvon. Vasilij rajtis elekti kion li volas studi. La dudek-kvarjara junulo elektis kvar fakojn: psikologion, medicinon, muzikon, japanan lingvon kaj literaturon. Aliaj fontoj asertas, ke li studis japanan lingvon, medicinon, filozofion, historion, psikologion, japanan popolmuzikon. Vasilij Eroŝenko ekmajstris tradician masaĝon kaj akupunkturon, ellernis ludi per kotoo kaj ŝamiseno. Li devis konatiĝi kun preskaŭ ducent muzikaĵoj, kiuj konsistigas la tradician ŝamisenan repertuaron kaj kiu estas transdonata de instruisto al lernanto per orelo, sen uzo de notoj. Tial blindaj muzikistoj ĉiam estis kaj daŭre estas la plej bonaj konantoj de japana popolmuziko.

Kvazaŭ por repagi sian edukadon en tiu ĉi institucio, Vasilij Eroŝenko organizis kurson de Esperanto por kunlernantoj. Li eĉ planis iri al Usono, kun kelkaj blindajn studentoj – tiel li informis tie loĝantajn esperantistojn, sed tiujn planojn ne sukcesis efektivigi pro la manko de monrimedoj. Vasilij neniam estis sen aktiveco: li muzikis, modlis el argilo, diskutis pri artaj aferoj kun samklasanoj, kantis al ili ukrainajn kaj rusajn kantojn.

Dum loĝado ĉe profesoro Nakamura ampleksigi sian japanan vortprovizon al Vasilij helpis la okjara filino de la profesoro, Toshiko: „Ŝi faris tion tre respondece, kvazaŭ ŝi estus plenkreska. Apenaŭ mi tuŝis iun ajn objekton, ŝi tuj diris la nomon de ĝi. Mi ripetis post ŝi, kaj malgraŭ mia barbara rusa akĉento, ŝi ne ridas pri mi, sed korektas. Mi notas la prononcon de vortoj sur kartoj en brajlo – nokte mi palpos ilin kaj provos parkerigi“ (citata laŭ *Шагинян*, 1985, 116).

En la somero de 1915, Vasilij Eroŝenko kune kun Kataki Noburu, kiu tri jarojn prepariĝis por oficvojaĝo al Moskvo studi la rusan literaturon, forveturis al la insulo Hokajdo. Oni pensas, ke junulo sur la insulo Hokajdo studis japanan popolan medicinon, akupunkturon kaj japanan gimnastikon. Poste, tiun scion kaj praktikan sperton li aplikis instruante la blindulojn. Pri kelkaj trajtoj de japana medicino poste Vasilij Eroŝenko skribis en la eseo „Blinduloj de Okcidento kaj Oriento”: „Japana masaĝo

(hari), kiel speco de kuracmetodo per ora aŭ arĝenta kudrilo (kiu), kaj kuracado per brulado fariĝis ekskluziva monopolo de blinduloj. Laŭ antikva Orienta medicino, sur la homa korpo estas 628 punktoj, ne videblaj simple per okulo. Enpikante oran kudrilon en la korpon tra ĉi tiuj punktoj aŭ bruligante globetojn faritajn el speciala herbo sur ili, eblas kuraci diversajn malsanojn de la muskoloj, glandoj kaj internaj organoj. Por determini la lokon de tiuj ĉi punktoj sur la homa korpo, oni devas fari komplikajn mezuradojn kaj havi delikatan senton de tuŝado, tial eĉ vidpova kuracisto ofte turnis sin al blinda specialisto, ke tiu marku la necesajn lokojn per kreto“ (*Єрошенко*, 1969), p. 212–213).

Vasilij Eroŝenko en Japanio ekde la 27-a. de aprilo 1914 ĝis la 12-a de majo 1916 kiel libera aŭskultanto ĉeestis la dujaran kurson en la Tokia Lernejo por Blinduloj. Surbaze de rekomendletero de la Rusa Ambasadejo adresita al la direktoro de la lernejo iĝas klare, ke li devis mem pagi la studojn. tamen pagi lin helpis Nakamura Kiyoo, parton de mono sendis la patro el Rusio. Ekde la mezo de la jaro 1915 ankaŭ Agnes Alexander subtenis lin finance. Fine de la kurso, li ricevis „atestilon pri sukcesa fino de la masaĝa kurso“ (*Патлань*, 2016).

La humida pasero

Vasilij Eroŝenko komunikis kun famaj japanaj verkistoj kaj aliaj artistoj. En februaro de 1915, kiam Vasilij ripozis en Nara Parko de Tokio, aliris lin japano. Eble lin ekinteresis la blinda eŭropano, ĉar la patro de la nekonato ankaŭ estis blinda. Evidentiĝis ke tio estis la fama japana verkisto, kritikisto kaj publika aganto Akita-Ujaka (1883–1962, la vera nomo estas Tokuzo). Akita estis unu el la fondintoj de moderna japana teatro nomita „Shinkyō Gekidan". En 1907 li komencis publikigi siajn verkojn. La unuaj verkoj estis de kontraŭmilita karaktero (novelo „La unua aŭroro", kaj aliaj). En 1919 li aliĝis al la grupo de verkistoj de proleta literaturo. Li verkis la mallongajn dramojn penetritajn per anarkiismaj ideoj. Li ŝatis la hindan filozofion (mistika dramo „Budho kaj la morto de infano", 1920). En la komenco de la jaro 1920, li aliĝis al la socialisma movado. En 1927–1928, li vizitis iaman USSR kaj publikigis la eseon „La juna Soveta Rusio" (1929). Verki tiun libron helpis Vaslilij Eroŝenko. En 1928–1934, li laboris kiel estro de la Instituto de Proleta Scienco. Li estas konata kiel la aŭtoro de porinfana literaturo (*Аникеев, Такеда,* 2017). Interese, ke la patro de Akita-Ujaka estis tiom fama akuŝisto en urbo Kuroishi sur la insulo Honshuo, ke li estis nomita „la dio de novnaskitoj". Li blindiĝis antaŭ ol lia filo naskiĝis. Do, Akita mem havis spertojn kiel komuniki kun blinduloj (*Патлань*, 2020). Eblas fari supozon, ke Akita sciis la brajlan skribon: „Mi sentas nostalgion al la patro kiu instruis min skribi premante la manplaton al manplato" (citita laŭ: https://kuroishi.or.jp/english/ujaku-akita-memorial-hall).

Vasilij Eroŝenko estis impresita pro la modesteco de tiu viro: „Mi ofte memoras, kiel li klarigis al mi, kial li elektis tiel frivolan pseŭdonimon. Verdire, mi estis tute konfuzita kiam mi eksciis, ke Akita-Ujaka estas tradukata kiel Malseka pasero. Jen kie per vanteco tute ne odoris! Alia, kun sia famo de verkisto, delonge nomus sin Aglo, Falko aŭ, en la plej malbona kazo, Alaŭdo. Li restis Pasero, kiu iam ŝajnis al li kara, varma, kortuŝa simbolo de senmerite ofendita, malforta estaĵo. Akita-Ujaka neniam laciĝis dirante, ke li servis por unu ideo – la unueco de decaj, afablaj, malfortaj homoj, kiuj ne povas fidi je io alia krom la forto de unueco. Kaj li plendis, ke li ne multon povas fari: li ne havis pli da forto ol pasero" (citita laŭ *Поляковский*, 2000). Ekzistas ankaŭ alia interpretado de tiu vorto. En sia taglibro Akita skribis, ke en infaneco li estis inklina al malsanoj kaj malkuraĝa knabeto, kiu sin nomis Akita-Ujaka (弱い vortludo, kiu en la japana signifas malforta) kaj poste tiun nomon akceptis kiel pseŭdonimon (retaliro: https://kuroishi.or.jp/english/ujaku-akita-memorial-hall).

Akita prezentis Vasilij Eroŝenko al siaj amikoj, kiuj interesiĝis pri rusa lingvo. Unu el tiuj estis la posedantino de la butiko kaj kafejo „Nakamura-ya", ĵurnalistino, verkistino, fakulino pri rusa literaturo Sōma Kokkō (1877–1955). En tiu kafejo kolektiĝis la „Societo de la Ruĝĉapuloj" – kies membroj portis ruĝajn ĉapojn. Tio

Vasilij Eroŝenko kaj japana dramverkisto Akita-Ujaka (retaliro: http://eroshenko.org.ru/eroshenko-glazami-ego-sovremennikov)

Vasilij Eroŝenko en Japanio antaŭ foriro al Siamo, 1916 (foto de neidentigita fotisto.)

Akita-Ujaka (retaliro:https://chinchiko.blog.ss-blog.jp)

Akita-Ujaka (foto de ne identikigita fotisto)

Akita-Ujaka (retaliro: https://en.wikipedia.org/wiki/Ujaku_Akita)

estis la specifa literatura debatklubo, kie oni ofte diskutis pri politikaj kaj artaj temoj. Sōma Kokkō invitis Vasilij Eroŝenko loĝi en sian domon, kie Vasilij Eroŝenko donis lecionojn de rusa lingvo al la gastigantino kaj aliaj membroj de tiu societo. Sōma Koko, prizorgis Vasilij kiel sian propran infanon kaj eĉ pagis lin pro la lecionoj de rusa lingvo. Samtempe Vasilij Eroŝenko havis tre bonajn kondiĉojn por lerni la japanan. V. Rogov rakontis, ke Soma sciis la rusan kaj sukcese plibonigis ĝin parolante ruse kun Vasilij, kaj Vasilij diktis al ŝi la unuajn kreitajn historiojn, plej verŝajne, origine naskitajn en lia kapo en la rusa, – Sōma tradukadis ilin al japana lingvo. Ĉi tie eblas paroli pri la speco de la kunlaboro. Vasilij Eroŝenko iom post iom ellernis la japanan lingvon. La malbone vidanta verkisto Fokuoka Seichi menciis, ke Vasilij el siaj brajlaj notoj diktis rakontojn kaj fabelojn en la japana (*Панков*, 2017).

La amikeco inter Vasilij Eroŝenko kaj Akita-Ujaka estis reciproke utila. Vasilij konatigis Akita-Ujaka kun siaj amikoj, kaj kio plej gravas – ekinteresigis lin pri Esperanto. En sia „Aŭtobiografio“ li skribis: „Kiam mi tute seniluziiĝis pri la vivo kaj atingis la ekstreman gradon de nihilismo, Vasilij Eroŝenko aperis en mia vidkampo. Mi eksciis, ke Eroŝenko, estante blinda, kun granda entuziasmo laboris por la tutmonda Esperanto-movado. Mi tuj komencis lerni Esperanton“ (cit. laŭ *Харьковский*, 1978, p. 61).

La fama aktoro Sasaki Takamaru rememoris, ke tiutempe en la domo de Sōma Kokkō formiĝis rondeto „Tsutino kai“ („Grundo“), gvidata de Akita. El tiu ĉi rondo naskiĝis la fama „Progresema Teatro“ – „Shinkyō Gekidan”. S-ino Sōma Kokkō kaj ŝia filino Chikako partoprenis en la prezentadoj. La kritiko de Vasilij Eroŝenko estis kategoria, foje eĉ akra, kio kontrastis kun lia iom infaneca aspekto: „Helaj, ondantaj <...>, haroj ĝis la ŝultroj, tenera, iom virineca vizaĝo, forte fermitaj okuloj, hela blanka ĉemizo, larĝa zono kun buko, iom dekstren klinita kapo – la tuta aspekto estas trapenetrita de nepriskribebla aristokrata digno, ĝi donas al mi nepriskribeble varman senton“, – tiel la aspekton de Vasilij Eroŝenko priskribas la japana verkisto Eguti Kijesi (*Киеси*, 1962, p. 167), Aliaj aŭtoroj kiuj konis Eroŝenko emfazas iom malantaŭen retroklinitan kapon, karakterizan al multaj blinduloj (*Бурцева*, 1962, p. 199). Verŝajne, tiam ne estis tiom multaj eŭropanoj en Japanio kaj blindulo, vojaĝanta sola kaj sen akompananto, sendube altiris la atenton de preterpasantoj.

La lingvaj kapabloj de Vasilij Eroŝenko estas vere mirindaj – post jaro li parolis en japana! En Japanio Vasilij komencis verki prozon. Jam en januaro 1916, la revuo „Kibo“ („Skalo”) publikigis „Rakontas paperlanterno” („Chochin no hanasi“),, kiu estis verkita de Vasilij Eroŝenko jam en la japana, post la jaro kaj duono da loĝado en tiu lando. **Post la publikigo de tiu ĉi verko de Vasilij Eroŝenko, en Japanio oni komencis lin nomi poeto. La komencanta verkisto kapablis subtile eksenti la spiriton de Oriento kaj tial li rapide iĝis ne plu fremda inter la japanoj kaj ĉinoj. La jaroj pasigitaj en Japanio por la blinda verkisto iĝis la plej feliĉaj en lia vivo. Liaj japanaj amikoj zorgis pri li, donis multe da atento.** Samtempe estis publikita

Vasilij Eroŝenko en la „Nakamura-ya salono“ ludas violonon, lin akompanas Sōma Kokkō. Laŭ opinio de Masahiro Gonoji fotis verkisto Shibusawa Seika (1889–1983) (retaliro: https://kulturologia.ru/blogs/240818/40220)

Vasilij Eroŝenko (la tria de dekstre) ĉe la kunveno de la literatura rondo „Tsuti no kai”. Tokio, 1921 (retaliro: https://persons-info.com/persons/EROSHENKO_Vasiliji_IAkovlevich)

la dua verko de Eroŝenko „Pluvego“ („Ame ga huru“). Kiel asertas Mine Yoshitaka, la rakonto estis unue verkita en Esperanto kaj al la japana tradukita de Akita-Ujaka.

En la aŭtuno de 1927, Vasilij Eroŝenko denove estis en Moskvo, kaj la 7-an de novembro – en la Ruĝa Placo, kie oni solene festis la jardekon de la Oktobra Revolucio. Kaj inter la gastoj el eksterlando li renkontis sian amikon Akita-Ujaka. Estis granda ĝojo por ambaŭ. Amikoj ne disiĝis dum preskaŭ unu jaro. Akita ekvolis pli ekkoni la landon, por ke li poste povu priskribi siajn impresojn. Ili kune vizitis Leningrad, Niĵnij Novgorod, Minsk kaj Kazan (*Панков*, 2017).

En 1962 kaj 1972, en du temploj de la hejmurbo de Akita Ujiaku, Kuroishi (黒石市, Kuroishi-shi), estis starigitaj al li monumentoj (retaliro: https://kuroishi.or.jp/english/ujaku-akita-memorial-hall).

La homaro estas unu familio

La bahaajn ideojn al Vasilij Eroŝenko konigis Agnes Baldwin Alexander, (1875–1971), esperantistino, la unua sekvantino de la bahaa kredo en Havajo, kiu vivis en Japanio dum 1914–1938 kaj 1950–1967. Vasilij Eroŝenko ĉiam miris pri la aventuroj de sia vivo, sed unu el tiuj li nomis miraklo: „En renkontiĝo de esperantistoj en Ĝenevo, Ŝarapova renkontis Agnes Alexsander, usonaninon, filinon de la fama sciencisto. Mi ne povas klarigi kial nome al Ĝenevo trafis la usonanino, kiam vojaĝis al Japanio el Havajaj Insuloj, kie ŝi loĝis kun sia patro, kiu ĝis la lastaj tagoj de sia vivo estris la Universitaton de Honolulu. A. Ŝarapova petis, ke ŝi trovu min en Tokio, serĉu esperantistojn. Tiel mi aperis en la bruplena loĝejo de Agnes, kiun ŝi luis en la domo apud la monto Kudanzaka. Bahaanoj renkontiĝis kun sinjorino Alexander ĉiusemajne. Ŝi estis virino kun firma volo, memfida, kaj havis konsiderindan kapablon persvadi. En ŝiaj predikoj estis multaj allogaj ideoj, super kiuj regis la plej konata – la homaro estas unu familio"... (citita laŭ *Поляковский* 2000).

Agnes, en sia salono konatigis gastojn kun bahaismo, aperinta en Irano meze de la 19-a jarcento. La adeptoj de ĉi tiu religio, fuĝante de la persekutado de la ŝaha registaro en Irano, propagandis demokratiajn ideojn pri homa egaleco, forigo de militoj kaj strebo al ĝenerala edukado. Verŝajne, pro tiu kialo la bahaismo populariĝis ekster Irako, precipe inter la progresemaj japanaj intelektuloj kiuj serĉis manierojn por plibonigi sian socion. Ankaŭ Vasilij Eroŝenko ne evitis tiun modon kaj iĝis subtenanto de la bahaa religio (*Харьковский*, 1978). Laŭ la diktado de Agnes, Vasilij Eroŝenko tradukis al Esperanto fragmentojn el la verkaro de la pioniroj de la bahaa kredo. En 1916 en Tokio estis publikigita mistika bahaa verko „Kaŝitaj Vortoj", traduko de Eroŝenko el angla

Vasilij Eroŝenko kaj Agnes Alexander, Tokio, 1915 (retaliro: http://miresperanto.com/pri_esperantistoj/jeroshenko.htm)

Vasilij Eroŝenko (la tria de maldekstre) inter la japanaj amikoj, 1914 (retaliro: http://www.belgorodbiblioteka.ru/Files/osikov.htm)

lingvo al Esperanto. En renkontiĝoj de japanaj esperantistoj de la verkisto deklaradis multajn bahaajn ideojn, precipe multaj de ili sonis en la tria kongreso de esperantistoj, kiu okazis post longa paŭzo en majo de 1916 (*Усова*, 2020). Akita-Ujaka, Kamichika Ichiko kaj Torii Tokujiro ankaŭ estis disĉiploj de la bahaa religio. Bahaaj ideoj respeguliĝis en la fabeloj de Eroŝenko.

La amikeco inter Agnes Alexander kaj Vasilij Eroŝenko estis utila por ambaŭ. La energiplena Agnes entiris Vasilij en la grupon de japanaj esperantistoj, konigis al li la bahaan kredon. Vasilij Eroŝenko helpis al Agnes lerni la brajlajn alfabetojn de angla kaj Esperanto, konatigis ŝin kun blinduloj en Japanio kaj kun ĵurnalisto Akita-Ujaka, kiu unu el la unuaj informis japanojn pri la bahaa kredo tra gazetaro. Oni povas supozi, ke bahaismo iagrade influis la mondkoncepton de Vasilij Eroŝenko.

Vasilij Eroŝenko en japana literaturo aperis kiel matura verkisto. Akita-Ujaka, redaktante la teatraĵon-fabelon de Eroŝenko „La persikkolora nubo“, skribis al la aŭtoro: „Mi devis korekti nur kelkajn fragmentojn, kiuj estis verkitaj en la antikva japana. Ĉio alia elverŝiĝis el Viaj lipoj kvazaŭ neelĉerpebla fonto de kreemo“ (*Удзяку*, 1962, 175). La fabelo „Pluvas“ ne estis en Rusio nek tradukita, nek publikigita, ĉar en ĝi la aŭtoro parolas pri la „komunumo de ĉiuj religioj“ kaj pri tio ke, depende de perceptoj de homoj, la monda spirito povas esti enkorpigita en Kristo, Mohamedo aŭ Budho“ (*Харьковский*, 1978, 70).

„Mi oferus unu jaron de mia vivo por ke mi ekvidu ĉi tiun portreton“

La junan verkiston Vasilij Eroŝenko famigis portretoj pentritaj samtempe de japanaj artistoj Nakamura Tsune kaj lia studento Tsuruta Gorō, en 1920.

Oni rakontas, ke ĉe unu fervoja stacidomo en 1920 rekonis Vasilij Eroŝenko la japana pentristo, grafikisto, vojaĝanto Tsuruta Gorō, (鶴田　吾郎, 1890–1969). Ĝis 1920 Tsuruta Gorō vojaĝis kaj laboris en Koreio, Manĉurio. La pentristo petis konsenton de Vasilij ke tiu pozu dum pentrado de la portreto. La verkisto konsentis. Eksciinte pri tio, lia instruisto, pentristo Nakamura Tsune (中村彝, 1887–1924), kiu pentris laŭ la eŭropa stilo, ankaŭ ekdeziris krei la portreton de jam fama verkisto. La deziroj de ambaŭ artistoj estis plenumitaj – Vasilij Eroŝenko pozis por ambaŭ en la ateliero de Nakamura Tsune. Aliaj samtempuloj asertas, ke la portretoj de Vasilij estis pentrataj en la salono de „Nakamura-ya”. „Li venis ne sola. Mi konatiĝis kun lia amiko. Ne mirinde, ke ankaŭ li estis artisto. Male ol Gorō, Tsune Nakamura havis atelieron kien li kondukis min. Tiel samtempe du portretoj naskiĝis. Nu, kiu, Libelo, sonĝis pri tia honoro? Ili turmentis min ekzakte unu semajnon, kaj tagon post tago mi pli firmigis mian gravecon. Tiutempe, mi ne povis kompreni kial Nakamura laboris kun tia fervoro, preskaŭ ĝis elĉerpiĝo. Gorō ĉiufoje avertadis: diradis, lasu ĝin por morgaŭ, la portreto estas finpentrita, vi difektos ĝin per troigo... En la Imperiestra ekspozicio oni parolis nur pri mia portreto, se ne amara novaĵo, ke ĝi estis la lasta pentraĵo de Nakamura-san. La kandelo de lia vivo degeliĝis kaj li sciis ke li prenas la penikojn por la lasta fojo“ (citita laŭ *Поляковский*, 2000).

La memportretoj de Nakamura Tsune (retaliro: https://ja.m.wikipedia.org/wiki/AB:Nakamura_Tsune_-_Self-Portrait_-_Google_Art_Project.jpg)

N. Tsune. Portreto de sinjoro Eroŝenko, 1920 (retaliro: (retaliro: https://tiflo.info/blogs/zhil-puteshestvoval-pisal/)

T. Gorō. Blinda Eroŝenko, 1920 (retaliro: https://belstory.ru/goroda/belgorod/zhizny-i-deyatelynosty-v-ya-eroshenko-v-issledovaniyah-ego-sovremennikov-i-utchenikov.html)

Afiŝo de la ekspozicio „Malliberulo de fabela sonĝo“ dediĉita al la 130-a naskiĝdatreveno de Eroŝenko, kie estas uzita reproduktaĵo de la portreto pentrita de N. Tsune (retaliro: https://afishka31.ru//img/actions/ico/29598.jpg)

Portreto de V. Eroŝenko pentrita de N. Tsune en 2D formato, kiun blinduloj povas ekkoni tuŝante per manoj (foto de Oleg Ševtsov, retaliro https://www.belpressa.ru/culture/iskusstvo/30291.html)

La laboron de tiuj du japanaj artistoj – kreadon de portretoj de Vasilij Eroŝenko – priskribis ankaŭ Eduard Pashniov: „Al Tsuruta Gorō ne ĉio sukcesis tiel kiel li deziris. Li eĉ devis forviŝi la unuan skizon kaj rekomenci la laboron denove. Por Nakamura Tsune, tio estis signifa arta malkovro. La plej grava afero en la portreto estas la okuloj, rigardo, kiu transdonas la menson kaj humoron, la grandanimon de la homa naturo, sed Vasilij Eroŝenko estas blinda, kaj nome tio fariĝis la ĉefa esenco de la portreto. Nakamura Tsune desegnis larĝe malfermitan malfiksan kolumon de kamparana ĉemizo, altan sulkigitan frunton de Eroŝenko, vangojn, en kiuj kiel tristaj cikatroj estis gravuritaj profundaj sulkoj kaj abundajn, buklajn kiel lupolo harojn, flugantajn ien, kvazaŭ ne estus haroj, sed nuboj. Sed la nuboj eksterordinaraj – vekantaj maltrankvilon, kvazaŭ avertantaj pri ŝtormo. La impreson plifortigis tio, ke la fono kunfandiĝis kun la hararo kaj servis kiel daŭrigo de ĝi. Ŝajnas, ke se homo ekrigardos el sub ĉi tiuj nuboj – tio estos ne rigardo, sed fulmo, estos tondro. Sed la homo ne povas ekrigardi, ĉar li estas blinda" (*Пашнев*, 1971).

Poste, la „Portreto de sinjoro Eroŝenko" de Nakamura kaj la bildo de Tsuruta Gorō „Blinda Eroŝenko" estis ekspoziciitaj en la arta ekspozicio de la imperiestra palaco (*Горо*, 1962). La portreto de Vasilij Eroŝenko, pentrita de Tsune Nakamura,

estis ekspozicita en la II-a printempa ekspozicio de Akademio de Belartoj en Tokio kaj en 1922 – en la Japana Arta Ekspozicio en Parizo, (*Панков*, 2017).

Viktor Pershin, unu el la studentoj de Vasilij Eroŝenko kaj esploristo de liaj agadoj, priskribas tiun portreton jene: „La rigardon senvole altiras la alta frunto de la pensulo. Sur la vizaĝo estas reflekto de eterna malĝojo pro preskaŭ de naskiĝo fermitaj blindaj okuloj. La malsupra parto de la vizaĝo estas iom malpli esprimplena – la buŝo fermita kaj pri forta volo atestas la konturoj de la mentono, kiuj eliras kvazaŭ el disfalanta nebulo, lumigita per la interna flamlumo. Harfaskoj de neregeblaj blondaj bukloj enkadrigas la trajtojn de la vizaĝo de poeto. Tiel Vasilij Eroŝenko estis pentrita de japana Renoir Nakamura Tsune“ (*Першин*, 1991).

Eguchi Kiyoshi skribis ke „Portreto de sinjoro Eroŝenko“ de Nakamura Tsune estas la plej fama lia verko, agnoskita kiel la plej bona olea pentraĵo ekde la disvastiĝo de Okcidentaj artlernejaj verkoj en Japanio“ (citita laŭ *Харьковский*, 2012). La olea portreto de Vasilij Eroŝenko pentrita de Nakamura Tsune estas konsiderata la plej bona kaj la lasta verko de la artisto. Ĝi estas gardata en la Nacia Muzeo de Moderna Japana Arto en Tokio inter pli ol 13,000 verkoj de diversaj ĝenroj. **Vasilij Eroŝenko diris, ke li oferus unu jaron de sia vivo por ke povus vidi ĉi tiun portreton.** En 1974 por memorfesti la kvindekan datrevenon de la morto de Nakamura Tsune en Japanio tiu portreto estis en grandega kvanto eldonita kiel kolora litografio. Oni mencias, ke tiu ĉi portreto estis publikigita ankaŭ en la formato de poŝtkarto (*Панков*, 2017).

22-an de aprilo 2020, en Belgorodo, en la ekspozicio dediĉita al la 130-a datreveno de la naskiĝo de Vasilij Eroŝenko estis prezentita „Portreto de sinjoro Eroŝenko“ de Nakamura Tsune en 2D-formato, kiun ankaŭ blindaj vizitantoj povas rigardi per siaj manoj. La estrino de la domo-muzeo de Vasilij Eroŝenko en Stary Oskol, Tatjana Novikova diris, ke la ideo krei palpe percepteblan version de la portreto de Vasilij Eroŝenko ĉe muzeistoj aperis antaŭ kelkaj jaroj: „En nia domo-muzeo, ni havas altkvalitan ciferecan kopion de la portreto de Eroŝenko sur kanvaso. Tamen ni volis, ke la revon de Eroŝenko vidi la portreton realigu la hodiaŭaj blinduloj. Laŭ nia mendo, la portreto estis produktita en 2D tekniko en la blindul-centro, kiu specialiĝas pri produktoj por viddifektitaj kaj blindaj homoj“ (citita de *Шевцов*, 2020). Laŭ T. Novikova la bildon oni povas vidi tuŝante la reliefajn konturojn. Restas nur bedaŭri, ke Vasilij ne havis la eblecon konatiĝi kun la palpa versio de sia portreto.

Portretojn de Vasilij Eroŝenko kreis ankaŭ artistoj: A. P Biriukov, V. V. Golyšev ir P. S. Šliapnikov, M. Kuprejev, V. Kuzmin, A. I. Mamontov, E. A Kacman, R. Rudolph A. Sachatova kaj skulptistoj O. Blažkov, E. Dzindra, V. I. Dudnik, T. Fiodorov, V. Kolesnikov, E. Medatova, A. Pokotiuk kaj aliaj artistoj.

Unu el la plej interesaj portretoj de Vasilij Eroŝenko estis kreita en 1990 de la pentristoj Valerij Golyšev kaj Pavl Šliapnikov por speciala regiona ekspozicio, dediĉita al la 100-a datreveno de la verkisto. Priskribante ĉi tiun bildon, la artsciencistino

E. Kacman. Vasilij Eroŝenko, 1930 (retaliro: el www.belgorodbiblioteka.ru)

M. Kupreev. Vasilij Eroŝenko (retaliro: https://homsk.com/martin/svetlyj-put-vasiliya-eroshenko-v-polnoj-temnote)

A. Mamontov. Vasilij Eroŝenko (retaliro: http:// www.belgorodbiblioteka.ru)

V. Goliŝev, P. Ŝliapnokov. Fragmento el la portreto de V. Eroŝenko, 1990 (foto de neidentigita fotisto)

E. Medatov. Vasilij Jeroŝenka, 1989
(foto de neidentigita fotisto)

Bustoj de V. Eroŝenko kaj L. Zamenhof, kreitaj per penado de Fonduso de Vasilij Eroŝenko „Espero". Galerio de famaj homoj ĉe la fundo de la Nigra Maro (foto de neidentigita fotisto)

Bustoj de V. Eroŝenko kaj L. Zamenhof, kreitaj de la skulptisto T. Fjodorov (iniciato de bonfara fonduso „Espero", foto de neidentigita fotisto)

Ilustraĵo de neidentigita aŭtoro por la novelo de A. Poliakovskij „Blinda pilgrimo“ (retaliro: https://www.smartaids.ru/catalog/product/polyakovskiy-a-slepoy-piligrim-o-v-ya-eroshenko-v-7-knigakh/)

Irina Shapovalova rimarkas, ke ĝi estas portreto de juna viro kun ondanta hararo kaj gitaro en la manoj. La figuro estas prezentata en cirklo sur malhelverda fono. En la anguloj de la pentraĵo estas pentritaj: rompita floro, fajro, floranta branĉeto de sakuro, bildo de vilaĝo. Unuavide, ĉio estas ordinara kaj simpla. Tamen ĉiu detalo de la bildo rakontas pri la vivo de Vasilij Eroŝenko. La cirklo reprezentas la tutan vivociklon, komencantan en infanaĝo kaj finiĝantan en la lastaj jaroj de la vivo. Uzante ĉi tiujn simbolojn, artistoj rakontas la fatalajn okazaĵojn en la vivo de poeto. En la malsupra maldekstra angulo – la rompita floro, simbolas infanaĝon kaj perdon de vidkapablo – unu el la plej doloraj batoj de la sorto. En la supra maldekstra angulo – bildo de fajro, memoriganta la malfacilajn lernejajn jarojn en la Moskva Lernejo por blinduloj, la periodon kiam formiĝis personeco kaj estis elektita la vivovojo. En la supra dekstra angulo, sur la fono de hela ĉielo, la artistoj prezentis branĉon de floranta sakuro kun sur ĝi sidantaj birdoj. Tio estas la alia etapo de la vivo de Vasilij Eroŝenko – gastado en Japanio. La branĉeto de sakuro en la portreto iĝis simbolo de feliĉa periodo de la vivo de la verkisto. En la malsupra dekstra angulo estas prezentita kampara pejzaĝo: kliniĝinta barilo, la inundataj herbejoj, pri kiuj la lando de Obuĥovka estis fama, la horizonto kun la maltrankviligaj rebriloj de la sunsubiro, soleca bovino, ĉio tio estas kvazaŭ saluto de infanaĝo. Tiel fermiĝas la cirklo... En la centro de la komponaĵo – portreto de la verkisto. Antaŭ ni estas juna, kreiva homo. Vasilij tenas en la manoj gitaron per kiu li ŝatis ludi. La pentristoj transdonis la subtilan spiritan staton de la verkisto pentrante la tenerajn, iomete longigitajn fingrojn, per kiuj li tuŝas la gitarkordojn. Iom taŭzata en vento ondanta hararo kaj spiritplena vizaĝo. Ne tuj ni komprenas, ke artistoj bildigis blindulon. La blindecon pentristoj prezentis tre subtile. La okulojn ili kaŝis en ombroj, tiel detirante la atenton de rigardanto for de handikapo, emfazante lian majestan figuron, personecon kaj amon al

vivo. Unu el la ĉefaj kaŝitaj simboloj de la pentraĵo estas la malhelverda koloro, kiu ĉirkaŭas la tutan komponadon. La verda koloro ne hazarde estas elektita. Vasilij estis esperantisto, kaj la simbolo de Esperanto – verda kvinpinta stelo, kiu helpis lin vojaĝi tra la mondo, renkonti interesajn homojn kaj bonajn amikojn, kiuj subtenis lin dum la tuta vivo. Tial, la verda koloro dominas en la portreto unuigante la komponadon. (Шаповалова, 2020). Tiu portreto estis transdonita al la Arta muzeo de Stary Oskol en 1991. Dum kelkaj jaroj, la pentraĵo estis provizore konservata en la domo-muzeo de Vasilij Eroŝenko en Obuĥovka. Poste, ĉi tiu artverko revenis al la Arta muzeo de Stary Oskol (Rusio) kaj estas elmontrata en temaj ekspozicioj.

Krom la supre menciitaj aŭtoroj portretojn de Vasilij Eroŝenko pentris ankaŭ aliaj artistoj. Bedaŭrinde, ne ĉiuj tiuj verkoj trovis lokon en la domo-muzeo de verkisto en Obuĥovka. En 2000, festante la 110-an datrevenon de la naskiĝo de Vasilij Eroŝenko, Viktor Perŝin transdonis al la muzeo eseon el sia nova, ankoraŭ nepublikigita libro, „Portreto sur silko". En tiu libro li mencias portreton de Vasilij Eroŝenko, pentritan de ne konata ĉina pentristo ĉirkaŭ 1923 kaj malaperintan en la mezaj naŭdekaj jaroj de la 20-a jarcento. Portreto estis pentrita laŭ antikvaj ĉinaj tradicioj uzante la teknikon de pentrado sur silko. La portreto estas valora ankaŭ pro tio ke laŭ ĉinaj pentrotradicioj sur la pentraĵo, krom la nomo de la artisto, estas kutime indikitaj la loko kaj dato. Alivorte, la mankanta portreto povus malkaŝi kelkajn nekonatajn paĝojn el la vivo de la verkisto en Ĉinio (*Пискаль*, 2012).

H. Ekaku. La blinduloj transiras la ponton
(foto el la persona arkivo de la aŭtoro)

Amhistorio aŭ kvarangulo de amo

Kutime oni multe parolas pri romantikaj rilatoj de famaj homoj. Pri Vasilij Eroŝenko oni scias tre malmulte laŭ tiu ĉi aspekto. Vasilij konis multajn famajn reprezentantojn de kulturo, arto, kaj politiko en la tiama Japanio. Eblas rakonti ne pri klasika ama triangulo, sed pri la ama kvarangulo, kiu aperis en la vivo de Vasilij Eroŝenko: Vasilij enamiĝis al Ichiko Kamichika, ŝi amis Ōsugi Sakae, kaj li amis Ito Noe. Por ke legantoj pli bone komprenu kiaj homoj patoprenis en ĉi tiu kvarangulo de amo, jen iliaj mallongaj biografioj.

Ichiko Kamichika (神近 市子, 1888–1981) – japana ĵurnalistino, feministo, verkistino, tradukistino kaj kritikistino. Ŝi naskiĝis en Nagasako, studis en universitato, partoprenis en la agadoj de „Bluŝtrumpa Societo“ (*Bluestockings*). „Bluŝtrumpa Societo“ – feminisma organizaĵo, kiu unuigis klerajn, intelektajn virinojn. La origino de tiu ĉi movado reiras al la 18-a jarcento, kiam „Bluŝtrumpa Societo“ estis fondita en Anglio. Tiun societon estris la kritikistino Elizabeth Montagu (1718–1800). Post diplomiĝo, Kamichika laboris kiel instruistino en la lernejo por knabinoj de Aomori prefektejo, tamen estis maldungita pro la partopreno en tiu societo. En 1914 ŝi iĝis ĵurnalistino de la gazeto „Ĉiutagaj Novaĵoj de Tokio“. Ichiko Kamichika iĝis proksima kun anarkiisto Ōsugi Sakae. **En 1915, dum konflikto, ŝi ponardis Ōsugi Sakae kaj estis kondamnita al kvar jaroj da malliberejo**, sed post apelacio, ŝi restis malliberigita nur du jarojn. En la jaro 1919, liberigita de malliberejo, Kamichika laboris por revuo „Nyonin Geijutsu“. En 1920 ŝi geedziĝis kun Atsushi Suzuki kaj ili havis tri infanojn. En 1935 kun sia edzo Suzuki komencis eldonadi la literaturan revuon „Fujin Bungei“. Ĝi estis la eldonaĵo en kiu siajn verkojn publikigis virinoj verkistinoj. Post la milito, Ichiko Kamichika komencis aktivi en politikaj organizaĵoj. En 1953, dum balotoj al japana parlamento, ŝi estis elektita al La Ĉambro de Reprezentantoj, kie ŝi komence reprezentis la maldekstran socialistan partion de Japanio, poste la socialdemokratian partion. Ŝi multe klopodis, ke en Japanio estu akceptita leĝo de prevento de prostituado. Ŝi emeritiĝis en 1969. Ichiko Kamichika mortis la 1-an de aŭgusto en 1981, en la aĝo de 87 jaroj. Dum sia vivo ŝi tradukis multajn librojn, mem verkis librojn „La nuntempa virino legantino“ (1930), „Kritiko de la seksualaj problemoj kaj solvo de ili“ (1933), „Pri geedzeco“ (1948), „Historio

de virina penso“ (1951), „Aŭtobiografio: mia amo kaj miaj bataloj“ (1972) kaj aliajn librojn (retaliro: https://www.lib.city.minato.tokyo.jp/yukari/e/man-detail.cgi?id=30).

Ito Noe (伊藤 野枝, 1895–1923 – japana anarkiistino, socialkritikistino, verkistino kaj feministino. Ito naskiĝis en 1895, en familio de aristokratoj, en la suda insulo Kyushu. Post fino de studoj ĉe „Lernejo por knabinoj de Ueno“, ŝi estis devigita, kontraŭvole, edziniĝi en sia hejmvilaĝo. Ŝi baldaŭ fuĝis al Tokio. En Tokio ekde la 1870 agadis de Hiratsuka Raichō fondita „Bluŝtrumpa Societo“, kiu eldonadis revuon „Bluaj Ŝtrumpoj“, en kiu virinoj havis spacon por evoluigi siajn literaturajn, estetikajn kaj politikajn kapablojn. Ito aliĝis al tiu grupo en 1913 en la aĝo de 18 jaroj, kaj de 1915 ĝis 1916 fariĝis unu el la redaktoroj de la revuo. Ŝi konis kelkajn lingvojn, inkluzive la anglan, tradukadis la artikolojn de anarkiistino Emma Goldman pri la situacio de virinoj. Ito poste edziniĝis al la verkisto Tsuji Jun (辻潤, 1884–1944), kiu en 1912 estis ŝia instruisto en la lernejo, sed en 1916 ŝi forlasis lin pro la pasia amromano kun la karisma anarkiisto Ōsugi Sakae. Ito kaj Ōsugi sekvis la regulojn de libera amo. Ōsugi tiutempe havis amaferon kun la anarkiistino Ichiko Kamachiko. **Bedaŭrinde, la teoriaj konceptoj de libera amo koliziis kun la homa ĵaluzo: Kamachiko atakis Ōsugi per tranĉilo kaj grave lin vundis.** La amaskomunikiloj uzis tiun incidenton por kondamni Ito, Ōsugi, kaj Kamachiko por iliaj malmoralaj agoj kaj pro la anarkiisma movado. (*Heath*, 2006).

Ōsugi Sakae (大杉　栄, 1885–1923) estis la radikala japana anarkiisto, li publikigis amason da artikoloj en anarkiismaj periodaĵoj, helpis traduki la verkojn de Okcidentaj anarkiistoj al japana lingvo. En 1906 li kreis la unuan Esperanto-lernejon en Japanio. Li, Itō Noe, kaj nevo Soichi Tachibana pereis en la tiel nomata Amakasu-incidento. Reĝisoro Kiju Yoshida en 1969 produktis nigreblankan artan filmon „Eroso + Murdo“ pri la vivo de Ōsugi (retaliro: https://en.wikipedia.org/wiki/%C5%8Csugi_Sakae).

Ichiko Kamichika (1888 ÷ 1981) ĵurnalistino, feministino, verkistino, tradukistino kaj kritikistino
(retaliro: https://www.lib.city.minato.tokyo.jp/yukari/e/man-detail.cgi?id=30)

En la hejmo de usona esperantistino Agnes Alexander Vasilij renkontis dudeksepjaran **Ichiko Kamichika**. Inter ŝi kaj Vasilij komenciĝis sincera amikeco. Sciante, ke al junulo mankas mono, ŝi petis lin rakonti fabelon, kiun ŝi poste skribis en la japana kaj proponis al unu revuo. Tiel komenciĝis la verkado de Vasilij Eroŝenko en Japanio. Poste, la similan helpon li ricevis de Akita-Ujaka. **Eblas, ke Vasilij la atenton, kompaton kaj sinceran helpon de Ichiko taksis kiel amon kaj li mem enamiĝis ŝin.** Sian sekretan amon li nomis Libelo kaj ofte parolis kun ŝi en sia menso. „Efektive, la saĝulo pravis, kiam diris, ke oni ne povas deziri pli ol tio, kio estas al vi destinita. La sorto donis al mi en tiu tago vin, Tombo. Vi tre ekmiris, ke mi konas

tiun ĉi vorton, kiu signifas libelon. Tamen mi ankaŭ sciis tion, ke mi ne diferenciĝas de la japanoj, kiuj kredas, ke libeloj sur la travideblaj flugiloj alportas al homoj bonŝancon. Mia mirinda amiko Akita-Ujaka rakontis al mi kion li aŭdis de sia blinda patro: evidentiĝas, ke Japanio iam estis nomata la lando de la libelo, kaj la bonŝancon portanta Tombo estis perceptata kiel nacia simbolo“ (citita laŭ *Полаяковский*, 2002). La verkisto ĉiam estis ĉirkaŭita de amikoj: „Mi dankas la sorton, ke neniam mankis al mi amikoj. Tamen eĉ en amikeco estas la certa grado de malfermiteco kaj proksimeco. Kiu sciis ĉion pri mi, Libelo? Kompreneble, Akita-Ujaka. Ĝis la lasta spiro, mi estos dankema kaj sindonema, pro lia sinteno al mi. Mi komencis nomi vin Libelo. Aspektas, ke tio enkorpigas kuraĝon kaj nacian spiriton... Tiel mi trafis en la bruan loĝejon de Agnes. <...> Mi ŝatis ŝian gastamon, mi estis ĉarmita de ŝia voĉo, kaj se en ŝia loĝejo foje ne aperus ĵurnalistino de la revuo el Tokio, mi certe restus kaptita de la ĉarma bahaa misiistino. Dio mia, kiel mojosa vivo povas ŝanĝiĝi en nur unu minuto, Libelo! Vi iris al Agnes, sed vi venis al mi, kaj mi perdis la kapon“ (citita en *Поляковский*, 2001).

En Japanio en 1911 fondita la literatura revuo „Bluaj Ŝtrumpoj“ („Seitō“) ekzistis ĝis 1916 kaj donis al japanaj feministoj kreivan kaj politikan platformon, eĉ dum tiu tempo kiam ĝi alfrontis koleron de socio kaj registaran cenzuron.

Ŝajnis al Vasilij, ke Ichiko reciprokas liajn sentojn ĉar ili ĉie aperadis kune. Ne estas klare, ĉu Vasilij komprenis, ke ŝi tiel agis dezirante veki la ĵaluzon de sia vera amato, Ōsugi Sakae, kiu jam forlasis sian familion pro ŝi. Por helpi al Ōsugi, Kamichika hipotekis sian havaĵon kaj eĉ siajn personajn aĵojn. La sensacia historio – atako per tranĉilo, okazis kiam Vasilij Eroŝenko ne plu estis en Japanio, sed post reveno el Sudorienta Azio li vizitadis Ichiko en la malliberejo kaj tio estis vera provoko por tradicia publika opinio. Post tio ili vivis kune dum iom da tempo. Vasilij amis tiun ĉi virinon. Profunde en sia koro, li havis la esperon krei familion: „Foje, neatendite, Akita-Ujaka demandis min: „Diru al mi, Ero-san, <...>, ĉu vi planas geedziĝi kun Libelo?“ Kiam mi parolis al mi mem, mi provis eviti tiun demandon, sed en tiu momento mi devis respondi. Pardonu, mi murmuris kaj diris, ke tia penso neniam venis en mian kapon. Li, iom konfuzita pro mia mensogo, tusetis. Mi aldonis: „Akita-Ujaka, pripensu vi mem! Kia geedzeco? Kian rajton mi havas kondamni la virinon? Esti edzino de blindulo – tragika sorto, ne ĉiu povas decidi fari tion... Se vi ne estus apud, Libelo, apenaŭ mia nomo aperus sur la presitaj paĝoj en Japanio. Mi ne scias, ĉu ekzistas alia ekzemplo en la literatura praktiko, kiam la aŭtoro skribas en unu lingvo, poste diktas la tradukon al alia lingvo, kaj amikoj, registrinte la tekston laŭ la voĉo, redaktas kaj portas ĝin al la redakcio. Ni aldonu, ke la verkisto mem estas blinda kaj nur povas vidi la specialan, konveksan punktipan litertipon per siaj fingropintoj” (citita laŭ *Полаяковский*, 2000).

Al homoj de arto ĉiam gravas ke ilia verkado estu rekonita. Tegmenton kaj manĝaĵon oni bezonas ĉiutage, tial ni povas imagi la ĝojon de Vasilij, kiam li ricevis la unuan honorarion de la revuo „Espero“ pro la novelo „Rakontas paperlanterno“. Kiel oni diras, „Espero“ donis la esperon, kiu tiutempe estis por Vasilij pli valora ol mono.

Ichiko Kamichika, Ōsugi Sakae kaj, Noe Ito (retaliro: http://bukvoid.com.ua/digest/2013/10/14/220544.html)

„Vi (Ichiko – V. G.) vizitis min ĵus antaŭ la foriro al Siamo. Vi vidis la unuan fojon, ke mi modlas. Mi volis modli vian kapon, sed ŝajne ĝi ne sukcesis, se vi ne rekonis vin. Akita-Ujaka silentis – li sciis, pri kies imago mi interesiĝas... Iam kun orkestro mi vizitis la Nigran Maron, kaj tie, en hotelo, la arkitekto montris al mi belan malnovan skulptaĵon. Post kelkaj jaroj mi havis la okazon tuŝi la skulptaĵon de Rodin „Kapo". Se mi sukcesas tuŝi, mi povas ion diri pri tio. Kiam mi komencis modli el argilo, mi komprenis: ĝin oni devas trakti kun respekto, ĝi viviĝas en la manoj" (citita laŭ *Поляковский*, 2000). Samtempe modli komencis ankaŭ la samtempulino de Vasilij Eroŝenko, vidkapablon perdinta baletistino Lina Po (fakte, *Полина Михайловна Горенштейн* 1899 – 1948) kiu poste iĝis fama skulptistino. Jen kiel ĵurnalisto Georgij Kustov priskribas la krean procezon de la blinda baletistino. Elektinte la temon proponitan de la vivo, Lina Miĥajlovna vartis ĝin dum longa tempo, pripensante ĉiujn detalojn de la bildo. Tiam, laŭ ŝiaj vortoj, komenciĝis la plej dolora procezo de skulptado en la menso. Kutime nokte ŝi skulptis figuron, portreton aŭ komponaĵon en sia menso en la sama sinsekvo kiel ŝi poste estos farita per manoj. Tiamaniere ŝi kreis multajn skizojn sen tuŝi la materialon. Lina Miĥajlovna diris, ke en tiuj tagoj ŝi laciĝis pli ol dum modlado (*Кустов*, 1978, c. 71).

La amhistorion de Vasilij rakontas al la vizitantoj ankaŭ Jevgenija Usova, la estrino de la regiona literatura sektoro de la Muzeo en Staryj Oskol je la nomo de A. Puŝkin. En la eldonaĵo „Se ne miaj amikoj" ŝi notis, ke Vasilij Eroŝenko en ĉiuj landoj amikiĝis kun bonegaj homoj. Kamichika Ichiko estis unu el la plej interesaj japanaj virinoj de la 20-a jarcento. Kuraĝa, kredanta je pli brila estonteco, poste iĝinta parlamentanino, ŝi en la sesdekaj jaroj atingis ke estu malpermesita prostituado. En 1916 ŝi estis juna, pasia, amis ne blindan komencantan verkiston, sed belulon anarkiiston, fondinton de Japana Asocio de Esperantistoj Sakae Ōsugi, kiu amis alian junulinon – ankaŭ anarkiistinon Noe Ito. La kvarangulo de amo donis nenion bonan. Post kiam Sakae Ōsugi revenis aI Ito Noe, Kamichika vundis lin per tranĉilo kaj trafis en malliberejon. Post kelkaj jaroj Sakae Ōsugi kaj Noe Ito estis murditaj de ĝendarmoj.

Kiam Kamichika trafis la malliberejon ĉiuj forturnis sin de ŝi, nur blinda poeto vizitadis ŝin en prizono kaj portis la manĝon. Poste, kiam ŝi estis liberigita, Vasilij Eroŝenko memoris: „Sed mi atendis la feliĉan tagon. Tio estis la fino de la unua semajno de oktobro. Kiel estis interkonsentite, Akita-Ujaka venis al mi frumatene. Post rapida manĝo ni iris al la malliberejo Hachioji por renkonti vin, Ichiko, kiam via dujara puno finiĝis. Nia amiko luis aŭton. Pluvis. La vojo ŝajnis senfina. Ni veturis silentante. Ne ekzistas vortoj por esprimi kiom mi sopiris kaj timis ĉi tiun renkontiĝon kun vi. Sed vi, mia belulino prizonulino, ankaŭ ĉi tie vi estis la plej bona, vi estis natura kaj sincera, kvazaŭ nenio okazis kaj neniu disiĝo estis, ne estis tiuj teruraj du jaroj malantaŭ la kradoj. Mi sciis, ke japanoj havas specialan sintenon pri krizantemoj, kaj mi alportis al vi bukedon da ruĝaj kaj purpuraj floroj. Mi esperis: ke per la lingvo de krizantemoj, vi komprenos ke mi deklaras amon ĝis la fino de mia vivo. Vi ĝojis pro la floroj, sed vi diris la frazon, kies signifon mi longe ne komprenis. Vi diris: „Kiam la krizantemoj floros, nenio restos en la mondo, sekve, venis la vintro." Akita-Ujaka, aŭdinte tion, ridis, kontenta: Tombo, vi estas fidela al vi mem, same kiel antaŭe plenŝtopita per proverboj. Trovu ne tiom malgajan, Ichiko. Vi estas en libero!" (citita laŭ *Полаяковский*, 2000).

Ne kuraĝante eldiri siajn sentojn per vortoj, la verkisto esprimis ilin okaze de ŝia naskiĝtago en donacita al Kamichiko japanlingva novelo „Rakontas paperlanterno". Tiu ĉi verko estis publikigita en la januara numero 1916, de revuo „Waseda Bungaku". Ŝajnas, ke Ichiko ne havis planojn pri Vasilij: „Neniu havas rajton kondamni vin pro viaj agoj, Libelo. Vi estas via propra juĝisto. Mi diris tion post unu jaro ekde kiam vi forlasis la malliberejon, kiam vi decidis edziniĝi. La aŭtuna ĉielo priploris nian amon, la pluvo frapadis la fenestron dum la tuta nokto, kaj subite ĉesis la minuton antaŭ la tagiĝo, kiam vi, karesante mian kapon, kvazaŭ konsolante infanon, petis permeson edziniĝi al Atsushi Suzuki. Nur poste mi komprenis, ke la gutoj ne ĉesis frapadi la vitron: la mesaĝo estis surdiga. Kion mi povus diri? Ial mi estis certa, ke tiu ĉi lasta, al ni apartenanta nokto estis la komenco de nova vivo" (citita laŭ *Полаяковский*, 2000).

„<...> Revoj rekondukis Eroŝenko al la pasinteco, tien kie li plej volis esti nun – en malgrandan dometon ĉe la vojo, ne for de la Aoyama knabina lernejo, kie loĝis Kamichika Ichiko. Li estis kun ŝi antaŭ nelonge – nur tri tagojn antaŭ la aresto. Ŝi kuŝis en la lito: ŝi ankoraŭ ne refortiĝis post la nasko. Kamichika montris al li sian filinon. Vasilij tuŝetis per fingroj laŭlonge de kapeto de la novnaskita, kaj la knabino kaptis lian fingron.

– Vidu, – li diris gaje, – la knabineto tuj divenis, ke mi amas vin. Kiel vi nomis la knabinon?

Ŝi ankoraŭ ne havas nomon.

– Bonvolu nomu ŝin Nina, diris li kaj laŭte ekridis. Per tiu nomo, kara al lia koro, li ankaŭ nomis sian Kamichika (citita laŭ *Харьковский*, 1978).

Vasilij Eroŝenko ankoraŭ antaŭ ĉiuj tiuj malĝojaj eventoj forlasis Japanion kun rompita koro. **Pri Japanio, li diros: „Tro malmulte da tero kaj tro multe da feliĉo“** (citita laŭ *Усова*, 2020).

La amhistorion de Vasilij Eroŝenko konfirmas ankaŭ la konservita rakonto de la ĵurnalisto Aleksandr Ĥarkovskij: „Foje, en la redakcio de la revuo „Ĉirkaŭ la mondo“ („Вокруг света“), kie mi tiam laboris, eksonoris la telefono. „Parolas Ichiko Kamichika. Mi konis Vasilij. Jes, sufiĉe proksime. Ĉu ni povus renkontiĝi Mi serĉas lin.“

Virino de rara beleco, kvankam ne plu en sia unua juneco Ichiko Kamichika, parolis pri la vivo de Eroŝenko en Japanio, alludis, ke li estas la patro de ŝia filino, kiu ricevis la rusan nomon Nina. Ŝi petis, min trovi Eroŝenko, vivan aŭ mortan, kaj tiam donacis la librojn, kiujn li skribis en la japana kaj Esperanto. Ĉio komenciĝis de tiuj libroj. Unu el ili nomiĝis „Ĝemo de unu soleca animo“, alia – la biografia rakonto „Paĝo el mia lerneja vivo“ (*Харьковский*, 2012). Aliaj homoj kiuj konis Eroŝenko asertas, ke Vasilij ne havis infanojn. El la publikaĵoj disponeblaj al ni, restas malklare, ĉu Vasilij Eroŝenko sciis, ke li havas filinon. Se li sciis, tiam oni povas imagi la kordoloron de homo, kiu estis devigita forlasi sian amatan virinon kaj filinon milojn da kilometroj for.

Oni scias, ke verkisto lasis la kopirajtojn de siaj verkoj al Ichiko Kamichika. Ekscii-nta, ke Vasilij bezonas monon, Kamichika sendis al li monon ricevitan kiel honorarioj.

„Eroŝenko, kiel asertas la japana verkistino Hirabayashi Taiko, enamiĝis al Ichiko Kamichika. Tamen, ĉi tiu sento ne ŝajnis kiel ordinara pasio, pli kredeble ĝi estis sekreta flamo de la animo. Se paroli pri Ichiko Kamichika, ŝi amike komunikis kun la blinda junulo, plej verŝajne sentis kompaton, sed tio ne estis sento, kiun oni povus nomi amo“ (citita de *Харьковский*, 1978, p. 65). Eble estas bone, ke la blinda junulo tion ne komprenis ja kompaton li plej maltoleris.

Vasilij Eroŝenko restis dankema dum sia tuta vivo al la japanoj pro ilia sincereco kaj altruismo. Vasilij skribis: „Memorante, mi devas diri, ke miaj japanaj amikoj savis min ne unfoje kaj ne dufoje. Kaj kvankam Konfuceo diris en siaj senmortaj „Konversacioj kaj juĝoj“, ke nobla viro pensas pri la ĝusta vojo kaj ne pensas pri manĝaĵo... Sed multfoje, multfoje kiam estis problemo, vi, mia denaska Japanio, rapidis helpi, kiel la montara spirito Okami, kiu protektas kontraŭ cent katastrofoj. Dio mia, kiom ofte mi sopiras pri vi, la mizerikordaj homoj! Vi vivas en mia koro, kaj mi sentas min pli bone pro la penso, ke kiam ĝi haltos, almenaŭ en unu japana domo estos fajrigita memorfajro nokte dum la festo de Dio...“ (citita laŭ *Поляковский*, 2000). Eblas fari kuraĝan supozon, ke Kamichika, kiu postvivis Vasilij per preskaŭ tri jardekoj, ekbruligadis, memorante pri li, la memorfajron dum la festo de Dio.

La amo de Vasilij al Kamichika memorigas la pentraĵon „Blindaj homoj transiras la ponton“ de japana artisto, kaligrafo, poeto, budaista monaĥo Hakuin Ekaku (白隠慧鶴, 1686–1769), kiu prezentas blindulojn singarde marŝantajn trans valo sur ponto, kies alia fino ne apogas sin sur io ajn...

Socia aktivado kaj pasio por vojaĝoj

Vasilij Eroŝenko komencis prelegi en universitatoj de Tokio kaj Waseda. Li konatigis studentojn kun la rusa literaturo, analizis la verkon de Leonid Andrejev, la tropojn de virinoj en la rusa literaturo. En la somero de 1916, lia artikolo „La imago de virino en la moderna rusa literaturo“ estis publikigita en la revuo „Waseda Bungaku“. Li ricevadis multajn konsilojn de sia amiko, japana ĵurnalisto Fukuoka Seiti.

Post iom da tempo Vasilij Eroŝenko komencas prelegi ankaŭ pri politikaj temoj. Post vivo en Japanio iom pli ol du jarojn, en julio de1916 li foveturis al Siamo (nun – Tajlando)

Li revenis al Tokio la 3-an de junio, 1919. Tiutempe multaj amikoj de Vasilij aktive partoprenis en la politika vivo de la lando kaj kreis Socialistan Ligon. En la sama jaro Vasilij Eroŝenko aliĝis al la Socialisma Ligo de Japanio. En tiu ĉi lando, Vasilij Eroŝenko fariĝis membro de la revolucia movado, faris paroladojn en la kunvenoj de la societo, partoprenis en la laboro de la II-a Kongreso de la Socialisma Ligo. R. Belousov rimarkas, ke por Vasilij Eroŝenko estis proksima la tiel nomata grupo de humanismaj verkistoj, al kiu apartenis Akita-Ujaka kaj aliaj samideanoj. En la unua numero de la revuo „Tanemaku hito“ („La semanto“) oni mencias la nomon de Vasilij Eroŝenko. R Belousov atentigis pri la simileco inter la deklaracio publikigita en ĉi tiu revuo kaj lia fabelo „La saĝa tempo“ aperinta poste, jam en Pekino. R. Belousov supozas, ke Vasilij Eroŝenko kun la ĉefaj asertoj de la estonta deklaro konatiĝis jam antaŭ la forpelo de li el Japanio kaj mem partoprenis preparante tiu ĉi dokumenton (*Белоусов*, 1961).

Pro la konstanta polica persekutado Vasilij Eroŝenko translokiĝas de Tokio al Osako. Printempe de 1920, Universitato Waseda invitis lin por instrui, sed polico tuj malpermesis tion. Tamen Vasilij denove revenis al Tokio kaj daŭrigis la literaturan laboron. Tiutempe li publikigis siajn plej bonajn verkojn: „Koro de la Aglo“, „La Legendo de Birmo“ kaj aliajn. Dum tiu tempo Vasilij Eroŝenko multe koncertis, instruis Esperanton, publikigis eseojn, novelojn, satirajn fabelojn en diversaj revuoj. Per si mem kreskis la rondo de la amikoj.

En 1921, sub la redaktado de Akita-Ujaka estis publikigitaj, en la japana, du kolektoj de la verkoj de Vasilij Eroŝenko „Kanto de tagiĝo” („Yoakemae no uta“) kaj „La lasta Suspiro” („Saigo no tameiki“). La plej multaj el tiuj libroj malaperis dum la plej forta tertremo en septembro de 1923. Nun tiuj libroj iĝis la bibliografia raraĵo. En 1924, en Tokio, sub la redaktado de ĵurnalisto Fukuoka Seiichi estis eldonita la tria kolekto de verkoj „Por la homaro” („Zinrui no tameni“). Vasilij Eroŝenko tiam ne plu estis en Japanio.

En la majo de 1921 okazis la dua celebrado de la Unua de Majo en historio de Japanio. Vasilij ankaŭ partoprenis en la manifestacio organizita de la Socialista Ligo.

Vasilij Eroŝenko kun ĵurnalisto Fukuoka Seiti, Japanio (retaliro: https://bel.cultreg.ru/articles/257/slepoi-piligrim-vasilii-eroshenko)

Li havis proksimajn amikojn inter la japanaj socialistoj. Tiam Vasilij Eroŝenko estis membro de la Societo por la Studado kaj Antaŭenigo de Socialismo kaj kune kun aliaj, revis elŝiri la socion, la ŝtaton, la homaron el la manoj de la riĉuloj, por ke eblu sur la Tero disvolvi ĝardenon de libereco. Post kelkaj tagoj la Dua Kongreso de la Socialista Ligo estis dispelita. Multaj el ĝiaj partoprenantoj, inkluzive de Eguchi Kiyoshi kaj Vasilij Eroŝenko, trafis en la policon. Ili baldaŭ estis liberigitaj. La 28-an de majo, 1921 la Socialista Ligo de Japanio estis malpermesita. En tiu tago, Vasilij Eroŝenko denove estis arestita. Du tagojn poste, la japana ministro pri internaj aferoj komunikis specialan ordonon forsendi Vasilij Eroŝenko el la lando. Estas donita la arestordono por aresti Vasilij Eroŝenko, sed liaj amikoj kaŝas la poeton en privata domo. Tiutempa japana leĝo malpermesis al la polico transpaŝi la sojlon de domo se oni ne povis prezenti kulpigon al la domposedanto. La ĝendarmoj ne ignoris ĉi tiun leĝon – ili rompis la muron, batis la poeton kaj ĵetis lin en malliberejon.

Laŭ Eguchi Kiyoshi, la polico traktis lin pli malbone ol vagabondan hundon. La policanoj, pridubante lian blindecon, krude disŝiradis liajn palpebrojn. La amikoj de Vasilij eĉ renkontiĝis kun la ministro pri internaj aferoj, kiu subskribis la ordonon forsendi Vasilij Eroŝenko, sed tio ne helpis. Al demando pri kaŭzo de la forpelo, ili ricevis malklaran respondon: „Li faris malbonan influon". (citita laŭ *Харьковский*, 2012). La forsendo de Vasilij Eroŝenko elvokis la grandan publikan indignon. Sinjorino Sōma Kokko, kun la helpo de Eguchi Kan, iniciatis kriminalan proceson kontraŭ la administracio de la loka gubernia distrikto. La policestro estis devigita demisii.

Pro la suspekto pri bolŝevismo, la 4-an de julio 1921 (laŭ aliaj aŭtoroj – en majo), la japana polico, ne permesante adiaŭi siajn amikojn kaj kolekti siajn posedaĵojn, metis Vasilij Eroŝenko en la vaporŝipon irantan al Vladivostoko. De Vladivostoko, Eroŝenko provis trapenetri al Soveta Rusio, sed nur post du monatoj li atingis Ĥabarovsk kaj pro la militagoj tie, li estis devigita turni sin al Ĉinio.

Vasilij Eroŝenko en Japanio loĝis kun paŭzoj dum sep jaroj – de 1914 ĝis 1921. Ĉi tie li formiĝis kiel subtila simbolisma verkisto, poeto, aŭtoro de fabeloj kaj satiraj

En la unua vico de maldekstre dekstren: artisto Takehisa Yumeji (1884–1934), kun balalajko enmane estas la estonta sportmajstro pri luktado Naruse Kanji (1888–1948). En la dua vico de maldekstre dekstren dramisto Akita-Ujaka (1883–1962), Vasilij Eroŝenko tenante gitaron en la mano kaj aliaj (retaliro: https://www.jp-club.ru/Vasilij-eroshenko-koncert-v-mito-okonchen/)

alegorioj, publika aganto. La tuta eldonkvanto de jam presita en Japanio tria kolekto „Por homaro“ aŭ „Por la bono de homaro“ kun verkoj de Vasilij Eroŝenko pereis en la fajroj post la Tokia tertremo la 1-an de septembro, 1923. Tamen, unu ekzemplero konserviĝis ĉe la redaktisto de libro kaj kompilinto de tiu kolekto, Fukuoka Seiichi. La respekto de la japanaj amikoj al Vasilij Eroŝenko estis tiom granda, ke eĉ post la ruiniga katastrofo en Tokio, surbaze de la sola pluviva kopio, nur jaron poste (en 1924), estis ripetita eldono de tiu kolekto. Post la deportado de la verkisto, liaj amikoj, kun grandaj klopodoj, publikigis ankoraŭ du librojn de Vasilij Eroŝenko: „Yoakemae no uta“ („Kantoj antaŭ la tagiĝo“) kaj „Saigō no tameiki“ („La lasta suspiro“) (*Аникеев, Такеда*, 2017).

En Japanio, en 1959, estis eldonita trivoluma kolekto kun verkoj de Vasilij Eroŝenko: la unua volumo enhavis verkojn en la japana, la dua volumo – en Esperanto, kaj la tria volumo – artikolojn kaj memoraĵojn de samtempuloj. Inter 1979 kaj 1996 en Japanio aperis sesvoluma kolekto de la verkoj de Vasilij Eroŝenko en Esperanto (*Полонский*, 2013). En 1995 en Japanio estis eldonitaj en Esperanto kvar fabeloj de Vasilij Eroŝenko, kreitaj komence de la sesdekaj jaroj, verkitaj brajle kaj konservitaj de Zinaida Ŝamina kaj Anatoly Masenko: „Tri ĝemeloj“, „La ĉiela“, „Alikhan la malkuraĝulo“, „La kruĉo da saĝeco“ (*Патлань*, 2020). **La cetera parto de arkivo de la verkisto malaperis. La bibliotekon, lasitan de Vasilij Eroŝenko al la primara organizo de la Tutrusia Unuiĝo de Blinduloj en Stary Oskol, ĝia tiama prezidanto, Vladimir Bogdanov bruligis, ĉar li timis havi eksterlandajn librojn kaj revuojn en brajlo. Kaj iam nome Vasilij Eroŝenko savis tre junan blindiĝintan tankiston Bogdanov de pensoj pri memmortigo kaj helpis lin eniri la Kurskan muziklernejon por blinduloj**. (*Патлань*, 2020).

La pasio vojaĝi kaj la deziro helpi blindulojn en aliaj landoj invitis la malkvietulon verkiston Vasilij Eroŝenko denove al vojo. Vojaĝojn al Siamo (nun Tajlando) kaj Birmo (nun Mjanmao) pagis Agnes Alexander. En 1916 Tajlando estis dividita al tri partoj – brita, franca kaj regata de Tajlando. Birmo estis nur provinco de Brita Hindio. Lastatempe malkovritaj dokumentoj de la Internacia Kongreso de Blinduloj, okazinta en Londono somere de 1914 en kiuj pri Vasilij parolis liaj britaj amikoj William Merrik kaj William Fillimore, permesas kompreni, ke Vasilij Eroŝenko serĉis laboron en Brita Hindio. Ĉi tie, same kiel en Britio, eŭropano, scipovanta la anglan kaj havanta la bazojn de speciala pedagogio pri la instruado de blinduloj, povus labori kiel instruisto en fondita de misiistoj bazlernejo por blinduloj. Dum la konferenco en Westminster, estis sciigite, ke Misiista Lernejo por Blinduloj de Anne Esquith en la Sudhinda ŝtato de Madraso, serĉas blindan instruiston. Eble pro tio Vasilij Eroŝenko provis lerni la tamilan en Moulmein (*Усова*, 2020).

Post la fino de la dujara kurso pri masaĝterapio ĉe la Tokia Lernejo por Blinduloj, Vasilij Eroŝenko la 3-an de julio 1916. foriras al tiutempa Siamo. Ĉirkaŭ tricent amikoj

kolektiĝis por akompani lin. Vasilij, starante sur la ferdeko de la ŝipo, mantenis tricent striojn de papero ligantajn lin kun la amikoj sur la havena kajo.

Pri tiu vojaĝo oni scias malmulte. Post alveno la verkisto ekloĝis en la domo de tailandano Bunjo. Vasilij Eroŝenko alvenis al Tajlando tiutempe, kiam en tiu lando oni komencis limigi la agadon de ĉiuj eksterlandanoj. Eble tial lia plano fondi blindullernejon estis kondamnita al fiasko. Ĉu Vasilij Eroŝenko sciis pri tio? Estas apenaŭ kredeble. Li sentis, ke ĉiuj liaj provoj frontas la reziston, sed li ne komprenis kialon de tio. Jam en aŭgusto 1916, Vasilij Eroŝenko skribis al siaj amikoj en Japanio ke li renkontis neatenditajn malfacilaĵojn provante fondi lernejon por blindaj infanoj. Li klopodis kolekti la rondon da samideanoj. Dezirante kolekti monon por la agado de tiu ĉi rondeto, li dum vesperoj ludadis per gitaro en rusa restoracio.

De la letero de Vasilij Eroŝenko al Torii Tokujiro: „Bangkoko, aŭgusto, de 1916. Unue mi pensas krei grupeton ĉi tie (ne por blinduloj, sed por tiuj, kiuj solvas la problemojn de blinduloj). Se tion mi sukcesos, mia celo estos atingita... Due, mi volas kolekti monrimedojn por tiu ĉi rondeto. Trie, mi planas sendi du aŭ tri adoleskantojn al Japanio aŭ kunporti ilin kun mi por ke ili ricevu la edukon tie. Reveninte al Siamo, ili povos labori kun blinduloj. Tiaj estas miaj modestaj planoj“ (citita laŭ *Харьковский*, 2012). Tamen tiuj planoj ne havis destinon realiĝi. Vasilij Eroŝenko planis vojaĝojn al Hindio, li volis viziti Javon. Eblas imagi kiom surprizitaj estis la oficiroj, kiam tiu ĉi alta, blanka fremdlandano alparolis ilin en ilia denaska taja lingvo. La malsukceson de tiu vojaĝo povis influi ankaŭ tio, ke Vasilij Eroŝenko ofte blinde fidis homojn kaj ne scipovis adaptiĝi al la realo. Naiva idealisto dolore travivis la fiaskojn spertitajn en tiu lando.

Aliaj fontoj asertas, ke post la rezisto de la aŭtoritatoj, li rezignis pri la ideo fondi la blindullernejon kaj pasigis du monatojn vojaĝante tra Tailando kun grupo de blinduloj, provante siajn instrumetodojn – li instruis ilin legi kaj skribi brajlon, kaj mem notis tajlandan folkloron (*Muraŝkovska*, *Мурашковский*, 1986–1987).

Ekzistas fontoj kiuj asertas, ke Vasilij Eroŝenko tamen fondis en tiama Siamo la unuan blindullernejon kaj ke tie estis starigita monumento al li. Bele sin esprimis pri tiu ĉi monumento, kiu plej verŝajne ne ekzistas, E. Paŝniov, verkisto el Voroneĵo: „Se homoj unue inventis legendon kaj poste ekkredis ĝin, tiam ne estas bezono veni por kontroli ĉu ekzistas monumento al Vasilij Eroŝenko en Tajlando aŭ ne. Ne gravas, ke ĉi tiu skulptaĵo ne havas aŭtoron kaj ne ekzistas, la monumento ankoraŭ staras, ĉar multaj homoj volas ĝin. Kaj nun tiu ĉi monumento staros eterne, ĉar legendo estas farita el materialo pli longedaŭra ol bronzo, granito aŭ marmoro. Aŭ eble, vere, iu senespera skulptisto, riskante, skulptis el ordinara ŝtono iom retroklinitan kapon kaj larĝajn ŝultrojn de la vojaĝanto, kaj nun Vasilij Eroŝenko staras en la ombro sub iu ekzotika arbo, en tiu malproksima lando Siamo kaj ĉiuj, kiuj preterpasas – lernejanoj kaj poŝtistoj, instruistoj kaj kamparanoj – metas la ekzotikajn florojn ĉe liaj piedoj” (*Пашнев*, 1971).

N. Blaĵkov. Busto de Vasilij Eroŝenko (foto de neidentigita fotisto)

E. Dzindra. Busto de Vasilij Eroŝenko (foto de neidentigita fotisto)

Vasilij Eroŝenko restis en Tajlando proksimume ses monatojn: li mallonge laboris kiel masaĝterapiisto en unu el la rusaj restoracioj de Bangkok, provis kontribui al la organizado de blindullernejo. Ne havante la necesan financan kaj organizan subtenon, ne subtenita de eŭropaj misiistoj, Vasilij Eroŝenko foriris al Birmo. La unuan blindullernejon en Tajlando fondis nur en 1938–1939 Genevieve Caulfield (1888–1972). Al tiu ĉi blinda monaĥino, kiu havis la similan sorton, apud la blindullernejo kiun ŝi fondis. staras monumento kreita en 1983. Kial tiu virino sukcesis fondi la blindullernejon en Tajlando? Du kialoj videblas: ŝi estis usonanino kaj subtenis la lernejon per siaj propraj financoj.

En januaro de 1917 Vasilij Eroŝenko alvenis, al Mijanmaro. Li ekloĝis en la lernejo por blindaj knaboj, fondita de misionistoj de ordeno de Sankta Aŭgusteno en Moulmein, en tiama Birmo de Brita Hindio. La lernejon en 1900 fondis la blinda birma advokato kaj baptista instruisto Maung Pe Gyu. Tiutempe la lernejon estris la komitato kiu inkludis reprezentantojn de la urbestraro, baptistojn kaj anglikanajn misiistojn. Vasilij maltrankviliĝis tiutempe, ke eĉ malgranda parto de blinduloj, kiuj diplomiĝis el lernejo en Rusio, ankoraŭ ne povis trovi laboron, kaj estis neeble por blindaj muzikistoj vivteni sin per ludado. Vasilij Eroŝenko komprenis, ke la edukado de blinduloj en Rusio atingis sakstraton, eĉ la instruistoj de blinduloj ne sciis, kion fari kun la lernantoj, kiam ili finos la bazlernejan kurson. En Rusio, la universitata eduko ankoraŭ ne estis atingebla por blinduloj, kvankam jam ekzistis esceptoj. Tia escepto estis Aleksandr Ŝĉerbina (1874–1934), kiu post akcidento perdis la vidkapablon en la aĝo de tri jaroj kaj en 1918 li ricevis la titolon de profesoro (*Патлань*, 2020). Cetere, Aleksandr Ŝĉerbina estis la unua blinda profesoro en tiutempa Rusio.

La alveno de Vasilij Eroŝenko iĝis sensacio. Vojaĝanta sen akompananto, li aspektis kiel klarvida sanktulo, kiu havis scion pri tradicia medicino, akupunkturo, kaj konis multajn sakralajn budhismajn tekstojn. Li ellernis la

lingvon de ĉi tiu lando en kelkaj semajnoj. Li parolis flue la anglan kun oficistoj de registaro, la birman kun birmanoj kaj la palian kun monaĥoj. Li studis budhismon, birman folkloron, registris legendojn kaj fabelojn, kiujn sendis al Japanio por publikigo. Al Vasilij Eroŝenko estis ofertita la posteno de direktoro de blindullernejo en Moulmein. Rezigninte tion, li restis ordinara instruisto kaj serĉis blindajn lernantojn en birmaj vilaĝoj. Estis malfacile persvadi gepatrojn lasi sian blindan infanon studi. Tion fari helpis la pli kleraj ol gepatroj monaĥoj (*Панков*, 2017).

La nova instruisto instruis al la blindaj infanoj muzikon, la arton de masaĝo kaj kiel „vidi" kaj ekkoni la mondon. Vasilij Eroŝenko ricevis permeson vojaĝi tra la lando kun blindaj lernantoj, vizitis multajn urbojn. La lernantoj nomis lin ne „takin" (majstro), kiel aliajn instruistojn – sed „kokoji" (la pli aĝa frato) (*Харьковский*, 1978).

Vasilij skribis de Birmo al amikoj en Japanio: „Nun mi studas vere belajn budhismajn legendojn. Tio estas neelĉerpebla materialo. Antaŭ mi malfermiĝis tute nova, ĝis nun ne konata al mi mondo. En mirindaj rolantoj oni kaŝas misteran, mistikan signifon... La diaĵo aperanta en ĉi tiuj sinsekvaj mondoj povas enkarniĝi, kaj la lasta, kvina, enkarniĝo de la diaĵo aperas en ĉi tiu mondo. <...> kristanismo, islamo kaj aliaj religiaj doktrinoj aspektas kiel naivaj infanaj fabeloj. Eĉ se mi loĝus ĉi tie dum mia tuta vivo, mi tamen sentus min tute profano" (*Ерошенко*, 1977). Vasilij Eroŝenko el Birmo skribis al siaj amikoj, ke li enamiĝis al birmanoj, ligiĝis al la blindaj lernejanoj, kiuj reciprokis per amo al li. La instruisto kaj lernantoj prizorgis unu la alian kiel pli aĝaj kaj pli junaj fratoj. Vasilij Eroŝenko estis fascinita de belaj budismaj legendoj. Antaŭ la vojaĝanto malfermiĝis nova, ne esplorita mondo. En monaĥejoj, li notis birmajn legendojn kaj rakontojn, kiuj poste estis publikigitaj en japanaj revuoj por junuloj. En novembro de 1917, en Birmo eksciinte pri la Februara revolucio en Rusio, kiu, laŭ lia opinio, devus alporti al homoj feliĉon kaj liberecon, la verkisto decidas reveni al sia patrujo je ajna prezo. Li vojaĝas al Hindio, esperante de tie reveni hejmen. Li ne suspektis, kiom longa kaj malfacila estos tiu ĉi vojo hejmen. En marto de 1918, li sukcesas reveni al Birmo, kie li denove instruis en la blindullernejo, skribis kaj redaktis budhismajn legendojn.

Disputo kun Rabindranath Tagore

Restis malmulte da informoj pri tio, kion faris Vasilij Eroŝenko en Hindio. Post la revolucio, li ĉesis ricevi monon de siaj gepatroj el Rusio (*Патлань*, 2020). En novembro de 1917, li per vaporŝipo venis al Kalkato, kaj de tie intencis atingi Rusion. Pro politikaj kialoj, la britaj aŭtoritatoj en Hindio malhelpis lin foriri. Li vizitis la lernejon por Blinduloj en Kalkato, volis eklabori tie, sed ne ricevis la permeson. Vasilij Eroŝenko pasigis la tutan vintron en Hindio, studis la hindan lingvon.

Fine de 1918, Vasilij Eroŝenko, akompanata de Lev Lapitskij kun ties edzino kaj Israel Sosnovik, estis en Shantiniketan, vizitis la faman hindan poeton, komponiston, dramiston, publikan aganton, gajninton de la Nobelpremio pri Literaturo Rabindranath Tagore (bengale: *Robyndronath Thakur*; 1861–1941) kun kiu li konatiĝis ankoraŭ en Japanio, kiam tiu en Tokio prelegis pri la diferencoj inter Orientaj kaj Okcidentaj religioj kaj kulturoj. Ankoraŭ en tiu tempo, inter ili ekestis sensacia disputo. Vasilij Eroŝenko kontestis la ĉefan tezon de Tagore, ke okcidenta civilizo estas pure materia, dum la hinda kulturo estas pure spirita. Vasilij Eroŝenko asertis, ke al hinda filozofio ne estas fremda la materialeco. Akita-Ujaka menciis tion en sia taglibro, kaj poste la japana esploristo de la verkaro de Vasilij Eroŝenko, Takasugi Ichiro, skribis pri tio en sia libro „Blinda poeto Eroŝenko". A. Ĥarkovskij detale priskribis tiun ĉi disputon:„– Vi devus esti kristano" – diris Tagore, ĝuante la scion de sia blinda kontraŭulo. – Tiam la budhana lamao kontraŭdiru vin. „Ne, mi ne estas religiema", – respondis Eroŝenko. – Vi sciu ke mi havas mian propran sintenon al la eklezio. – Nekredanto? – surpriziĝis Tagore. – Sed kio maltrankviligas vin en nia disputo? – Ŝajnis al mi, ke vi surbaze de budhismo kaj kristanismo kontraŭstarigas Eŭropan kaj Azian kulturojn. Same kiel R. Kipling skribis: „Okcidento estas Okcidento, Oriento estas Oriento, kaj ili ne povas kuniĝi." Do, mi ne povas konsenti kun tio. Niaj kulturoj havas multon komunan, kaj se ni ne ĉiam komprenas unu la alian, tio estas pro tio ke ni ne konas la lingvojn. Same pro nacionalistoj, kiuj malamikigas homojn... „Rakontu pri vi, kiu vi estas, – fine de la interparolo demandis la hinda verkisto. „Antaŭ du jaroj mi venis el Rusio, mi skribas miajn fabelojn en la japana, kaj miaj kamaradoj nomas min japana poeto", – finis Eroŝenko, akompanata de tondraj aplaŭdoj de la publiko (*Харьковский*, 2012). En printempo de 1919, post la vizito de Vasilij Eroŝenko al la domo de Rabindranath Tagore, amiko de Tagore kaj redaktoro de liaj verkoj Charles Freer Andrews, publikigis en unu el la revuoj de Kalkato la paroladon de Vasilij Eroŝenko en angla lingvo „Kio estas blindeco" prezentitan jam la 2-an de novembro en 1917, en Moulmein (*Патлань*, 2020).

Rabindranath Tagore
(retaliro: https://sentencijos.eu/rabindranatas-tagore.html)

La hindan policon atingis la karakterizado de Vasilij Eroŝenko kiel anarkiisto, eventuale bolŝeviko. La verkisto estis gvatata kaj metita sub la hejmaresto. En decembro Vasilij Eroŝenko eskapis de la hejma-

resto. Ĉar restis tre malmultaj informoj pri la vivo de Vasilij Eroŝenko en Hindio, la aŭtoroj kiuj skribis pri tiu periodo fidas sian imagon: „Nokte, la polico invadis la hotelĉambron kie Eroŝenko loĝis. La verkiston ili puŝis kontraŭ la muro <...> kaj komencis traserĉi la paperojn. Ĉiuj personaj leteroj de li estis konfiskitaj kaj estis sendita cirkulero en kiu oni instrukciis la poŝtajn oficistojn transpreni la tutan alvenontan korespondadon de la danĝera ruso. Oni faris ĉion por izoli Vasilij Eroŝenko de la mondo. Ĉi-foje Hindio fariĝis kaptilo por la verkisto. Li mem ne plu povis foriri de tie eĉ al Birmo. Ekde nun, li povis esti nur deportita aŭ malliberigita. Dum certa tempo la amikoj de Vasilij Eroŝenko kaj li mem sendadis la leterojn al nenio, ne konsciante, ke ili korespondas kun la polica departamento. Eble eĉ nun, en la arkivoj de la Kalkata Polica Departemento, estas folioj de dika papero buntitaj brajle per la angla skribmaŝino“ (*Пашнев*, 1971).

Esplorante la vivon kaj kutimojn de la loĝantoj de Hindio, la verkisto vojaĝadis tra la lando, notis la hindajn legendojn en la japana, kiujn poste publikigis en la junulara revuo „Junulara klubo“ „(Seinen kurabu“). Vasilij Eroŝenko atingis urbon Bombajo, vizitis blindullernejon. Li ĉagreniĝis pro regantaj kastdiferencoj kiam blindaj studentoj de malsamaj kastoj manĝis aparte kaj se reprezentanto de malsupera kasto eĉ nur estis apud la manĝaĵo, ĝi fariĝis maltaŭga por la homoj de la pli alta kasto. Li eksciis, ke tiutempe en la tuta mondo la plej alirebla metio por blinduloj estis la farado de brosoj. En Hindio oni instruis tiun metion nur al blindulojn de la plej malsuperaj kastoj.

Post kelkaj monatoj Vasilij Eroŝenko denove estis arestita kaj resendita al Kalkato. La verkisto eksciis, ke de Kalkato al la japana haveno Kōbe devas foriri la japana ŝipo. Li multe klopodis, sed ne ricevis la permeson foriri per tiu ŝipo. Inter kvar muroj li sentis sin kiel en kaĝo. Plej verŝajne tiam naskiĝis la alegoria fabelo „La mallarĝa kaĝo“. Farante ĉi tiun supozon, Lusin skribis en la ĉinlingva nacia tagĵurnalo „Renmin Ribao“ („Kleriga ĉiutaga), eldonata en Ĉinio: „Mi amas la naivan poeton Eroŝenko, kiu parolas kontraŭ la sklava psikologio kaj kondamnas la barbaran kutimon de sati.“ (citita laŭ *Харьковский*, 1978). Satio estas la hindia funebra rita tradicio laŭ kiu vidvino devas esti kremaciita kune kun sia forpasinta edzo, sur speciale konstruita entombiga fajro. Nuntempe, ĉi tiu fenomeno estas malofta kaj malpermesita.

El la kelkaj restintaj de tiu tempo leteroj kaj dokumentoj de Vasilij Eroŝenko pri la historio de edukado de blinduloj en Hindio, eblas kompreni, ke verkisto volis viziti tiujn blindulajn lernejojn kiujn establis misiistoj, tiaj estis en Kalkato, Bombajo kaj Madras-ŝtato, en la sudo de Hindio. Lin interesis lernejoj fonditaj kaj gvidataj de blinduloj mem: en Kalkato – la blinda baptista pastro Lal Bihari Shah, en Ranguno – blinda anglikana pastro William Jackson, en Bombajo – blinda hindua kirurgo d-ro Nilkantrai Chattrapati. Ŝajnas ke li sukcesis vojaĝi tra la lando, li mem menciis la viziton al Bombajo, kaj li rakontis al sia studento Victor Pershin, ke li havis eblecon loĝi ĉe la marbordo de la Hinda Oceano kun perloĉasistoj. La vojaĝojn de Vasilij Eroŝenko al Tajlando kaj Birmo financis usona bahaa misiistino Agnes Alexander. Tamen, en novembro de 1917, du aferoj koincidis – Agnes forlasis Japanion kaj foriris al Usono, kaj en Rusio okazis Oktobra Revolucio, kiu radikale ŝanĝis la sintenon de la

kolonia brita registaro al rusaj civitanoj en Hindio. Vasilij Eroŝenko ĉesis ricevi leterojn kaj financan subtenon kaj de sia familio en Rusio kaj de Agnes Alexander. En Hindio li restis sen stabilaj vivrimedoj dum jaro kaj duono (*Патлань*, 2020). Oni povas supozi, ke kiam mono finiĝis, Vasilij Eroŝenko povis elturniĝi per siaj kapabloj pri masaĝoj kaj per muziko. Masaĝon bezonas multaj homoj, kaj rusaj restoracioj, kiuj funkcias en grandaj urboj de la tuta mondo, bezonis kaj muzikistojn, kaj kantistojn.

Estante en Kalkato ekde mezo de novembro de 1917 ĝis marto de 1918 Vasilij Eroŝenko dum iom da tempo loĝis en la hejmo de la fondinto de la Kalkata Lernejo por Blinduloj, la blinda baptista pastro Lal Bihari Shah, verŝajne invitita de ties filo Arun Kumar Shah. En tiu ĉi domo estis granda biblioteko kun multaj anglaj libroj presitaj en brajlo. Vasilij uzis tiujn librojn por sia memklerigo. Tiutempe, li skribis al siaj amikoj ke li vivas la studentan vivon. Oni scias, ke Vasilij Eroŝenko ĉeestis kunvenojn de teozofoj, kunvenojn de la Kalkata sesio de la Barata Nacia Kongreso kaj provis akiri permeson por forlasi la landon. Kiam tio malsukcesis, en marto de 1918 li denove revenis al la Blindullernejo Moulmein en Birmo kaj instruis tie ĝis mezo de septembro (*Патлань*, 2020). Tamen, pro la revolucio en Rusio ankaŭ en Birmo, li fariĝis la nedezirata persono. La tutan tempon estante tie li serĉis eblecojn por reveno al Rusio.

Komence de septembro 1918, li denove foriras al Hindio, esperante de tie atingi Rusion. Denove li atingas Kalkato, enloĝiĝas en la sama hotelo. Denove li estas gvatata, denove li estas sub la hejmaresto.

Post longa atendado kaj ne ricevinte permeson foriri, Vasilij Eroŝenko provokas sian elpelon el la lando: en kinejo, antaŭ la komenco de la seanco, li kantas „La Internacion", tradukante ĝiajn vortojn de angla kingvo al la bengala. Komence de junio 1919, aŭtoritatoj de Brita Hindio informis la registaron de Japanio, ke Eroŝenko, kiel bolŝeviko, estas deportota de Brita Imperio per brita militŝipo. La unua haveno kie la angla ŝipo haltis estis Singapuro. Tie, la gazetaraj raportistoj, leviĝinte per ŝipŝtuparo, interparolis kun Vasilij Eroŝenko kaj sekrete transdonis al li pakaĵeton kun antikvaj ĉinaj vestaĵoj kaj flava farbo por la haŭto. Blinda viro malaperis de ŝipo en la haveno de Ŝanhajo. Poste la gazetoj skribis, ke li eskapis kun sako sur la ŝultroj kaj gitaro sub la robo. Pri tiu fuĝo de blindulo konserviĝis du publikaĵoj: en majo de 1921 en la japana revuo „Verda Utopio" kaj dek kvin jarojn poste pri tio ankaŭ estis skribita en „Enciklopedio de Esperanto" (*Харьковский*, 1978). Estas ankaŭ alia versio, ke de Hindio Vasilij Eroŝenko vojaĝis tra la insuloj de Oceanio. Pli konvinka estas la versio, ke la 3-an de junio en 1919 la verkisto per kargoŝipo sekrete revenis al la Lando de la Leviĝanta Suno (*Рогов*, 1958). Kompensante la mankon de informoj pri la vivo de la verkisto en Hindio, la aŭtoroj, skribante pri tiu ĉi periodo, interplektas la verkojn de Vasilij Eroŝenko, eventuale skribitajn dum tiu periodo aŭ provokitaj de la okazaĵoj.

Estante ekster Japanio, Vasilij Eroŝenko ne forgesis nek la japanan lingvon, nek la landon mem. Al siaj japanaj amikoj, li konstante sendadis birmajn kaj hindajn legendojn, kiujn volonte publikigis la revuo „Kaiho" („Liberigo"), kaj aliaj revuoj kaj gazetoj (*Кучер*, 2016).

Ĉinio: amikeco kun ĉina literatura klasikulo Lusin

Alportita al Vladivostok,Vasilij Eroŝenko strebis kiel eblas plej rapide translokiĝi al la eŭropa parto de Rusio. Sed ne estis vojo antaŭen. En la regiono de la stacidomo Jevgenievka estis ampleksaj pozicioj de la taĉmentoj de blankgvardianoj Semionov kaj Kappel. Malantaŭ ili komenciĝis nenies lando, kie agis bandoj, atakante kaj blankulojn kaj ruĝulojn. Krome, al la vojaĝanto minacis armea tribunalo. La provo eniri la teritorion de Soveta Rusio estis malsukcesa. Li devis sin turni suden, al Ĉinio.

Se Japanion oni nomas Lando de la Leviĝanta Suno, tiam Ĉinio – Lando de Floroj. Ĉar la trajnoj ne funkciis, la junulo atingis Harbinon perpiede, paŝante sur la ŝpaloj. Unu someran tagon de 1921, laca, sen aĵoj, nur kun gitaro sur la ŝultro, li frapis la pordon de la domo kiu staris ĉe la rando de Ĥarbin, de sia japana amiko Nakane Hiroshi.

Invitita de Ĉina Esperanto-Societo la 1-an de oktobro, 1921 Vasilij Eroŝenko alvenis al Ŝanhajo (*Рогов*, 1958). Tiutempe loĝanta en Ŝanhajo japana esperantisto Kavakami, estis informita pri la alveno de Vasilij Eroŝenko, sed ne povis renkonti lin. Nur post kelkaj tagoj Kavakami kaj unu japana kuracisto trovis Vasilij Eroŝenko loĝanta en malmultekosta pensiono. Neidentigita japana kuracisto en Ŝanhajo donis tegmenton al la vojaĝanto. Julia Patlan, prezentante la vortojn de la lernanto de la verkisto Viktor Perŝin, rimarkas, ke en Ŝanhajo komence Vasilij Eroŝenko ricevis postenon kiel masaĝisto en virina banejo: „La hontemo de virinoj restis silenta, ne protestis kontraŭ la rigardo de blindaj okuloj“ (citite el *Patlan*, 2020b).

Ĉi tiu frazo memorigis al mi pri la konversacio en Tokio kun ĉiĉeronino, kiun ni nomis Katuri-san. Nia grupo de turistoj el Litovio estis markita per la numero kvar. La ĉiĉeronino demandis nin, kiel sonas la numero kvar en la litova lingvo. Juna, simpatia japana gvidistino tenis en siaj manoj longtenilan triangulan flagon kun la numero „4“, kiun ŝi mansvingis kaj invitante reen al la buso laŭte kriis „katuri, katuri, katuri“ Mi klopodis kiel eble plej ofte esti apud la ĉiĉeronino kaj daŭre demandadis pri blinduloj en Japanio. Ŝi neniam aŭdis la familian nomon de Eroŝenko. Parolante pri la blindaj masaĝistoj, mi demandis ŝin, kiujn masaĝistojn elektas ŝi. Ŝi ridetante respondis, ke ŝi estas masaĝata de blinda masaĝisto.

Ĉina aŭtoro Hou Zhiping en la artikolo „Eksterlandaj esperantistoj kaj la esperantista movado en Ĉinio“ skribas, ke en la aŭtuno de 1921 la fama blinda rusa poeto Eroŝenko alvenis al Ŝanhajo kaj faris multon por Ŝanhaja Esperanto-Societo. Jeroŝenko eksciis, ke tiu societo havas gravajn financajn malfacilaĵojn, tial organizis internacian muzikan feston, kie partoprenis muzikistoj el Rusio, Japanio, Koreio, Ĉinio. Dum la festvespero Jeroŝenko deklamis versojn skribitajn en Esperanto, akompanante sin per piano kaj kantis kantojn en Esperanto. Li pagis la lupagon de la salono kie okazis la festo kaj repagis la ŝuldojn de la societo, akirinte multajn librojn

en Esperanto kaj eksterlandajn periodaĵojn, li fondis malgrandan bibliotekon. (*Hou Zhiping*, retaliro: http://www.elerno.cn/movado/movado189.htm).

Ekde la oktobro 1921 ĝis la aprilo 1923, kun mallongaj paŭzoj, Vasilij Eroŝenko vivis en Ĉinio, multe kreadis, provis verki en la ĉina lingvo (*Мурашковска, Мурашковский,* 1986–1987). Tiutempe en Ĉinio estis eldonita la poemaro de Vasilij Eroŝenko „Ĝemo de unu soleca animo". En la enkonduka artikolo de la kolekto, la ĉina redaktoro prognozis, ke „la eleganta talento de la blinda poeto estos same vaste agnoskita en la Okcidento kiel en la Oriento". Efektive, ĉi tiu malgranda ciklo da rakontoj markis la komencon de la literatura famo de Vasilij Eroŝenko.

En Ŝanhajo, Vasilij Eroŝenko laboris ĉe la Instituto de Mondaj Lingvoj (*Патлань*, 2000), lernis la ĉinan, kunlaboris en progresemaj revuoj, publikigis librojn. Vasilij Eroŝenko memoris, ke en Ŝanhajo en 1921, li sentis sin kiel la kverkfolio priskribita de Lermontov, kiun ne akceptis la orienta platano. Eĉ en Rusio, li alfrontis dilemon: aŭ sekiĝi sur sia indiĝena branĉo, aŭ flugi kun la vento al fremdaj landoj. Vasilij Eroŝenko elektis la duan vojon. Sub la kontrolo de la polico, en Ŝanhajo, li verkis fabelojn pri velkinta folio, pri sklavino, pri rikiŝo viro – ĉevalo, pri knabino, kiun oni vendis al bordelo, por ke per ricevita mono eblu aĉeti medikamenton al ŝia frato, pri ĝibulo almozulo ktp. (*Харьковский*, 2012).

La ĉina aŭtoro Hou Zhiping en la artikolo „Eksterlandaj Esperantistoj kaj la Esperantista Movado en Ĉinio" skribis, ke Vasilij Eroŝenko venis al Pekino fine de 1921, invitita de sinjoro Cai Yuanpei. Li laboris kiel instruisto pri Esperanto en Pekina Universitato, la nombro de liaj aŭskultantoj iom post iom kreskis ĝis 500 aŭ 600 homoj. Krom instruado de Esperanto, li prelegis pri Esperanto-lingvo kaj Esperanto-literaturo ne nur en la universitato, sed ankaŭ ekster ĝi. Li verkis ankaŭ en Esperanto. La plej multaj el liaj paroladoj kaj verkoj estis tradukitaj al la ĉina lingvo kaj publikigitaj en tiutempaj gazetoj kaj aliaj periodaĵoj. Liajn verkojn volonte legis ĉinaj legantoj. En 1922, la 15-an de decembro Vasilij Eroŝenko en la Komuna Konferenco de Esperantistoj de la Pekina Universitato, kiun ĉeestis pli ol 2 000 partoprenantoj faris la pasian paroladon. En la konferenco li ludis pianon kaj kantis kantojn en Esperanto, kiuj kortuŝis la publikon. Dum tiu periodo Vasilij Eroŝenko ofte gvidis la laboron de Pekina Esperanto-Societo. En 1922 Vasilij Eroŝenko partoprenis en la XIV Internacia Kongreso de Esperantistoj en Helsinko kiel reprezentanto de Pekina Esperanto-Societo. Reveninte al Pekino, li raportis pri la granda konferenco al Pekina Esperanto Societo kaj estis elektita kiel sekretario de tiu ĉi societo (retaliro: *Hou Zhiping*, http://www.elerno.cn/movado/movado189.htm).

En tiu tempo en Pekina Universitato estis fondita la kolegio de Esperanto. La pli juna frato de Lusin, ĵurnalisto kaj verkisto Zhou Zuoren, same kiel multaj ĉinaj kulturaj agantoj de lia medio, estis esperantisto, kaj Lusin mem subtenis Esperanton. Vasilij Eroŝenko prelegis ankaŭ en la Virina Pedagogia Kolegio en Pekino (*Патлань*, 2020)

Lusin (Lu Xun) (retaliro: https://ru.wikipedia.org/wiki)

Vasilij Erošenko (en la dua vico, tria de maldekstre) kun la familianoj de Lusin (foto de neintentigita fotisto)

Vasilij Eroŝenko (en la centro de la unua vico) kun Lusin (unua de maldekstre en la unua vico) en 1922, en Pekina Esperanto-Societo (foto de Marco Sotgiu, retaliro: https://blogs.bl.uk/european/2014/12/i-raised-a-fire-in-my-heart-remembering-eroshenko.html)

Vasilij Eroŝenko, Fukuoka Seiti kaj nevo de Lusin. Pekino, 1922 (retaliro: http://www.Belgorodbiblioteka.ru/Files/osikov.html)

Vasilij Erošenko (kun bastono en la mano) inter ĉinaj esperantistoj, 1923 (foto el la artikolo de Hou Zhiping „Amikeco de Lusin ir Erošenko“)

Esperantistoj de Pekina Universitato. V. Eroŝenko (en la unua vico, kvina de maldekstre) kaj Lusin (ĉe lia maldekstro), Pekino, 1922 (retaliro: https://eo.wikipedia.org/wiki/Vasilij_Ero%C5%9Denko#/media/Dosiero:Eroshenko_en_Chinio.jpg)

Ekinteresita pri la sorto de la junulo, Lusin invitis lin loĝi al sia hejmo kaj fariĝis lia amiko, frato. Tamen, la junulo ankaŭ tie ne havis multajn amikojn. En Pekina Universitato li instruis kurson de rusa literaturo en Esperanto. Refoje la ĉinaj intelektuloj tradukadis la prelegojn de Vasilij Eroŝenko el la angla al la ĉina. Aliaj fontoj asertas, ke la rusa poeto laboris kiel Esperanto-instruisto en tiu ĉi universitato kaj okupis la postenon de profesoro. La edzino de Lusin estis japanino, do Vasilij Eroŝenko povis libere komuniki kun ŝi, gefiloj kaj ŝia fratino (*Сэйити*, 1962).

En 1921 la Ĉina nacia tutlanda instruista kongreso akceptis rezolucion pri la instruado de Esperanto en lernejo, tial ne estas mirinde. ke Esperanto estis instruata en Pekina Universitato. Vasilij Eroŝenko komunikis kun la studentoj en la angla, la japana kaj Esperanto. Al liaj kursoj, kiel ni jam menciis, aliĝis kvincent aŭskultantoj. Al Eroŝenko estis atribuita persono kiu legis por li kaj helpis prepari prelegnotojn. Tiutempe Vasilij Eroŝenko estis elektita kiel la sekretario de la Pekina Esperanto Ligo (*Пискаль*, 2012). Laŭ lia statuso de lektoro, Eroŝenko ricevis rikiŝon, sed li hontis uzi servojn de rikiŝo. La poeto uzis tiun ĉi servon laŭ propra maniero: li mem paŝis sur trotuaro kaj babilis kun apud li, sed surstrate iranta rikiŝisto. (*Безуглова*, 1962). Tiel la poeto plibonigis sian ĉinan lingvon, ekciis pli pri la ĉiutaga ĉina vivo. Krom la menciitaj transportservoj, ankaŭ la knabo-gvidanto estis asignita al la lektoro Vasilij Eroŝenko.

Malfacilas diri, kio kunigis la realiston Lusin kaj la romantikulon Vasilij Eroŝenko. Eble la larĝa rondo de interesoj de tiu junulo, eble la muziko de Glinka, Ĉajkovskij, Paganini, kiun li perfekte ludis per violono, aŭ eble la sono de la sepkorda gitaro? Preskaŭ la tuta unua volumo el la verkaro de Lusin – tradukoj de verkoj de Vasilij Eroŝenko. Lusin dediĉis al la poeto unu el siaj plej poeziaj noveloj „La komedio de la anasoj", kies ĉefrolanto estas blinda. Eble, la klasikulon de la ĉina literaturo Lusin, fascinis la juneca naiveco de la poeto: „Mi perceptis la tragedion de homo, revanta, ke homoj amu unu la alian, sed ne povanta realigi sian revon. Kaj antaŭ mi malfermiĝis lia naiva, bela kaj samtempe ne reala revo. Eble, tiu ĉi revo – estas la vualo kaŝanta la tragedion de la artisto? Mi ankaŭ estis revulo, sed mi bondeziras, ke la aŭtoro ne disiĝu kun sia infana, mirinda revo" (*Синь*, 1962, p. 174). Lusin publikigis en ĉinaj gazetoj kelkajn tradukojn de la fabeloj de Vasilij Eroŝenko.

Informoj pri Vasilij Eroŝenko atingis la iaman Sovetunion ĝuste tra la novelo de Lusin „La komedio de la anasoj", kiu rakontis pri la blinda poeto Vasilij Eroŝenko, kiu, veninte al Pekino kun sia sepkorda gitaro, ofte plendis pri la silento kvazaŭ en dezerto. En Pekino, li diris, eĉ ranoj ne kvakas kun kio Lusin ne konsentis: dum la pluvsezono en Pekino, ĉie aŭdiĝas kvakado de ranoj. Tamen Vasilij Eroŝenko enuis en Ĉinio. Li rememoris siajn vojaĝojn en Hindio kaj Birmo, la sonon de cikadoj, la sibladon de serpentoj. Reagante al la plendoj de la gasto pri silento, la infanoj de Lusin alportis ranidojn de ie kaj metis ilin en sian artefaritan lageton, tiuj devjs kreski al

Ilustraĵo por „La komedio de la anasoj“ de Lusin, 1977 (retaliro: elhttp://esperanto.cri.cn/2521/2017/04/18/173s192667.htm)

V. Dudnik. Vasilij Eroŝenko kaj Lusin (retaliro: https://sokm.org.ru/vystavki/virtualnye-vystavki/825-tvorcheskaya-druzhba)

Vasilij Eroŝenko antaŭ la domo de Lusin, Pekino, 1922 (retaliro: www.persons-info.com)

ranoj kaj ĝojigi la gaston per sia kvakado. La poeto iam aĉetis kaj donacis anasidojn al la infanoj de Lusin. Tiuj anasidoj forkaptis ranidojn, el kiuj la infanoj en la lageto kreskigis estontajn muzikistojn.

Vasilij Eroŝenko sopiris pri sia medio kaj foriris al patrujo. Venis aŭtuno. Ĉie en Pekino kvakas ranoj, la anasoj aĉetitaj de Vasilij krias: „Kria... kria... kria". Lusin pripensas, ĉu lia amiko revenos al li? Jen kiel malĝoja estis la „La komedio de la anasoj".

Lusin faris ĉion eblan por ke vivo de la gasto en lia hejmo estu interesa kaj agrabla. Ili ofte interparolis vespere – tiaj konversacioj daŭris ankaŭ post la noktomezo. Vasilij Eroŝenko per sia erudicio, scio pri literaturo kaj lingvoj, konoj pri la vivo de popoloj el multaj landoj surprizis homojn ĉirkaŭ li. Rapide ili amikiĝis kun ĉina verkisto. Laŭ Lusin mem, li ligiĝis al Vasilij ĉar li aprezis la talenton, originalecon kaj sincerecon de la juna viro. Lusin, vidante tristan gaston, sugestis lin, inviti gasti amikon de Vasilij Eroŝenko, la japanan studenton Fukuoka Seiti. La gastema ĉino garantiis, ke en lia domo estos sufiĉe da loko por ĉiuj amikoj.

La granda ĉina verkisto rakontis al la legantoj pri sia amiko en la eseo „Malplenaj pensoj ĉe la fino de printempo". Bedaŭrinde, ne estas pli detalaj informoj pri la komunikado inter Lusin kaj Vasilij Eroŝenko. Lusin neniam forgesis pri Vasilij Eroŝenko – ĝis la jaro 1935 li menciis sian amikon en la artikoloj. Vasilij Eroŝenko ne priskribis sian vivon en Ĉinio. Kiam li revenis, verŝajne pro modesteco, li neniam parolis pri sia amikeco kun la famulo Lusin.

Vasilij Eroŝenko fariĝis vaste konata ne nur kiel verkisto, sed ankaŭ kiel senlaca propagandisto de Esperanto. Tian Han (1898–1968), elstara ĉina dramisto, reĝisoro, tradukisto kaj poeto, kiu tiutempe vivis en Japanio, uzis motivojn de „Rakontas paperlanterno" de Vasilij Eroŝenko en sia teatraĵo „Nokto en Kafejo", publikigita en Tokio en 1920. Kvankam la familia nomo de Eroŝenko ne estis skribita, la blinda aŭtoro estis menciita.

En Ĉinio, Vasilij Eroŝenko verkis la novelon „Sur la bordo", la fabelojn „La aglokoro", „La mallarĝa kaĝo", „La persikkolora nubo", „Rakontoj de velkinta folio". En tiuj verkoj estas multe da kompato por la ĉina popolo. Dum 1922–1924, Lusin kaj lia frato tradukis el Esperanto kaj japana al la ĉina kaj eldonis la kolektojn „Rakontoj de Eroŝenko", „Ĝemo de unu soleca animo", „Turo por fali", la teatraĵon „La persikkolora nubo" kaj kolekton de liaj prelegoj „Forirantaj fantomoj" (*Аникеев*, 2006). Dum la restado de Vasilij Eroŝenko, Lusin komencis traduki en la ĉinan la plej bonan teatraĵon de sia amiko „La persikkolora nubo", kiun kelkaj aŭtoroj nomas konfeso de la verkisto kaj biografio de lia animo. La tagon kiam Lusin finis traduki la menciitan teatraĵon, lia patrino informis Vasilij pri tio. La gasto tiel ekĝojis, ke tuj komencis danci, poste kaptis la gitaron de la muro kaj akomponante per ĝi kantis kelkajn ukrainajn kaj rusajn kantojn al la ĉina maljunulino.

J. Patlan atentigas, ke diversaj aŭtoroj dum pli ol kvardek jaroj (1961–2005) por emfazi siajn artikolojn, uzis la nomon de Lusin en la titoloj de siaj eldonaĵoj pri Vasilij

Eroŝenko: R. S. Belousov „La amiko de Lusin“ (1961), A. Ŝapoŝnikov „La amiko de Lusin“ (1961), ĉefartikolo „Nia samlandano estas amiko de Lusin“ (1961), Ge Baoquan „Lusin kaj Eroŝenko“ (1961), R. S. Belousov „Rusa verkisto V. Eroŝenko – amiko de Lusin“ (1975), Ge Baoquan „Amikeco de Lusin kaj Eroŝenko“ (1983) k.t.p.

La popularecon de la verkoj de Vasilij Eroŝenko en Ĉinio en la 20-a jarcento Lusin pligrandigis per la tradukoj de liaj verkoj el la japana. En Ĉinio estis eldonitaj en ĉina lingvo kelkaj kolektoj da libroj de Vasilij Eroŝenko: „Rakontoj “ (1922), la teatraĵo „La persikkolora nubo“ (1922), la kolekto de prelegoj „Forirantaj fantomoj“ (1924), la tradukita kolekto „La fortuno de ŝipoj“ (1931) En 1923 estis eldonita bone konata kolekto de verkoj de Vasilij Eroŝenko „Ĝemo de unu soleca animo: poemoj, rakontoj kaj skizoj pri ĉina vivo“ originale verkitaj de Vasilij Eroŝenko en Esperanto kaj en Tajvano – malgranda kolekto en Esperanto, nomita „Turo por fali“. La verkoj de Vasilij Eroŝenko ankaŭ nun refoje estas reeldonataj en Japanio kaj Ĉinio (*Патлань*, 2020).

Vasilij Eroŝenko donis promeson reveni al Ĉinio kaj ankoraŭ labori en Pekina Universitato. La verkisto plenumis sian promeson. Dum la vintra ferio de studentoj Vasilij Eroŝenko vizitis kelkajn ĉinajn urbegojn kaj adiaŭis Orienton por ĉiam.

„Fabeloj de Vasilij Eroŝenko“, kiujn tradukis Lusin, estis eldonitaj en Ĉinio eĉ kvinfoje. (*Полонский*, 2013). Malgraŭ la sukceso en kreado la verkisto strebis veni al Soveta Rusio, ne konsciante pri la danĝero de gulago, li kredis, ke post okazinta revolucio, la vivo tie estos bazita sur principoj de libereco, egaleco kaj frateco.

Lusin estis la konsekvenca subtenanto de Esperanto kaj de Esperanto-movado. Lia pli juna frato Zhou Zuoren sciis ne nur japanan lingvon, sed ankaŭ Esperanton. Kiam restis nur du monatoj antaŭ lia morto (aŭgusto 1936), Lusin diris: „Mi estas konvinkita, ke mi estas favora al Esperanto“ (citita laŭ *Hou Zhiping*, retaliro: http://www.elerno.cn/movado/movado198.htm). Lusin kredis, ke Esperanto povas kunigi homojn. La verkisto emfazis la sindonemon de la esperantistoj. La sincera amikeco inter Lusin kaj Vasilij Eroŝenko fariĝis legendo ne nur en la moderna ĉina literaturo, sed ankaŭ en la historio de la ĉina Esperanto movado (*Hou Zhiping*, retaliro http://www.elerno.cn/movado/movado198.htm).

En la iama Sovetunio: bloveto de gulago

La unuan artikolon „Amiko de Lusin“, en la iama Sovetunio pri Vasilij Eroŝenko, publikigis en 1958 ĵurnalisto kaj tradukisto Vladimir Rogov (*Владимир Рогов*, 1906–1988), kiu laboris en Ĉinio en 1937–1953 kaj tradukadis la verkojn de Lusin. Tradukante „La komedio de la anaso“ de Lusin, li trovis menciitan nomon de ruso. V. Rogov estis la unua, kiu provis ekscii kio estas Vasilij Eroŝenko. Unu versio de artikolo de V. Rogov estis publikigita en la revuo „Nia vivo“ („Наша жизнь“) de Tutrusia Societo de Blinduloj, kun la foto de Lusin kaj Vasilij Eroŝenko.

Tuj kiam la rilatoj de Ĉinio kun Soveta Rusio pliboniĝis la 16-an de aprilo 1923, Vasilij Eroŝenko foveturis al Moskvo, (*Рогов*, 1958). Tiutempe, la verkisto vizitis Moskvon kaj Obuĥovka, kie li renkontis siajn parencojn post ok jaroj de apartiĝo. Al Obuĥovka, li venis kun juna japano Vada Kiitiro (1896–1946) kaj tiel savis lin de malsato. La memuaroj de Vada Kiitiro pri ĉi tiu vojaĝo estis lastatempe tradukitaj al la rusa kaj publikigitaj (*Патлань*, 2020). En la memoraĵoj „Al Ukrainio kun Eroŝenko“ li skribis: „<...> ĉiuj vivas pensante pri manĝo. Ĉiuj konversacioj pri kiun enamiĝi aŭ kiu amas vin estis ne aktualaj. Ĉu vi diras, ke manĝo ankoraŭ estas pli grava ol amo? Ĝuste! Mi estas tute malforta, malsana. Duonmalsata vivo – terura afero. Li, kompreneble, estas blinda kaj ne vidas, sed konfirmante miajn vortojn mi etendis al li siajn maldiketajn manojn, por ke li povu ilin tuŝi“ (*Киитиро* 2016, p. 274). En komentoj de tiu ĉi artikolo Julia Patlan rimarkis, ke ĉiuj eventoj poste montras, ke Eroŝenko kompatis japanon kaj perfekte solvis la problemon per la interhelpo: li mem bezonis vidantan akompononanton dum la longa vojaĝo, kaj elĉerpitan japanon necesis savi de mortmalsato, kion Vasilij Jakovleviĉ faris per siaj rimedoj. Verŝajne, la konoj akiritaj en la Tokia lernejo de blindaj masaĝistoj ebligis determini per tuŝo la gradon de elĉerpiĝo ĉe la kunparolanto.

La verkisto dum sia tuta vivo estis altruisto: en Moskvo, li ĉiam akceptis hejme preterpasantajn blindulojn, pruntedonis al ili monon, hontis memorigi pri la ŝuldo, kaj dum la milito li dividis sian manĝon kun la lernantoj (*Алов*, 1962). Ne al unu persono, kiu perdis vidkapablon, li helpis refortiĝi. Li kutimis diri, ke blindulo sentas sin plene valora kiam li laboras (*Богданов*, 1962). Tamen, li ankaŭ havis dolorajn perdojn pro sia altruismo. Forirante al Meza Azio en 1935, li permesis al blindaj genovedzoj loĝi en lia loĝejo. Vasilij Jakovleviĉ opiniis, ke estas malĝentile difini kondiĉojn kaj diskuti iujn rajtojn pri ĉi tiu loĝloko. Sed la genovedzoj ne estis tiom modestaj. En 1940, ili ŝanĝis la loĝejon al pli granda kaj iĝis la plenrajtaj posedantoj kaj Vasilij Eroŝenko iĝis senhejmulo, la unuajn noktojn en Moskvo li pasigis en la stacidomo. Poste la amikoj akceptis lin al sia hejmo, sed verkisto perdis la registrigon en Moskvo, kiun dum longa tempo li ne povis renovigi (*Шамина*, 1961).

Vasilij Eroŝenko laboris en la Komunista Universitato de Orientaj Laboristoj kiel tradukisto kaj lektoro, verkis artikolojn por revuoj en la rusa kaj Esperanto. Laŭ aliaj

En tiu-ĉi domo en Moskvo funkciis la Komunista Universitato de Orientaj Laboristoj, kie en en 1924 Vasilij Eroŝenko laboris kiel instruisto, poste – tradukisto de japana lingvo (retaliro: https://www.sensusnovus.ru/culture/2013/07/04/16713.html)

Mapo de la laborpunejoj (gulagoj) de iama Sovetunio
(retaliro: https://polit.reactor.cc/post/4033331)

aŭtoroj, Vasilij Eroŝenko neniam verkis en la rusa, kaj kelkaj publikigitaj verkoj en la rusa estas tradukoj el la japana, ĉina, Esperanto. Tiutempe, li tradukadis verkojn de marksismaj klasikuloj al la japana (*Мурашковска, Мурашковский*, 1986–1987). Li memvole forlasis sian laborejon en la Komunista Universitato de Orientaj Laboristoj, ĉar li ne konsentis kunlabori kun la sekurecservo: „Mi silentis, ankoraŭ ne komprenante, kion tiuj laboristoj por kulturaj ligoj alludas. Diplomatio ne daŭris longe. Aŭ ili hastis, aŭ mi por ili aspektis sufiĉe matura por plenumi la delikatajn taskojn.

Mi ricevis la rolon de informanto. Mi devus aŭskulti la telefonajn konversaciojn de la eksterlandaj gastoj en la hotelo „Moskvo“. Mi estis devigita spioni Akita-Ujaka. Mi diris „Ne“. Ivan Ivanoviĉ surpriziĝis. Komence li decidis, ke mi ne komprenas, kiel tio funkcias, kaj komencis longe klarigi, ke mi tute ne devos iri al ĉiu ĉambro, silente ŝteliri en domojn de aliuloj. La tekniko, laŭ ili, estas sufiĉe perfekta kaj permesas racie uzi la talenton kaj scion, – tiel diris Ivano. Kaj Piotr, kiel postulis ilia scenaro, flatante aldonis: – „Vi havas la plej rarajn sciojn, Vasilij Jakovleviĉ. Kiel poligloto, vi povas anstataŭi kelkajn homojn samtempe. Mi ekridis, ĉar mi rememoris la eldiron de antikva ĉina saĝulo – ĝin foje tradukis por mi Lusin: „Nia vivo esence estas pupteatro. Vi nur bezonas teni la fadenojn en la manoj, ne implikigi ilin, movigi ilin laŭvole kaj mem decidi kiam marŝi kaj kiam stari, ne permesi al aliaj ilin tiri. Kaj tiam vi leviĝos super la scenejo.“ Mi ekridis kaj denove diris: „Ne!“ (citata de *Полаяковский*, 2000).

La iama kolegino de la verkisto, esperantistino Zinaida Šamina, rakontis, ke dum la jaroj de reprezalioj ŝi tre timis pro Vasilij, ĉar ne unu homo jam estis punita pro kontaktoj kun eksterlandanoj (esperantisto Viktor Žavoronkov, kiu laboris kun blinduloj, estis mortpafita la 3-an de oktobro 1938). Zinaida Šamina sciis, ke Vasilij Eroŝenko eĉ dufoje skribis leterojn al la redaktejo de la ĵurnalo „Pravda“, pri malpermeso de esperantistaj organizaĵoj en la tiama Sovetunio (*Шамина*, 1961).

En 1927, en Moskvo, Vasilij Eroŝenko renkontis sian amikon Akita-Ujaka, kiu transdonis la malgajan novaĵon, ke post la batalo kontraŭ „danĝeraj pensoj“ la libroj de Jeroŝenko estis malpermesitaj en Japanio. La alegoria formo de la verkoj ne kaŝis de cenzuro revoluciajn ideojn. Vasilij Eroŝenko ne akiris la fidon ankaŭ de la tiama registaro en Rusio. Por ke ne damaĝu per sia komunikado al Akita-Ujaka, kiu tiam gastis en Moskvo, li malaperis el horizonto de sia amiko sen klarigo, eĉ ne adiaŭante lin. Poste, multaj dungitoj de la menciita universitato, inter kiuj estis ankaŭ eksterlandanoj, trafis en gulagon (gulago – la speciala sistemo de lokoj por deviga malliberigo, tiel nomataj „reedukaj laborpunejoj“ en la eksa Sovetunio). Gulagon Vasilij Eroŝenko eskapis. Eble lia malsano kaj granda singardemo helpis.

La verkisto estis elektita al la Konsilio de la Tutrusia Blindulasocio. En 1928–1929, Vasilij Eroŝenko laboris ĉe la Centra Estraro de la Tutrusia Blindulasocio en Moskvo. Li legis la leterojn de eksterlandaj esperantistoj, preparis respondojn. Ekde la 1-a de aŭgusto, 1929 ĝis 1a 1-a de septembro, 1931 li instruis matematikon kaj rusan lingvon en Ponetaeva Metia Lernejo por Blinduloj, en la vilaĝo de Ponetaevka, regiono Niĵnij Novgorod. Vasilij Eroŝenko dum 1931–1934 laboris kiel korektisto ĉe la 19-a presejo per reliefa litertipo en Moskvo, redaktis la revuon de blindaj verkistoj „Almanako“. Trovi informojn ĉu Vasilij publikigis siajn verkojn en tiu ĉi almanako oni ne sukcesis.

En „Ĉukotka“ aŭ ĉevala salto

Pri la vojaĝo de Vasilij Eroŝenko al Ĉukotka skribis Eduard Pašniov en la novelo „La suno estis lia gvidilo: novelo pri eksterordinara vivo de ordinara homo“ (1971), pri tio verkis Aleksandr Ĥarkovski en la novelo „La homo, kiu vidis la mondon“. (1978), Ilga Mechti en la artikolo „Blinda muzikisto“ (2015), Konstantin Kučer en la artikolo „V. J. Eroŝenko. Kion povas atingi persono kun handikapo?“ (2016), aliaj aŭtoroj, pri tio oni skribas ankaŭ en „Historio de la Esperanto-movado inter la blinduloj 1888–2015“. (2016). En la dokumentaj filmoj „La Verda Stelo de Vasilij Eroŝenko“ (1990), „Homo kiu ekvidis la modon” (kinostudio „Ora kadro“ de lernejo, Nr.40 en Staryj Oskol, 2014) oni ankaŭ mencias la vojaĝon de la verkisto al Ĉukotka, bonege utiligante filmitan arkivan materialon pri la tiama vivo de la ĉukĉoj.

Aleksandr Ĥarkovskij en dokumenta novelo „La homo, kiu vidis la mondon“ elvokive priskribas la vojaĝon de Vasilij Eroŝenko al Ĉukotka, la homojn, kiujn li tie renkontis, akiritajn spertojn: „Nun ĉiumatene Vasilij kaj Taurulkotli veturadis jungante hundojn en la tundron. Ĉukĉoj instruis lin kiel jungi kaj maljungi hundojn, kolekti ilin en jungaron. Tio estis speciala scienco. Malsamaj laŭ eltenemo, karaktero, forto hundoj ŝatas aŭ gvidi aŭ obei – kaj tute ne estas malgrave kiun starigi apud kiu. Eroŝenko ellernis distingi hundojn laŭ la voĉo, pli malofte rekonis ilin per tuŝo, laŭ felo, ĉar ne ĉiu besto tion ŝatis. Laŭ grumbla murmuro, bojado, jelpado li divenis la humoron kaj intencojn de hundoj ne pli malbone ol vidantaj hundpelantoj. Tamen, la vera amikeco estiĝis kun gvidanto, potenca Kolyma hundo kiun li nomis Amiko. Ĝin kiel la unuan li regalis per sekigita fiŝo, dum malvarmo li purigis hundajn piedojn de la glacio alfrostigita al ili. Kaj la minaca hundo dankeme lekis liajn manojn. Tio, laŭdire, estas kontraŭ ĉiuj reguloj, sed ŝajnas ke la besto rimarkis, ke ĝia jungaro estas gvidata de ia nekutima gvidisto“ (*Харьковский*, 1978, p. 253).

La esploristino de la biografio kaj verkaro de Vasilij Eroŝenko, Julia Patlan, konstatas, ke pri la vojaĝo de Eroŝenko al Ĉukotka oni scias preskaŭ nenion, ĉar la arkivo de la Ĉukotka kultura bazo el vilaĝo Lavrentij pereis en 1943, dum la milito, dum la evakuado de ĝi tra maro al la urbo Magadan. Tamen, en 2015, ŝi sukcesis trovi dokumentojn konfirmantajn ke ekde la 15-a de decembro 1928 ĝis somero de1930 la frato de verkisto, Aleksandro Eroŝenko, vere laboris kiel bestkuracisto ĉe Ĉukotka kulturbazo. (*Patlan*, 2015).

En unu el siaj artikoloj, Julia Patlan skribas: „Ekzistas opinio ke Eroŝenko pasigis en Ĉukotka la jarojn 1929–1930. Tamen, dum nia esplorado, ni ne sukcesis trovi iujn sendependajn dokumentajn pruvojn aŭ raportojn de atestantoj. Krome, la tempo de lia foriro kaj reveno al Moskvo ne koincidas kun la polusa navigado. Ne estas iu mencio pri Čiukotka en dosjeroj de dokumentoj pri lia pensio. Oni opinias, ke Eroŝenko kreis verkojn de la ĉukĉia ciklo surbaze de la fama libro „Ĉukotka“

de Tiĥon Semuŝkin. Ankaŭ povas esti, ke pro la pli danĝera situacio en la lando, Eroŝenko estis devigita forlasi Moskvon. **Kaj la legendo pri Ĉukotka, kiun li mem kaj liaj parencoj disvastigis en postaj jaroj, fariĝis unu el eblecoj por lia pluvivo"** (*Патлань*, 2020) (retaliro: http://kidskazka.ru/biblio/6937_Prosvetitel_slepyx_i_skazochnik_Vasilij_Eroshenko.html).

Ekzistas informoj, ke post rifuzo kunlabori kun la KGB (комитет государственной безопасности / komitato por sekureco de la ŝtato) – subaŭskulti la telefonajn konversaciojn de eksterlandanoj, Vasilij Eroŝenko elvokis la malamon de regantaj aŭtoritatoj. Eble tiutempe la verkisto konscie klopodis kiel eble plej malproksimiĝi de Moskvo kaj kaŝi sin de konstanta persekutado. Kreitan legendon pri Ĉukotka kaj sia malapero el Moskvo verkisto povis konfirmi nur per verkoj pri tiu lando kaj ĝiaj homoj.

Je vojaĝo de Vasilij Eroŝenko al frato Aleksandro kredis kelkaj aŭtoroj kiuj verkis pri li. Ne havante iujn dokumentajn pruvojn la aŭtoroj apogis sin sur la verkoj de Vasilij Eroŝenko pri Ĉukotka, interplektante en tekstojn siajn proprajn interpretojn kiuj poste iĝis mitoj. Ekzemple, iuj aŭtoroj skribis, ke Vasilij ne uzis bastonon por naviĝi en la spaco, kvankam en kelkaj fotoj prezentitaj en nia libro ni vidas la verkiston kun bastono en la manoj. Iuj aŭtoroj de artikoloj kaj aŭtoroj de publikigitaj konferencaj raportoj asertis, ke la verkisto en Ĉukotka, uzante aŭdadon, eĉ ĉasis. **Tial ne estas surprizo, ke ne ekzistas eĉ unu foto de ĉi tiu vojaĝo.**

En 1970, Anatolij Masenko kaj Aleksandr Pankov, kun granda risko, pere de samizdato (samizdato – neoficiala, ofte kontraŭleĝa presado aŭ reproduktado de libroj, revuoj kaj aliaj eldonaĵoj en Sovetunio) publikigis en Esperanto malgrandan libreton kun verkoj de Vasilij Eroŝenko pri Ĉukotka. Japanaj esperantistoj pretigis eldonon de tiu ĉi libro en japana lingvo. Tial ĉi tiuj tekstoj de la verkisto iĝis konataj al vidantaj legantoj kaj esploristoj de diversaj landoj (*Патлань*, 2020).

Eseo de Vasilij Eroŝenko „El la vivo de la ĉukĉoj", eldonita en 1984, en Esperanto, de tiama eldonejo de la Litova Societo de Blinduloj (foto de neidentigita aŭtoro)

Dank' al inciato de litova esperantisto, esploristo, blinda d-ro Valentinas Vytautas Toločka (1930–2019) la eseo „El la vivo de la ĉukĉioj" de Vasilij Eroŝenko en 1984, en Esperanto, estis brajle eldonita en la tiama eldonejo de la Litova Societo de Blinduloj.

Nikolaj Gudskov en la antaŭparolo por la libro de V. Eroŝenko „El la vivo de la ĉukĉoj" rimarkas, ke la plej multaj el la rakontoj pri la ĉukĉa temo estis publikigitaj brajle en la revuo por blinduloj „Esperanta Ligilo" en 1933. La etoso de la unuaj du rakontoj ne multe diferencas de similaj eseoj de T. Semuŝkin. Tute alia estas „La trimova ŝakproblemo" kies originalan tekston aŭtoro perdis kaj poste restarigis en 1938 – la jaro de la granda teroro furiozanta en Sovetunio. La novelo elokvente atestas pri la etoso reganta en la tiama socio. Kiel Eroŝenko kuraĝis surpaperigi la tutan historion kaj kiel li sukcesis publikigi ĝin en 1947, dum Stalin ankoraŭ vivis, estas enigmo, kies solvon neniu scias. Eblas nur supozi, ke la stalinismaj cenzuristoj, kiuj sciis Esperanton, estis samtempe analfabetaj en brajla skribo (*Gudskov*, 1992).

La unuan fojon la eseo de Vasilij Eroŝenko „Renkontiĝo en Ĉukotka" estis publikigita en la revuo „Vivo de blinduloj" („Жизнь слепых") en la sepa kaj oka numeroj de la jaro1930.

Do, la vojaĝo al Ĉukotka de Vasilij Eroŝenko povis esti frukto de la fantazio de ĵurnalisto Aleksandr Ĥarkovskij, kiun ekkredis multaj homoj preparintaj siajn publikaĵojn pri la verkisto kaj eĉ la scenaristoj de la dokumenta filmo pri Vasilij Eroŝenko. Oni ne povas ekskludi la version, ke verkisto decidis portempe kaŝi sin de la persekutado de sekurecservo kaj de minacata gulago, tial li mem disvastigis la legendon, ke foriras al Ĉukotka kaj por konfirmi ĉi tiun legendon, li verkis eseojn pri Ĉukotka kaj ĝiaj loĝantoj. Iuj legantoj tre bone komprenus la menciitan version, ĉar en Litovio, same kiel en aliaj Baltaj landoj, ankoraŭ vivas homoj, kiuj pro siaj konvinkoj dum sovetia epoko, por eviti la gulagon, kaŝis sin laŭ ĉiuj eblaj manieroj, ŝanĝis siajn familinomojn kaj lokojn de loĝado.

Propagandisto de Esperanto

Vasilij Eroŝenko, ekde kiam li konatiĝis kun Ana Ŝarapova en 1911, estis aktiva propagandisto de Esperanto, li instruis lingvon al aliaj, mem verkis tekstojn en tiu ĉi lingvo. La verkisto estris la grupojn de blindaj esperantistoj en Moskvo, esperantigis la verkojn de blindaj aŭtoroj Aleksandr Belorukov (*Александр Павлович Белоруков*,1881–1952) kaj Fjodor Ŝojev (*Федор Иосипович Шоев*, 1902–1965). Li aktive partoprenis en la internacia movado de esperantistoj. La 29-an de aprilo, 1916 li partoprenis la 3-an Kongreson de Japanaj Esperantistoj.

Krom jam menciita William Phillimore (1844–1934), unu el la unuaj, kiuj propagandis Esperanton al blinduloj, estis Théophile Cart (1855–1931). La franca lingvisto kaj instruisto ekinteresiĝis pri Esperanto jam en 1894 kaj iĝis gravega figuro en la Esperanto-movado. Al li kaj pluraj el liaj samideanoj, la nova lingvo povis helpi „eltiri" blindulojn el ilia ofte izolita vivo. En 1904 en Parizo, Théophile Cart fondis la monatan revuon „Esperanta Ligilo" kiu estis presata brajle, per adaptita al la Esperanta alfabeto. Svedo Harald Thilander, (1877–1958) estis unu el la fondintoj de la Internacia Ligo de Blindaj Esperantistoj, (LIBE) (*Bernhard Struc*, 2021).

La 8-an – 15-an de aŭgusto 1922 Vasilij Eroŝenko partoprenis en la XIV Universala Kongreso de Esperanto en Helsinko kiel delegito de la Pekina Esperanto Ligo kaj aliĝis al la grupo de 850 partoprenantoj. Samtempe li partoprenis ankaŭ en la II-a Kongreso de Blindaj Esperantistoj, kiu okazis en la Helsinka Instituto por Blinduloj (tiel tiutempe estis nomataj lernejoj por blinduloj en Eŭropo). La verkisto estis sendita al la kongreso kiel profesoro de la Pekina Universitato. Partoprenantojn de la kongreso li surprizis per sia scio de finna lingvo kaj de la sveda, kiu estas populara tie. Vasilij Eroŝenko estis pacifisto. Li legis al la kongresanoj sian novelon „La tago de l'monda paciĝo".

Survoje reen al Ĉinio, Vasilij vizitis sian denaskan vilaĝon Obuĥovka kie li estis akceptita de patro kaj fratinoj. Kial li ne restis hejme? En „La vintra fabelo", Vasilij Eroŝenko skribis ke tero fariĝis areno por homoj kaj bestoj, en kiu li vidis sin, kiel knabon kun la hieroglifoj de amo ĉizitajn en lia brusto kaj poste bruligitan por lumigi la vojon. Vasilij Eroŝenko ne volis reveni al Rusio, kie li sentis sin fremda. La cetero de la mondo estis dezerto por la verkisto. Japanio restis kiel oazo, amo por Kachimika – kiel printempo. Sed li estis forpelita el tiu lando. Vasilij Eroŝenko skribis en „Lando de revoj": „Mi revis pri la lando de revoj, en sonĝo mi vidis insulon de feliĉo en maro de eterna amo, kiu havas havenon de amikeco, en ĉi tiun havenon fluas eterne bela rivero de neelĉerpebla ĝojo, floroj de fido kaj lojaleco tie floras, kreskas la arboj de virto, tie leviĝas la monto de libereco, tie brilas la suno de vero, la luno de justeco, la steloj de belaj artoj." (citita laŭ *Патлань*, 2012). En la teatraĵo „La persikkolora nubo" sonas la kanto pri la lando de feliĉo ĉe la alia flanko de la ĉielarka ponto kaj al tia lando foriras la heroino de fabelo – la mortanta knabino Hinoko. La fabeloj de Vasilij Eroŝenko estis malpermesitaj de japana cenzuro, kiu

Emblemo de fondita en 1888 Internacia Ligo de Blindaj Esperantistoj (retaliro: https://www.scribd.com/document/356493045/Historio-de-La-Esperanto-movado-Inter-La-Blinduloj)

Atributoj de 14-a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en 1922 en Helsinko (Finnlando) (retaliro: https://alphabetilately.org/Esperanto/intl/1922.jpg)

Partoprenantoj de la 14-a Universala Kongreso de Esperanto ĉe la monumento por Kalevala en Helsinko, 1922 (retaliro: https://www.liberafolio.org/2022/10/16/uk-en-1922-kulmino-de-la-juna-movado/)

La grupfoto de la partoprenantoj en 15a Internacia Kongreso de Esperanto okazinta en 1923, Nurenbergo (retaliro: Wikipedia.org/wikipedia/commons/5/57 UK.1923.Nurenberg.jpg)

vidis en ili sugeston de revolucio, kvankam ĝi estis ne tiom socia kiom spirita revolucio (*Патлань*, 2012).

En aŭgusto de 1923 Vasilij Eroŝenko partoprenis en la 15-a Internacia Kongreso de Esperanto en Nurenbergo, kiun partoprenis 4 963 reprezentantoj el 40 landoj. Inter ili partoprenis ankaŭ ĉirkaŭ 40 esperantistoj el Litovio.

Restis la informoj, ke okaze de tiu ĉi kongreso estis eldonitaj kelkaj bildkartoj kun la bildo de la verkisto. Estas skribita, ke unu el ili prezentas Vasilij Eroŝenko kun la tola vojaĝsako sur siaj ŝultroj, vojaĝanta ĉirkaŭ la planedo. En alia bildkarto estis montrita la palaco kie okazis la 15-a Kongreso de Esperanto. Aro da esperantistoj staras apud la palaco, kaj la blinda verkisto Vasilij Eroŝenko marŝas al ili kun bastoneto en la mano kaj dorsosako sur la ŝultroj. Bedaŭrinde, ni ne sukcesis trovi tiujn bildkartojn. Okaze de la kongreso en Nurenbergo estis eldonitaj kelkaj bildkartoj kaj ilustrita libreto en Esperanto – gvidilo tra la urbo Nurenbergo.

En la poezia konkurso okazinta en la kongreso, Vasilij Eroŝenko legis kreitan de li pesimisman poemon, „Divenado de ciganino“. „Mi ne kuraĝis rifuzi partopreni, por ke ili ne pensu, ke mi arogas, ĉar la organizantoj de la kongreso eldonis bildkarton kun mia bildo, kvazaŭ mi estus ia Ivan

Poŝtkartoj destinitaj al la 15-a Kongreso de Esperanto en Nurenbergo, 1923 (retaliro: https://www.delcampe.net/en_GB/collectables/postcards)

R. Rudolph? Portreto de Vasilij Eroŝenko

R. Rudolph. Portreto de Vasilij Eroŝenko (fotoj de neidentigitaj fotistoj)

Mozzhukhin, kinostelulo aŭ alia famulo... Mi hontis rifuzi partopreni en la konkurso kaj mi estis tre surprizita ricevinte la premion. Mi estis honorita per tia famo nur dufoje en mia tuta vivo: tiam en Nurenbergo kaj la duan fojon kiam en la murgazeto estis publikigita mia fablo, en kiu estis priridita unu ordonema sinjorino el la Societo de Blinduloj. Ne ekzistis eĉ unu blindulo, kiu ne citis tiun ĉi satiron“ (citita laŭ *Полаяковский*, 2002). La prezidanto de la juĝkomisiono de la poezia konkurso, esperantisto, hungara poeto Kálmán Kalocsay (1891–1976) atentigis, ke tiu premio estas ne nur pro la menciita verko, sed pro la verkado dum la tuta vivo.

La akompananto en Germanio estis amiko de Vasilij Eroŝenko, instruisto de blindullernejo en Riga, vidanta esperantisto Ints Čače. En 1923, li kun Vasilij Eroŝenko partoprenis la 3-an Internacian Kongreson de Blindaj Esperantistoj en Nurenbergo, du semajnojn ili loĝis en la sama ĉambro, ĉiutage ĉeestis oficialajn laborkunvenojn, kune ekskursis al Rotenburgo (*Панков*, 2017).

El Nurenbergo, la verkisto foriris al Leipzig, kie li vizitis la mondfaman foiron. Akompanantoj de li rememoris, ke Vasilij tie palpis kaj aĉetadis diversajn aĵojn, daŭre demandadis pri la ĉirkaŭaĵo. Poste, kiam profesoro de la Leipziga Esperanto-Lingva Instituto, profesoro pri filologio Johannes Dietterle (1866–1943) petis ĉiujn disdividi siajn impresojn pri la foiro, montriĝis, ke la blinda verkisto vidis pli ol ĉiuj liaj vidantaj kolegoj. En Leipzig, lin ekinteresis la plej granda biblioteko por blinduloj de tiutempa Germanio. Vasilij Eroŝenko estis populara, ĉar nome lin pozi por portreto petis la germana artisto R. Rudolf, kiu pentris la portreton de la verkisto. Estas menciite, ke la originalo estis liverita al Vasilij Eroŝenko, poste lin gardis Vera Serdyukova en Obuĥovka. Poste iamaniere la portreto aperis en la redakcio de la gazeto „Oktobra vojo“ („Путь октября“), de kie ĝi mistere malaperis. La plia sorto de tiu portreto ne estas konata. Ankaŭ la opinioj de la aŭtoroj, kiuj skribis pri tiu ĉi portreto malsamas: kelkaj skribis ke al Vasilij Eroŝenko estis donacita la originalo de la portreto, aliaj asertis ke donacita estis kopio. Multaj necertecoj restas, do ne estas mirinde, ke en la libro de V. Eroŝenko

Grupo el 3 400 partoprenantoj de la 16-a Esperanto-Kongreso en Vieno (Aŭstrio), vestitaj en naciaj vestaĵoj kaj policaj uniformoj. Vasilij Eroŝenko kun bastoneto en la manoj, 1924 (foto de neidentigita fotisto)

„La agla koro“ (1962), en la eldonaĵo „Verkisto kaj publicisto V. J. Eroŝenko“ (kompilis A. I. Sizova, 1990), en la artikolo „Vivo kaj laboro de V. J. Eroŝenko. Eroŝenko en la studaĵoj de de liaj samtempuloj kaj studentoj“ (*Пискаль*, 2012), la portreto de Vasilij Eroŝenko, desegnita de R. Rudolf, estas atribuita al la japana artisto Tsuruta Gorō. Oni trovas diversajn kopiojn de tiu portreto.

Ne ekzistas iu dokumentita versio pri portretoj de Vasilij Eroŝenko, tial valorus al tiu temo dediĉi la apartan studaĵon por konvinkiĝi pri vereco de prezentitaj versioj.

Vasilij Eroŝenko vizitis Parizon en printempo de 1924, kie li renkontiĝis kun la gvidanto de la Monda asocio de blinduloj, aŭskultis prelegojn en Sorbona Universitato.

Somere de 1924 Vasilij Eroŝenko partoprenis en la 16-a Universala Kongreso kaj 4-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj en Vieno, dum kiu estis fondita Monda Asocio de Blindaj Esperantistoj (*Харьковский*, 1978).

Baldaŭ al la grupo de subtenantoj de Esperanto aliĝis ankaŭ blindaj esperantistoj. Ekde 1904 estas eldonata brajle la revuo „Esperanta ligilo“, ĉiujare ekde 1921 (escepte de 1940–1948) okazis internaciaj kongresoj de blindaj esperantistoj (*Valenta*, 2012). En 1951, en Munkeno estis fondita la Internacia Ligo de Blindaj Esperantistoj (International League of Blind Esperantists), kies celo – propagandi la internacian lingvon Esperanto inter la blinduloj kaj viddifektitaj homoj en iliaj asocioj, bibliotekoj, pre-

Grupo de junaj blindaj esperantistoj en la tiama Reĝa Instituto por surduloj, mutuloj kaj blinduloj en Bruselo (retaliro: https://www.delcampe.net/en_GB/collectables/postcards/)

Poŝtmarkoj dediĉitaj al la 6-a Internacia Proleta Esperanto-Kongreso, Leningrad, 1926 (foto de neidentikigita fotisto)

sejoj, konferencoj kaj dum aliaj aranĝoj; permesi al ili lerni, publikigi iliajn verkojn brajle sur papero kaj sur kompakdiskoj; unuigi ĉiujn blindajn kaj parte vidantajn esperantistojn; reprezenti blindajn esperantistojn en komunikado kun aliaj institucioj.

Verŝajne, inter la esperantistoj estis ankaŭ pedagogoj de edukaj institucioj por infanoj kun sensoriaj problemoj, kiuj ankaŭ alportis la ideon instrui Esperanton al siaj institucioj, en Eŭropo tiam nomataj institutoj. Tiun supozon konfirmas la distribuitaj fotoj en la formato de poŝtkartoj. Vasilij Eroŝenko la ideon instrui Esperanton disvastigis en Sudorienta Azio kiam li komencis instrui Esperanton al siaj samklasanoj en la Tokia Lernejo por Blinduloj.

Vasilij Eroŝenko partoprenis kaj faris paroladon en la 6-a Internacia Proleta Esperanto-Kongreso okazinta en Leningrado en aŭgusto de 1926. La kongreso de esperantistoj estis organizita de Sennacieca Asocio Tutumonda, kiu tiam estis konsiderata

Partoprenantoj de la XXIV-a Internacia Kongreso de Esperantistoj okazinta en Parizo en 1934, en la Granda Amfiteatro de la Sorbona Universitato
(retaliro: https://commons.wikimedia.org/wiki/File:UK_1932_malfermo.jpg)

proleta. Okaze de tiu ĉi kongreso estis en USSR eldonitaj du poŝtmarkoj kun la surskribo en Esperanto. Iliaj desegnaĵoj prezentas obeliskon en Moskvo, dediĉitan al la sovetia konstitucio (*Панков*, 2017).

En la jaro1932, Vasilij Eroŝenko partoprenis ankaŭ en la 24-a Internacia Kongreso de Esperantistoj en Parizo, kie entute partoprenis 1650 partoprenantoj. En la samtempe okazanta Kongreso de Blindaj Esperantistoj estis priparolita kaj en kongresaj materialoj registrita demando pri la legalizo de blanka bastoneto kiu estu rekonilo de blinduloj

En Parizo, Vasilij Eroŝenko renkontiĝis kaj komunikis kun la ĝenerala sekretario de la societo „American Braille Press". La verkisto strebis pruvi ke la literaturo eldonata de tiu ĉi societo devus atingi ĉirkaŭ tri mil blindaj esperantistoj, sed pro politikaj kialoj li ricevis rifuzon. Pri tio Vasilij Eroŝenko skribis en la eseo „Sub la klabo de miliarduloj", kiu estis publikigita en 1932, en la brajla revuo „Kune kun vidantaj" („Вместе со зрячими").

Blinda verkisto Vasilij Eroŝenko la ĉirkaŭantan lin mondon perceptis siamaniere, la ĉiutagajn eventojn transformante al belaj fabeloj, Esperanto kaj japana lingvo por verkado iĝis liaj laboriloj, kiuj prave apartenas al la monda kulturo. Tamen lia agado instruante kaj propagandante, ankaŭ tekstoj verkitaj en Esperanto, alportis netakseblan valoron al ampleksigo kaj disvastigo de tiu lingvo (*Бронштейн*, 2020).

Ŝako

Vasilij Eroŝenko bone ludis ŝakon. Li interesiĝis pri la sekretoj de tiu ĉi ludo jam en sia infanaĝo. Estante sepjara knabo en sia naskiĝvilaĝo Obuĥovka, li konkeris multajn el siaj samaĝuloj. La direktoro de la Moskva blindullernejo, la rezerva oficiro germano Georg Vitte, ŝatis ŝakon kaj eĉ ludis kun la lernantoj (*Панков*, 2017) A. Ĥarkovskij en sia libro „Homo, kiu surprizis la mondon". priskribas tiun ŝatokupon de la verkisto. La lernanto kaj partnero por tiu ĉi ludo de Vasilij Eroŝenko, Viktor Perŝin, skribis: „Ne sufiĉas diri, ke Vasilij Jakovleviĉ sindoneme ŝatis ŝakon. Li estis kvazaŭ tiu libroamanto, kiu legas la maloftan libron, apartenantan nur al li. Sen troigo, ni povas diri, ke li traktis ŝakon tiel, kiel la avara kavaliro traktis sian riĉaĵon. Li adoris ŝakon, fetiĉis ĝin, altigis ĝis la absoluto" (citita laŭ *Харьковский*, 1978).

Legantoj, kiuj ne konas la sporton de blinda ŝako kaj damludo, por havi la ĝustan imagon, devus atenti la fotojn de ĉi tiuj tabloludoj, destinitaj por blinduloj. Ke parto de homoj neniam vidis tiujn ĉi tabloludojn adaptitajn por blinduloj, montras la pentraĵo de rusa artisto Gennady Dobrov (*Генадий Михайлович Добров*, 1937–2011), „La Blinda Ŝakistino" pentrita en 1970, kie estas prezentita blindulino sidanta ĉe regula (glata) ŝaktabulo. Blindulo ne povas ludi ordinaran ŝakon, ĉar li ne sentas per tuŝo, kien meti la figuron. Oni povas konkludi, ke la artisto eble vidis blindan

Ŝako kaj damludo destinitaj por blinduloj kaj parte vidantaj
(retaliro: https://www.kainos.lt/paieska/sachmatai-saskes-kaina)

G. Dobrov. Blinda ŝakludantino (foto el la persona arkivo de la aŭtoro)

Vasilij Eroŝenko (dekstre) ŝakludas, Leningrad, 1938 (retaliro: www.persons-info.com)

ŝakludantinon, sed li certe ne vidis ŝakludilojn adaptitan por blinduloj. La artisto parte erarigas la spektanton per ĉi tiu pentraĵo.

Kun ŝako, adaptita por blinduloj, Vasilij Eroŝenko ne disiĝis ankaŭ dum vojaĝoj. Oni rakontas, ke en la jaro1932, en Parizo li havis la eblecon ludi kun la tiama monda ŝakĉampiono Aleksandr Aleĥin. Jen kiel ĉi tiun eventon priskribas A. Ĥarkovskij: „Foje, post la kunveno en Esperanto kongreso, Eroŝenko eniris en la faman ŝakkafejon „Regence", kiu situis sur la Opera avenuo, kiun iam vizitadis multaj mondĉampionoj de ŝako – de François – André Danican Philidor (1726–1795), ĝis Aleksandr Aleĥin (1892–1946). Li ŝatis la malstreĉan etoson tie. Konata pordisto prenis la bastonon kaj ĉapelon de Eroŝenko. La blinda verkisto mendis tason da kafo kaj oranĝan sukon kaj sub sian ŝaktabulon enŝovis kvin frankojn (ĉi tie oni ludis nur kontraŭ mono) kaj li komencis atendi sian partneron. Subite li aŭdis gajan baritonan voĉon.

– Bonan tagon, – diris la fremdulo en la franca kun rimarkinda rusa akĉento. – Ĉu vi konsentos ludi kun mi?"

– Kun plezuro.

– Mi neniam vidis tian ŝakon. La tabulo havas truojn boritaj en ĝi, kaj la nigraj kaj blankaj kvadratoj havas kornicojn?! Simpla kaj sprita, kaj tre oportuna por blinda rivalo. Kaj kio pri la regulo „vi tuŝis la figuron. do movu ĝin"?

– „Vi forprenis pecon el la ingo – movu" – tiel, ŝajnas, estas skribita en la la ŝakreguloj. Se ne estas malfacile por vi, komentu voĉe pri ĉiu movo, kiun vi faras.

– Mi konsentas, – respondis la fremdulo kaj ankaŭ metis la kvinfrankan bileton sub la tabulon.

Ĉirkaŭ la tablo kolektiĝis. grupo da spektantoj. Tamen la ludo ne estis tre interesa. Post kelkaj interŝanĝoj per figuroj, la situacio iĝis tiel simpla, ke la konkuranto proponis

egalgajnon. Eroŝenko konsentis. La fremdulo manpremis, prenis sian monbileton kaj foriris.

– Vi estas bonŝanca, sinjoro, – diris la kelnero. – Nur pripensu: ludi kun mem mondĉampiono!

– Do tio estis Aleksandr Aleĥin? – seniluziigita demandis Eroŝenko. Li estis forironta kaj fordonis al la kelnero siajn kvin frankojn.

– Ne, sinjoro, ne, mi ne prenos. Vi tiel malofte, vizitas nin ke mi ne povos repagi vian malavarecon.,.

– Ne gravas, prenu por la bonŝanco.

Kun miksitaj sentoj de ĝojo kaj amaro, Eroŝenko rememoris sian ludon kun Aleĥin. Kun pasantaj jaroj, al li pli kaj pli ŝajnis, ke la granda majstro simple kompatis lin, blindulon. Kaj Eroŝenko plej hatis kompaton" (*Харьковский*, 1978).

Jam en 1924, en Moskvo ariĝis blindaj ŝakludantoj, kaj Vasilij estis la spirito de tiu iniciato, la organizanto kaj aktiva partoprenanto. De tiu tempo komenciĝas la historio de la movado, de ŝako kaj damo ludoj en la Tut-Rusa Societo de Blinduloj. En 1938, Vasilij Eroŝenko, akompanata de fratino Pelagea, venis al tiama Leningrado por partopreni la Unuan Tutrusian ŝakturniron por blinduloj, kiu okazis de la 10-a ĝis la 27-a de julio. Vasilij Eroŝenko havis la II-an kategorion de ŝakludantoj. Li gajnis la trian lokon kaj ricevis premion de 250 rubloj. En la turniro partoprenis 15 partoprenantoj. La unuan lokon en la turniro ricevis blinda esperantisto Piotr Gorĉakov (*Патлань*, 2020).

En la revuo „Vivo de blinduloj" („Жизнь слепых") en la 15-a numero, de 1938, estis publikigita la artikolo de Vasilij Eroŝenko „La unua ŝakturniro de blinduloj en Sovetunio". En la artikolo, estas detala rakonto pri ĉiu el dek kvin partoprenantoj, indikita kiom da poentoj ĉiu kolektis. Krome estas priskribita la situacio de la turniro mem: „La ludo estis ludata laŭ ĉiuj reguloj de ŝakturniroj: kun ŝakhorloĝo sur la tablo, kun

Vasilij Eroŝenko kun fratino Pelagea kaj amikoj en Peterhof (Rusio) apud la fontanoj, 1938 (foto el la arkivo, de Pelagia Andronova, fratino de Vasilij)

profesia ŝaka arbitraciisto, al kiu oni turnis sin pri ĉiuj pridisputataj demandoj kaj kies decido. estis konsiderita kiel fina. Oni ludis de 10-a ĝis 13-a horo. Ĉiuj ludis po unu ludon ĉiutage kaj la vesperoj estis liberaj. Post kvin tagoj, estis libera tago: la partoprenantoj de turniro ripozis kaj ekskursis en ĉirkaŭaĵo de Leningrado.“ Vasilij kun sia fratino Pelagia kaj kelkaj amikoj vizitis la urbon Peterhof, fonditan de rusa caro Petro la 1-a en 1705, la loĝlokon de caro kaj fotiĝis ĉe la famaj fontanoj de tiu palaco. „Por la servoj de la partoprenantoj de la turniro estis biblioteko, muzika ĉambro, telefono, radio, gimnastikejo kaj kio estis por ni la plej grava en tiuj varmaj tagoj – la malvarma duŝo” (citita laŭ *Панков*, 2017).

Se tiutempe blindulo, ludanta ŝakon, surprizis vidantajn homojn, hodiaŭ neniu miras, ke aktivas Internacia Ŝaka Asocio (IBCA) – la internacia sporta organizo, kuniganta naciajn ŝakfederaciojn de blindaj kaj viddifektitaj ŝakludantoj. Ĝi apartenas al la Internacia Ŝako-Federacio kaj al la Internacia Blind-Sporta Federacio, kiu organizas la ŝakajn olimpikojn por blinduloj kaj la mondpokalon de blindulaj teamoj. La organizo havas ĉefsidejon en Hamburgo, en Germanio. Pli ol 50 landoj apartenas al tiu ĉi organizaĵo.

Turkmenio: orfejo por blindaj infanoj

En la aŭtuno de 1934, Vasilij Eroŝenko foriris al Turkmenio. Komence li vivis en Aŝgabato, kaj ekde la majo, 1935 – en Kuŝka, kie laŭ peto de la turkmena registaro li en tiu ĉi respubliko organizis la unuan internulejon por blinduloj, kiun li estris de 1935 ĝis 1942, poste estis vicdirektoro, pli poste ĝis 1945, laboris kiel instruisto. Ĝuste ĉi tie Vasia Klyč (tiel la turkmenaj infanoj nomis Eroŝenko) metis la bazon de blindul-instruada pedagogio en Centra Azio. Ellerninte la turkmenan lingvon, Vasilij Eroŝenko kompilis la turkmenan brajlan alfabeton kaj pretigis la unuajn naciajn lernolibrojn por blinduloj laŭ la tiutempaj instruprogramoj de ĝeneralaj lernejoj. Li ankaŭ preparis la vortaron de rusa-turkmena lingvoj, kiun dum vesperoj li legis al infanoj (*Патлань*, 2020).

Oni rakontas, ke Vasilij Eroŝenko mem elektis la lokon por la orfejo. Li ankaŭ preparis la instruprogramon kie krom la fakoj de ĝenerala edukado estis naĝado, gimnastiko, kolektado de kuracherboj. Vasilij Eroŝenko edukis siajn lernantoj celante, ke ili iĝu plenrajtaj, sanaj korpe kaj anime homoj. Li mem estis bonega ekzemplo por siaj lernantoj. Li donis ĉiujn siajn fortojn al la infana internulejo kaj en pli malfacilaj tempoj li fordonis ankaŭ la salajron de la direktoro, aĉetis manĝaĵojn per sia propra mono, tiel kompletigante la magrajn porciojn donitajn laŭ kartetoj. Nomi lin direktoro en la kutima senco de tiu vorto ne eblas, ĉar li ne nur ne havis kabineton de direktoro, sed eĉ ne havis apartan ĉambron. La direktoro dormis kune kun la lernantoj ne pro tio ke ne eblis trovi komfortan angulon en la domo. Li estis konvinkiĝinta, ke tiamaniere li estos pli proksima al siaj lernantoj kaj estos pli komprenebla por ili. Kaj kiam oni demandis ĉu la infanoj ne lacigas lin, li respondis ridetante: „Kial la infanoj lacigu min? Ili ja dormas nokte“ (citita laŭ *Pershin*, 1971).

Samtempe Vasilij Eroŝenko verkis poezion kaj prozon, ludis ŝakon. En leteroj al siaj amikoj, li skribis ke li loĝas proksime de landlimo al Afganistano kaj ke por atingi lian lokon oni bezonas specialan permesilon. Li petis siajn amikojn skribi en la rusa, ĉar Esperanto vekis multe da suspekto. La sekurecservuloj neniam lasis Vasilij Eroŝenko en trankvilo pro la abunda korespondado en multaj lingvoj de la mondo. Pro tiu kialo Vasilij Eroŝenko tiam ĉesis korespondadon kun eksterlandaj amikoj. Li estis konsiderita germana spiono en Hindio, sovetia spiono en Japanio, kaj radikala anarkiisto en Ĉinio. Oni ne scias, kia spiono li estis konsiderata en iama Sovetunio, kial li estis konstante observata, kial liaj leteroj estis malfermataj, kaj Vasilij Eroŝenko mem estis multfoje pridemandita, kial oni detruis liajn arkivojn? Ĉi tiuj demandoj estos responditaj nur kiam la KGB-arkivoj estos malsekretigitaj. Kiam la milito ekis, al la malfidinda direktoro postrestis nur instruista ofico kaj la institucio baldaŭ estis translokigita for de la landlimo kun Afganio.

Vasilij Eroŝenko konstante zorgis pri kompletigo de kunlaborantaro por la orfejo. Ne estis facile allogi Antonon Ivanovon, Zinaida kaj Aleksandr Shaminojn kaj aliajn

En ĉi tiu konstruaĵo, en la vilaĝo Morgunovka, proksime de la urbo Kuška situis la respublika hejmo por blindaj Infanoj (foto el la libro „Verkisto kaj publicisto V. J. Eroŝenko", kompilis A. I. Sizova. Moskvo: Tutrusia Societo de Blinduloj, 1990)

kunlaborantojn, veni de la grandaj urboj por labori en la profunda provinco. Dum unu jaro administri la financojn de la institucio, helpis Nina, la fratino de Vasilij Eroŝenko. Vasilij Eroŝenko klopodis, ke infanoj akiru ne nur sciojn, sed ankaŭ praktikajn kapablojn. „Kompreneble, ne ĉiuj kapablus forlogi spertajn homojn de Moskvo al Kuŝka... Sed eĉ la analfabeta Anna Roŝĉupkina, kiun li persvadis dum unu el siaj someraj ferioj kaj alportis el vilaĝo apud Obuĥovka, estis ora trovaĵo por la infanoj: blinda, ŝi ne nur mem povis triki ŝtrumpojn, pugnogantojn, koltukojn, sed ŝi ankaŭ mirinde instruis tion al infanoj. Dekoj da pakaĵoj kun varmaj, manfaritaj aĵoj de liaj „senpovaj" infanoj estis senditaj al la fronto!" (citita laŭ *Polyakovskii*, 2000).

Kiel iam en Birmo, same ankaŭ ĉi-tie, Vasilij Eroŝenko kolektis siajn estontajn lernantojn el foraj vilaĝoj. Gepatroj ne volonte siajn infanojn lasis iri al lernejo, ili imagis ke tiuj gefiloj estas ilia malfeliĉo, tial volis mem prizorgi ilin, kaj la klero laŭ ilia opinio ne estis bezonata por blinduloj.

La 1-an de septembro, 1935, la unua lernejo por blindaj infanoj en Turkmenio komencis la lernejan jaron. Vasilij Eroŝenko instruis historion kaj rusan, turkmenan, anglan lingvojn. Instrui al blinduloj ne estis facile – multaj el ili jam delonge perdis

Vasilij Eroŝenko (la kvina de maldekstre en la dua vico) inter kolegoj kaj lernantoj de la blindulorfejo en Turkmenio, 1939
(retaliro: http://eroshenko.org.ru/eroshenko-glazami-ego-sovremennikov)

intereson pri ĉio. Vasilij Eroŝenko instruis al la infanoj tion, kion li mem sciis: marŝi sen gvidisto, ami la sunon, teron, akvon, moviĝon, ne cedi al malfacilaĵoj, pasie legi, ŝakludi, naĝi – li mem naĝis perfekte kaj eĉ plonĝadis en glacia montara rivero.

Krom la lecionoj Vasilij Eroŝenko organizis la okupojn por infanoj. La infanoj muzikis, kantis, aktoris, koncertis por la lokaj loĝantoj. Vasilij, kiel sperta vojaĝanto, instruis la infanojn marŝi en la montoj, naĝi, sekure transiri montan riveron. En 1940, en la institucio jam estis unua kaj dua klasoj. Estis uzataj la brajlaj lernolibroj en turkmena lingvo, preparitaj de Vasilij Eroŝenko. Dank‘ al lia persisto, la lernolibroj estis presitaj en Moskvo.

La lernantoj respektis kaj amis Vasilij Eroŝenko, kaj li ĉiam estis bonvola, respektis la lernantojn, kaj klopodis disvolvi ilian sendependecon. Tion la infanoj precipe ŝatis. Instruisto ofte venadis al ili vespere, rakontis fabelojn, interesajn rakontojn pri siaj vojaĝoj tra diversaj landoj. Printempe kaj somere la lernantoj kun sia amata instruisto multe da tempo pasigis en naturo. Li instruis infanojn rekoni plantojn, orientiĝi en spaco. La tempoj estas malfacilaj kaj malsataj. Por ĝisvivi, ili mem prizorgis la ĝardenon, kultivis legomojn, faris aliajn taskojn. La lernejo havis helpbienon: ĉirkaŭ tridek ŝafojn, ĉevalon, du azenojn, ĉirkaŭ unu hektaron da parcelo, kie ili kultivis hordeon kaj legomojn. Ĉiuj lernantoj laboris en la bieno. Kaj vespere,

ankoraŭ sen plena mallumo, kiam cikadoj plenigis per siaj sonoj la malnovan sudan fortikaĵon, kolektiĝis ĉirkaŭ Eroŝenko ĉiuj: kaj malgrandaj, kaj plenkreskuloj, kaj blinduloj, kaj vidantoj. Li sciis rakonti multajn fabelojn, nur neniu sciis, ke ĉiujn li mem verkis! En liaj magiaj fabeloj la Luno de Justeco kaj la Suno de Libereco lumis, la Montoj de Feliĉo blankis kaj blue brilis la Maro de Beleco. **La infanoj neniam pripensis kiel ili vivos, kiam venos la tempo forlasi la orfejon. Vivo sen Vasilij Jakovleviĉ – neniam tia ideo venis al iliaj kapoj, ĉar por ĉiuj li estis kaj instruisto, kaj patrino, kaj patro. Ĉion, kion ili sciis, ĉion, kion ili scipovis fari, pri kio ili revis, kion ili esperis – la tutan ilian nunan kaj estontan vivon eblais reprezenti per cirkloj, kies centro estis Vasilij Jakovleviĉ** (citita laŭ *Поляковский*, 2000).

Lidija Reunova, blindulino el Aŝgabato, pri Vasilij Eroŝenko, sia unua instruisto, 50 jarojn poste rakontis: „Vasilij Jakovleviĉ instruis nin kolorigi la nokton... Ni sindoneme amis kaj respektis lin kiel patron, nomante lin en la turkmena urus ata – la patro de rusoj".

Kolegino Zinaida Šamina, memoras, ke pedagogojn kaj aliajn laboristojn Vasilij Eroŝenko elektadis el la „malsuperaj tavoloj", dirante, ke „honesta homo estas pli bone ol edukita malhonesta kunlaboranto". Tamen li mem kiel estro de la tuta institucio ne estis tre praktika, kaj multaj trompadis lin (*Панков*, 2017). Zinaida Šamina plurfoje karakterizis Eroŝenko kiel mildan kaj naivan kvazaŭ infano personon. Kiam la malhonesta ekonomo lasis la orfejon sen pano, la instruistoj proponis, ke la direktoro tuj maldungu la ŝteliston. Tamen, li defendis la ekonomon, ĉar tiu estis la vivtenanto de sia familio. Tiam la instruistoj ŝerce proponis al direktoro rekompensi la mankon el sia propra poŝo. Evidentiĝis, ke Eroŝenko nome tion jam estis farinta.

En Turkmenio, Vasilij Eroŝenko organizis infanajn koncertojn en ukraina lingvo por la homoj de la vilaĝo Morgunovka, por la enmigrintoj el Ukrainio, kaj por la plej junaj samlandanoj li surscenigis la infanan operon „Koza-Dereza" de ukraina komponisto M Lisenko (*Микóла Віта́лійович Ли́сенко*, 1842–1912). La opero havis grandegan sukceson. La spektantoj ne povis kredi, ke ĉiuj infanoj, partoprenantaj en la teatraĵo, estas blindaj (*Харьковский*, 1978).

Ekde novembro 1934 ĝis septembro 1945 Vasilij Eroŝenko vivis en Turkmenio, kolektante infanojn en la vilaĝoj por la Respublika Orfejo de Blinduloj No. 1 ĉe la popola edukada komisariato de Turkmenio. Tiu ĉi malgranda orfejo (de 13 ĝis 22 lernantoj), kie funkciis metiejoj por lignaĵistoj, produktado de ŝnuroj kaj korboj, ludis gravan rolon batalante kontraŭ infana senhejmeco kaj neglekto. La infanoj estis ne nur blindaj aŭ viddifektitaj – la gepatroj de multaj el ili estis punitaj kiel „malamikoj de la popolo". La infanoj memoris Vasilij Eroŝenko kun dankemo dum ilia tuta vivo (retaliro: http://kidskazka.ru/biblio/6937_Prosvetitel_slepyx_i_skazochnik_Vasilij_Eroshenko.html).

Ekde la 1-a de aprilo 1935 ĝis la 19-a de julio 1942 Vasilij Eroŝenko laboris kiel direktoro de la unua blindula infanhejmo, kiun li mem fondis en Turkmenio, kaj de

julio 1942 ĝis la 1-a de junio, 1945 – kiel instruisto, ĉar li estis degradita pro trovitaj financaj mankoj. Poste, sub la gvidado de ne specialisto, la eduka institucio perdis sian specifecon kaj iom post iom iĝis simila al kutima eduka institucio. Oni povas supozi, ke pro tiu kaŭzo Vasilij Eroŝenko forlasis infanan internejon en 1945. Oni opinias, ke al la vegetarano verkisto konvenis vivo en Turkmenio, kie oni kultivitas multajn legomojn kaj fruktojn. (*Панков*, 2017).

En 1945 Vasilij Eroŝenko forlasis Turkmenion. En la memoro de siaj edukitoj li restis kiel ekstreme honesta, amanta veron persono, interesa rakontisto. La rememorojn pri la vojaĝoj de la instruisto lernantoj perceptis kiel fabelojn, ili ŝajnis tiom nekutimaj kaj interesaj por ili. Kun kelkaj lernantoj Vasilij Jeroŝenko korespondadis dum la tuta vivo, interesiĝis pri la sorto de siaj edukitoj.

Dum 1945–1946 Vasilij Jeroŝenko laboris en muziklernejo por blindigitaj en la milito plenkreskuloj en Zagorsk (nun Sergijev Posad), kie li instruis plenkreskulojn brajlan skribon, rusan lingvon kaj literaturon, muzikon. Li laboris tie dum mallonga tempo, kaj la lernejo mem ekzistis nur ĝis la jaro 1951.

Denove al Centra Azio la verkisto venis en 1948 – li partoprenis en la kongreso de blinduloj de Uzbekio. Revenante, li vizitis Aŝgabat, Krasnovodsk kaj vojaĝis tra la Kaspia Maro, sur la rivero Volga.

Ekde la 1-a de oktobro, 1946 ĝis la 16-a de junio, 1948 li laboris kiel instruisto de angla lingvo en la Moskva lernejo por blindaj infanoj, kiun li mem finis ankoraŭ antaŭ la revolucio. Lia iama lernanto Jevgenij Agejev en la intervjuo uzita en la dokumenta filmo „Verda stelo de Vasilij Eroŝenko“ (1990), rakontis la epizodon de lerneja vivo: aŭdinte knabojn brue ludantajn en la lerneja korto, saltantajn unu super la alia, la instruisto Vasilij Eroŝenko demandis ilin, kion ili ludas. Verŝajne, la nomo de la ludo nenion diris al li kaj instruisto petis klarigi pli precize. Tiam Jevgenij proponis al la instruisto kliniĝi kaj mem transsaltis lin. Ĉion vidis direktoro de la lernejo. Ekestis skandalo. Pro tiu „grandega malobservo de pedagogia etiko“, Vasilij Eroŝenko estis maldungita de instruista posteno. Rimarkinte, ke Vasilij Eroŝenko tre amike komunikas kun la lernantoj, la lernejestroj ekdeziris trovi pli solidan instruiston. Zinaida Šamina, la aŭtorino de brajla lernolibro por muziknotoj, kiu gardis amikan rilaton kun Vasilij ekde la tempo de lia reveno al Sovetrusio ĝis la tago de morto, memoras, ke Vasilij Eroŝenko estis maltolerema ne nur al siaj propraj mankoj, sed ankaŭ ne pardonis erarojn al aliaj, ne ŝatis prisilentojn, troan respekton pro rango, kompromisojn (*Шамина*, 1961).

En la jaro 1949, Vasilij Eroŝenko laboris en la Taŝkenta Lernejo por Blinduloj ĉe societo de blinduloj en Uzbekistano (*Мурашковска*, *Мурашковский*, 1986–1987).

En la iama Sovetunio Vasilij Eroŝenko publikigis malmultajn artikolojn en la rusa kaj nur en revuoj por blinduloj, presitaj brajle. Nur ses de ili estas konataj ĝis nun: la eseo „Blinduloj de la Okcidento kaj Oriento“ („Vivo de blinduloj“, 1927, n-ro 11), „Renkontiĝoj en Ĉukotka“ („Vivo de blinduloj“, 1930, n-roj 7-8), „Por kio la blinduloj

batalas en eksterlando“ („Kune kun vidantaj“, 1931, n-ro 1), „Sub la klabo de miliarduloj“ („Kune kun vidantaj“, 1932, n-ro 3), „La unua ŝakturniro de blinduloj en Sovetunio“ („La vivo de blinduloj“, 1938, n-ro 15), „Feliĉa infaneco“ („La vivo de blinduloj“, 1938, n-ro 19) (*Патлань*, 2020)). Sendube, la verkisto, kiu estis subtaksita en Rusio, sentis grandan seniluziiĝon: „Mi ne leviĝis sur la scenejon, mi estis simple forpuŝita de ĝi. Kiel la ŝakludantoj diras tio nomiĝas „fuk“. Ĉu ne intrigo? Sed ni, la kreintoj de fabeloj, abomenas tiajn rektdirajn historiojn – ili estas tro klaraj por ke ni kredu ilin. Ĉu ne tiel, Libelo? Vivo en la mallumo instruis aliajn blindulojn kredi je ĉio kaj nenien enmiksiĝi. La plej multaj el miaj kunagantoj, kiuj kredis ĉion, kion diris la instruistoj, nun fidas ĉiun vorton de la registaro. Ili okupis bonan pozicion en la socio, ilin ĉirkaŭis zorgemo kaj amo de proksimuloj. Kaj mi nenion atingis. Vagadi en la mallumo, dubi pri ĉio... Garantiulo de duobla malliberejo – de blindeco kaj de soleco...” (citita laŭ *Полаяковский*, 2000).

En la patrujo: fremdulo inter siaj homoj

En la jaro 1950, la verkisto decidis viziti siajn iamajn studentojn. Nur en Turkmenio kolektiĝis ĉirkaŭ kvindeko da liaj ekslernantoj. Al sia iama lernanto Nurum Mamiyev Vasilij Eroŝenko iam diris, ke li trovis sian kontinuecon en siaj lernantoj kaj tial li estas feliĉa. Vasilij Eroŝenko pasigis en Turkmenio 11 jarojn, instruante la malgrandajn turkmenojn per blindaj okuloj vidi la mondon. La lernejon en Kuška li konsideris kiel unu el la ĉefaj aferoj en sia vivo. Reveninte el Turkmenio, Vasilij intencis marŝi de Obuĥovka al Vladivostok kun gvidhundo. Ne sukcesis. Malsano malhelpis efektivigi tiun ĉi planon.

Vasilij Eroŝenko revenis al Obuĥovka en 1951. Ĉi tie li verkis kaj sistemigis siajn verkojn. La sanstato de la verkisto ege malboniĝis. La kuracisto, kiu anoncis al la asistanto tiutempe la fatalan diagnozon „cancer“ (kancero), eĉ ne suspektis, ke tiu ĉi modesta blinda vilaĝa malsanulo scipovas multajn lingvojn, inkluzive la latinan, en kiu estis anoncita la verdikto. Vasilij Eroŝenko iris al siaj lastaj vojaĝoj – por adiaŭi siajn proksimulojn. Li vizitis Jakution, Karelion, Ĥarkovon kaj Donbason.

De Taŝkento, en julio de 1951, li por dek tagoj iris al Jakutio, tie li provis akiri la laboron kiel instruisto de angla lingvo en vilaĝa okjara lernejo por blinduloj, sed sen dokumentoj pri lia klereco, li ne estis akceptita, kvankam instruiston lernejo tre bezonis. En Jakutio, Vasilij Eroŝenko interesiĝis pri la kolonio de lepruloj situanta en la areo Sosnovka proksime de la urbo Viluisk, fondita de la brita flegistino Kayte Mardsenfine en la 19-a jarcento. Tiu ĉi kolonio ekzistis ĝis 1960. Ŝajnas, ke Vasilij Eroŝenko volis ricevi la postenon tie (*Патлань*, 2019).

La vera tragedio de tiu kuraĝa kaj forta viro estis ne blindeco, kiun li venkis, sed la ripeta detruado de la unikaj arkivoj, kiuj gardis liajn ne publikigitajn verkojn, la rakontojn pri liaj renkontiĝoj kun eminentuloj en Eŭropo kaj Azio, leterojn. La historio konas ne unu tragedian sorton de manuskriptoj de famaj homoj: la manuskriptoj de Ciolkovskij estis plurfoje detruitaj de fajro, la unua romano de N. Ostrovskij estis perdita dum ekspedo, kelkaj partituroj de Bach kaj Paganini estis perditaj, la partituron de la „Unua Simfonio“ de Borodin perdis lia proksima amiko Stasov (*Мурашковска, Мурашковский*, 1986–1987). **La perdoj de la manuskriptoj de Eroŝenko estas eĉ pli doloraj.** En la eduka institucio de Kuška restis du libroŝrankoj kun libroj de la persona biblioteko de Vasilij Eroŝenko, kiun li kolektis dum multjaraj vojaĝoj tra diversaj landoj. Estis multaj donacitaj libroj kun aŭtografoj de amikoj – vere tre raraj eldonaĵoj. La lernantoj kaj instruistoj de la orfejo devis danki al Vasilij Eroŝenko, kiu lasis ĉi tiun posedaĵon por kelkaj pliaj jaroj. Tamen okazis la malo: kiam la verkisto revenis al Kuŝka por preni librojn, li teruriĝis komprenante, ke la ŝrankoj estas malplenaj. Lia lernantino Zinaida Tokareva en siaj memuaroj citis la tristan frazon, kiun Vasilij Eroŝenko eldiris apud la malplenaj ŝrankoj: „Tio estis la memoroj de la pasintaj jaroj. Kaj per tiuj ili hejtis la fornojn“ (*Пашнев*, 1971). En

internejo de blindaj infanoj de Turkmenio estis bruligitaj liaj personaj libroj – la verkisto, alveninta en 1948, ilin ne plu trovis (*Токаева*, 1962).

Sentante la proksimiĝon de la lasta horo, Vasilij Eroŝenko finis organizi sian arkivon, kolektis kaj sistemigis ĉiujn siajn notojn. Tri tagojn antaŭ sia morto, Vasilij Eroŝenko finis sian lastan verkon. La verkisto planis siajn arkivojn lasi al la societo de blinduloj. Pli frue liaj arkivoj en Moskvo kaj Kuŝka jam bruliĝis. La lastaj vortoj de Eroŝenko estis: „Mi povas trankvile morti. Jen la fruktoj de mia longa pripensado" (citita laŭ *Периин*, 1991, p. 9). La nevino Vera Serdiukova, kiu laboris kiel instruistino en la lernejo Obuĥovka, laŭ la peto de sia onklo forsendis la pretan manuskripton al Moskvo al Anna Lvovna Sterlina. Post fino de la manuskripto, tri tagojn poste, la 23-an de decembro1952, en 63-a vivojaro, Vasilij Eroŝenko mortis pro kancero. La mesaĝo pri lia morto atingis Moskvon pli rapide ol manuskripto. **Ana Sterlina, timante ke per kancero eblas infektiĝi eĉ tra papero, ĵetis la manuskripton, senditan al ŝi, en la fornon.** Tio estis la plej granda perdo de blinda verkisto. La lasta manuskripto de Vasilij Eroŝenko, en kiun li metis sian tutan animon kaj koron, fariĝis cindro sen malkaŝo de ĝia enhavon al iu. (*Красюк*, 1998). La verkisto eĉ ne suspektis, ke liaj longaj lastaj pripensoj malaperos senspure, kaj la lasta verko neniam estos legita.

Sciante, ke la fino proksimiĝas, Vasilij Eroŝenko kolektis sian arkivon, pakis ĝin kaj verkis testamenton: la arkivo estas destinita al Tutrusia Societo de Blinduloj. Ŝarĝita ĝis la supro, kamiono ZIS-5 forveturigis la arkivon de la verkisto el Obuĥovka al Stary Oskol. **La unua versio de la sorto de la arkivo** – pro burokratia neglektemo, lia arkivo ne estis transdonita al la Societo de Blinduloj, sed estis alportita al la firmao de la Societo de Blinduloj en Stary Oskol kaj bruligita en la hejtilejo. **La dua versio** – la arkivo estis bruligita en la keloj de la Sekureco (КГБ). Ekzistas ankaŭ **la tria versio**. En unu el la numeroj de januaro en 2011, ĵurnalisto de la gazeto „Оскольский край" („Oskola Regiono"), Vladimir Ĵeretnikov (*Владимир Жеретников*), en la artikolo „Poeto, instruisto, civitano", malkaŝas la nomon kaj la familian nomon de homo, kiu bruligis la arkivon de Vasilij Eroŝenko. En la artikolo oni skribas, ke verkisto, arkivon, ŝargitan al kamiono ZIS-5, sendis al Vladimir Bogdanov (Владимир Богданов), tiutempa estro de la blindulsocieto de Stary Oskol. En konversacio kiu okazis antaŭ 25 jaroj, Vladimir Bogdanov konfesis al ĵurnalisto: „Mi trapasis la militon, kaj mi ne sentis timon, sed ĉi tie mi ektimis kaj bruligis ĉiujn paperojn." Tiu ĉi versio ankaŭ estis popularigita en la dokumenta filmo de Svetlana Matushkina „La fama blindulo" (telekompanio „Мир Белогорья", 2012).

Simila sorto atendis la novelon de A. Ĥarkovskij pri Vasilij Eroŝenko „La homo, kiu vidis la mondon" (Moskvo, 1978) – ĝi estis malpermesita post la elmigro de la aŭtoro. Tamen, la libro sukcesis eniri en la liberan mondon: en 1983, ĝia japana traduko estis eldonita en Tokio, kaj la teatraĵo „Blindsight" („Blinda vidkapablo") pri la vivo de Vasilij Eroŝenko atingis sukceson en la Novjorka teatro „La Mama" (*Харьковский*, 2012).

Eblas detrui la manuskriptojn, bruligi ĉiujn arkivojn, sed ne eblas estingi la fajron de la krea spirito. Laŭ Viktor Perŝin, la lernanto de Vasilij Eroŝenko, „li riĉigis

homojn kiujn renkontis, kvazaŭ varmigis ilin per aldona lumo kaj varmo. Li ankaŭ estis la portanto de la plej rara interna perlo, kiu altiras aliajn animojn“ (*Першин*, 1991, p. 9). Verkoj, skribitaj de Vasilij Eroŝenko en Japanio kaj Ĉinio, eĉ ĝis 1962 estis nek tradukitaj al rusa lingvo, nek publikigitaj en iama Sovetunio. Ĝis hodiaŭ, la dosiero de Vasilij Eroŝenko restas sekretigita en la KGB-arkivoj. Informoj estantaj en tiu dokumento helpus kompletigi la biografion de la verkisto.

Ne estas mirinde, ke al la verkisto – simbolisto Vasilij Eroŝenko estis proksima la verkaro de la romantikulo Miĥail Lermontov (1814–1842). Sendube li legis la romanon „La heroo de nia tempo“ (1840), la fabelon kun motivoj de blindeco „Aŝik – Kerib“ (1837) kaj la poemon „La Velo“ (1832), por kies ilustrado M. Lermontov mem pentris la akvarelon, Vasilij Eroŝenko ŝatis deklami. Soleca velo, blankiĝanta en la malproksimo – alegorio de eterna vagadulo, soleco kaj libereco. Eblas, ke Vasilij, legante ĉi tiun poemon, sentis sin kiel tiu soleca velo.

M. Lermontov „La Velo“ („La soleca velo blovas“)

Белеет парус одинокой	Blankadas velo unusola
В тумане моря голубом!..	En la nebula mara blu’.
Что ищет он в стране далекой?	Ĝi kion lasis, kion volas
Что кинул он в краю родном?..	En fremdaj vastoj serĉi plu?
Играют волны — ветер свищет,	La ondoj ludas, vento spiras,
И мачта гнется и скрыпит...	La maston fleksas kun fervor’;
Увы! он счастия не ищет	La velo ĝojon ne aspiras,
И не от счастия бежит!	Nek de la ĝojo kuras for!
Под ним струя светлей лазури,	Ĝin kronas ora bril’ ĉiela,
Над ним луч солнца золотой...	Sub ĝi lazuras l’ onda spac’.
А он, мятежный, просит бури,	Sed ŝtormon serĉas ĝi ribela,
Как будто в бурях есть покой!	Kvazaŭ en ŝtormoj estas pac’.

(Traduko de K.Gusev, retaliro: https://lyricstranslate.com)

Leginte ĉi tiun poemon, Vasilij Eroŝenko foje diris: „Mia Dio, pri mi estas skribita, ne aliel! Verdire, kontraŭe al la normala homa deziro – havi trankvilon, mia animo ĉiam serĉis ŝtormojn“ (citita laŭ *Полаяковский*, 2000).

En la lastaj jaroj de sia vivo Vasilij Eroŝenko sentis grandan aflikton: „Neniu krom mi korektos la evidentan maljustecon, kiun tamen oni ne povas nomi maljusteco. Mi priploras ĉi tiun fakton en la aĝo de sesdek jaroj, kaj estas nur unu kialo por miaj larmoj: Vasilij Eroŝenko, kiu vane nomas sin literaturisto, ne havas eĉ unu, eĉ etan libreton, en la rusa. Mi ne ekzistas por rusoj. Miaj libroj

La lasta foto de Vasilij Eroŝenko, Obuĥovka, 1952 (foto el la persona arkivo de B. Osykov (retaliro: (http://www.belgorodbiblioteka.ru/Files/foto.html)

estis eldonitaj en la japana, la ĉina, kaj Esperanto-parolantoj legis miajn verkojn". (citita laŭ *Поляковский*, 2000). Aŭtune de la jaro 1952 Zinaida Ŝamina, kolegino de Vasilij Eroŝenko, kun kiu li kunlaboris en la blindulorfejo en Turkmenio, ricevis de verkisto la lastan lian foton faritan de loka fotisto: Vasilij Jakovleviĉ sidas sur profunda plektita seĝo, apogante sin sur la kusenoj, sulkiĝintaj, sekiĝintaj fingroj forte tenas kajeron plenskribitan per brajlo, kvazaŭ timante ellasi ion, kio ankoraŭ ligas lin kun la vivo, la vizaĝo estas trankvila, sed koncentrita, kvazaŭ li aŭskultus la sonojn de la pasinteco, kvazaŭ memorus la vojon trairitan (*Шамина*, 1961).

Lidija Ruckaja, blinda poetino el Belgorodo, esprimis sian respekton al la verkisto pe tiaj versoj:

Ерошенка Василий	Jeroŝenko Vasilij
Наш земляк боевой	Samlandano fervora,
Отдал все свои силы,	Tutan forton oferis
Чтоб во сне стать звездой,	Por steliĝi en foro,
Чтоб сиять излучая	Por radiu de l'stelo
И любовь, и тепло,	Amo per varma ondo,
Чтоб от края до края	Por memoru lin ame
Мир весь помнил его	Dum jarcentoj la mondo

Traduko de M. Bronŝtejn

Nun, post multaj jaroj, la forgesitaj verkoj de Vasilij Eroŝenko aperas en rusa (parto el ili – brajle), ĉina, japana lingvoj kaj Esperanto, dismetitaj en diversaj revuoj. Tamen ĝis nun ne ĉiuj liaj verkoj estas tradukitaj el la japana, la ĉina kaj Esperanto.

En Japanio, Vasilij Eroŝenko nomiĝis Ero-san, en Ĉinio – sinjoro Ailo aŭ Ailosenke. Blindaj birmaj infanoj nomis lin kokoĝi – pli aĝa frato, kaj lernantoj de la turkmena lernejo por blinduloj respekte nomis lin urus-ata – rusa patro. Ĉiuj tiuj nomoj apartenas al unu persono – verkisto, vojaĝanto, esperantisto, instruisto, muzikisto, ŝakludanto Vasilij Eroŝenko.

La tera vojo de la senlaca vojaĝanto finiĝis **la 23-an de decembro, 1952** en Obuĥovka. Vasilij Eroŝenko mortis, forgesita de ĉiuj, preskaŭ en mizero. La verkisto estis entombigita en la tombejo de la vilaĝo Obuĥovka. **„Mi vivis, vojaĝis, verkis" – jen kion oni devos gravuri sur mia tomboŝtono. Mi neniam pensis pri famo. Verkado ĉiam estis por mi same natura kiel spirado. Vivo estas la ĉefa arto, ĉar vivo mem estas dramo, kaj sur ĝia grandega scenejo ĉiu persono ludas sian rolon"** (citita laŭ *Поляковский*, 2000). Klaudia Charitonova (*Клавдия Харитонова*), loĝantino de Obuĥovka, memoras, ke oni entombigis la verkiston tre modeste. Monumento ne ekzistis dum longa tempo. Alia loĝantino de

Obuĥovka, Anna Ŝapovalova (*Анна Шаповалова*), asertas, ke monumento al la verkisto estis konstruita nur tiam, kiam japanoj kiuj alvenis al Moskvo komencis interesiĝi pri Vasilij Eroŝenko.

Laŭ la peto de Matsujiro Tanaka (田中松次郎, 1899–1979), la tiama vicprezidanto de la societo „Japanio – USSR“, tiutempa diplomiĝanto de Moskva Universitato Tecuo Jonekawa (米川哲夫, 1925–2020), per letero turnis sin al la prezidanto de vilaĝa konsilio de Obuĥovka petante sendi foton de la tombo de Vasilij Eroŝenko. Tion konfirmas la intervjuo kun Aleksandr Agejev (*Александр Агеев*) membro de la asocio de blinduloj en Stari Oskol, kiu estis uzita en la filmo „La verda stelo de Vasilij Eroŝenko“ (1990). Tiu homo rakontis, ke en 1957 venis al li Aleksandr Achanosov (*Александр Аханосов*), la sekretario de la distrikta Komunista Partio, kaj demandadis pri Vasilij Eroŝenko. La sekretario ricevis ordonon de Moskvo trovi la tombon de Eroŝenko, rigardi en kia stato troviĝas la monumento. La sekretario transdonis tiun ĉi ordonon al Aleksandar Agėjev, kiu, veninte al Obuĥovka, kun la helpo de loka loĝanto apenaŭ trovis la tombon de la verkisto, en forlasita tombejeto, tretita de hejmbestoj, kun falintaj krucoj. Estis farita la tomba elstaraĵo, mendita la monumento. Poste la foton de la monumento oni portis al la tiama sidejo de asocio de verkistoj en Moskvo, kie ĝin atendis kvar japanoj, de kiuj unu perfekte parolis ruse. La japano demandis kiel Vasilij Eroŝenko vivis en siaj lastaj jaroj, ĉu li ricevadis pension. Aleksandr Agejev konfirmis, ke pension li ricevadis, kvankam la verkisto ne havis pension de handikapulo. Tiutempe, en la eksa Sovetunio, homoj kiuj perdis la vidon en infanaĝo, ne ricevis pension de handikapo. Estis malfacile vivteni sin per tre malgranda pensio de maljunulo. Tri monatojn antaŭ sia morto, Vasilij Eroŝenko ricevis la unufojan financan subtenon. Estas malfacile imagi, de kio kaj kiel vivis la malsana verkisto post reveno al sia patrujo. Dum la lastaj monatoj de vivo pri Vasilij Eroŝenko zorgis la filino de fratino Pelageja, instruistino de baza lernejo en Obuĥovka, Vera Serdiukova (*Вера Ивановна Сердюкова*, 1915–1969).

Se ne interesiĝo de japanaj amikoj pri la verkisto, neniu rememorus Vasilij Eroŝenko en lia hejmlando. La vivrakonto de Vasilij Eroŝenko memorigas pri la vivovojo de litova verkisto, muzikisto, litova armea volontulo Pranas Daunys (1900–1962). Pranas Daunys perdis sian vidkapablon batalante por la libereco de Litovio. Dum la soveta tempo, li estis forgesita, vivis en mizero. Nur post kiam Litovio reakiris sian sendependecon, en la jaro 2014 al li estis starigita monumento en Kaunas.

Malfrua rekono de la verkaro

Vasilij Eroŝenko estis la multflanka verkisto. Al lia plumo apartenas fabeloj, legendoj, rakontoj, poemoj, publicistaj eseoj. En Rusio nur en 1962 aperis la unua kolekto de verkoj de la verkisto, eldonita de Belgoroda libroeldonejo „Koro de aglo", kaj en 1964 ĉi tiun eldonaĵon reproduktis la eldonejo „Просвещение" („Klerigo"). En 1969 libro, nomita „Floro de justeco", estis publikigita en Kievo en ukraina lingvo. A. Ĥarkovski rimarkas, ke Vasilij Eroŝenko revenis al sia patrujo ne kiel fama verkisto (plejparte pri li sciis esperantistoj), ne kiel fama vojaĝanto (rakontoj pri tio restis en la revuoj de Orientaj landoj), sed kiel unu el mil da ordinaraj blinduloj. (*Харьковский*, 1978).

Jam en Japanio oni rimarkis, ke la verkaro de Vasilij Eroŝenko distingiĝas per la originaleco de arta koncepto, lingvo kaj komponado (*Аникеев, Такеда*, 2017). En Japanio, la unua kolekto de verkoj deVasilij Eroŝenko, „Yoakemae no uta" („Kanto de tagiĝo"), redaktita de Akita-Ujaka, estis publikigita en 1921. Ĝi enhavis 14 verkojn: „Semai kago" („La mallarĝa kaĝo"), „Sakana no kanashimi" („Tristo de fiŝeto"), „Gakusha no atama" („La kapo de klerulo"), „Numa no hotori" („Apud marĉo"), „Ippon no nashi no ki" („La pirarbo"), „Washi no Kokoro" („La koro de la aglo"), „Matsu no ko" („La pinarbeto"), „Haru no yoru no yume" („Somernokta sonĝo"), „Kawarineko" („La stranga kato"), „Mokusei no Ningenshin" („Homoj-dioj sur Jupitero"), „Oncho no rampi" („Disipitaj gracoj"), „Musukyosha no junshi" („La morto de sendia viro"), „Kofuku no fune" („Feliĉboato"), „Canaria no shi" („Morto de Kanario").

En la sama jaro estis publikigita la dua kolekto, „Saigō no tameiki" („La lasta spiro"). Krom kvar verkoj de Vasilij Eroŝenko – poemoj en Esperanto kaj ilia traduko al la japana „Jipusionna no Yogen" („Sorĉo de ciganino"), triakta teatraĵo por infanoj „Momoiro no Kumo Dowageki sammaku" („La persikkolora nubo"), „Umi no ojo to ryoshi" („La reĝino de la maro kaj la fiŝkaptisto"), „Futatsu no chiisana shi" („Du malgrandaj mortoj") ĝi inkludas rememorojn pri Vasilij Eroŝenko skribitajn de lia amiko Eguti Kan, kaj komenton pri la teatraĵo „La persikkolora nubo" de la kompilisto kaj redaktisto Akita-Ujaka.

En 1922, en Japanio estis eldonita la kolekto de la verkoj de V. Eroŝenko „La lasta suspiro". La trian kolekton „Jinrui no tame ni" („Por la homaro") en julio de 1923 preparis la eldonejo „Kaijosha", sed ĉio perdiĝis en fajro dum la forta tertremo en septembro. (*Аникеев, Такеда,* 2017). Oni opinias, ke dank al la klopodoj de amikoj de Vasilij, ĉi tiu kolekto estis restarigita jaron poste laŭ la unu nura restinta ekzemplero. Tiu kolekto estis ripetita en 1942.

En 1953, la fabeloj de Vasilij Eroŝenko estis inkluditaj en la multvoluman eldonaĵon „Biblioteko de Japana Infana Literaturo". En 1956 en Tokio aperis la biografio de la verkisto „Blinda poeto Eroŝenko", pretigita de japana profesoro Takasugi Ichiro. En 1959 tiu aŭtoro ankaŭ pretigis la trivoluman kolekton „La verkoj

de Eroŝenko". La unua volumo enhavis la verkojn en la japana, la dua – verkojn en Esperanto, kaj la tria – artikolojn kaj rememorojn pri V. Eroŝenko en la japana kaj Esperanto (en 1974 estis ripeta eldono en du volumoj). En 1982 estis publikigita reviziita kaj kompletigita eldono de la libro de Takasugi Ichiro „Kanto de tagiĝo". En Japanio kaj Ĉinio estas publikigitaj multaj verkoj de Vasilij Eroŝenko en Esperanto. Dum 1979–1996, ses-voluma verkaro de Vasilij Eroŝenko estis publikigita, redaktita kaj kompilita de Mine Yoshitaka. En 1989 aperis la libro de Shōzō Fujii en Esperanto „Rakontoj de Eroŝenko: 1920-aj jaroj Tokio, Ŝanhajo, Pekino".

En Ĉinio, en 1934 kaj 1966, estis eldonita kiel aparta eldonaĵo, tradukita de Lusin, la teatraĵo „La persikkolora nubo" de Vasilij Eroŝenko. Bedaŭrinde, tiu ĉi teatraĵo ankoraŭ ĝis nun ne estis publikigita nek en ukraina, nek en rusa lingvoj.

El Esperanto al ĉina lingvo, Hu Yuzhi tradukis „Rakontoj de velkinta folio" kaj aliajn verkojn, kiuj estis publikigitaj en Ŝanhajo en 1924. Samtempe en Pekino estis eldonita kolekto de prelegoj faritaj de Vasilij Eroŝenko „Forirantaj fantomoj", li tradukis el Esperanto al ĉina lingvo kolekton da fabeloj de Vasilij Eroŝenko „Turo por fali". Tradukitaj de Lusin „Fabeloj de Eroŝenko" estis publikigitaj en Ĉinio en 1922, 1938, 1948, 1950, 1978. Kvin libroj de Vasilij Eroŝenko estis eldonitaj en Ĉinio:

„Ailuoxianke tonghuaji" („Fabeloj de Eroŝenko"). Ŝanhajo, Shanwuyin Shuguan, 1922;

„Taosedeyun" (teatraĵo „La persikkolora nubo"). Beixin Shuju, 1922;

„Ĝemo de unu soleca animo" – kolekto da verkoj en Esperanto. Ŝanhajo, 1923;

„Turo por Fali" – fabelo en Esperanto, publikigita en revua suplemento „La Verda Ombro". Tajpeo, 1923;

„Guoqu de youling ji qita" („Forirantaj fantomoj") – resumoj de prelegoj faritaj de Vasilij Eroŝenko en Pekina Universitato, Mingzhi Shuju, 1924. (Аникеев, Takeda, 2017).

„La plej multaj el la verkoj de Vasilij Eroŝenko estis eldonitaj en Esperanto. En la „Bibliografia katalogo de Vasilij Eroŝenko" kompilita de V. Taraniuk kaj E. Kovtoniuk en 2020, estas 60 verkoj de Vasilij Eroŝenko publikigitaj en Esperanto, 34 – en japana, kaj 23 – en ĉina lingvoj. Verkoj en ukraina, rusa kaj aliaj lingvoj estas la tradukoj de la menciitaj verkoj.

Ĉina literaturisto kaj tradukisto Hu Yuzhi en la antaŭparolo de la libro „Ĝemo de unu soleca animo", eldonita en Ŝanhajo en 1923 skribis: „En Japanio kaj Ĉinio, Eroŝenko tuj fariĝis fama verkisto, sed en Eŭropo malmultaj homoj aŭdis lian nomon. Ni esperas, ke la eldono de tiu ĉi libreto kontribuos, ke subtila talento de la blinda poeto iĝu vaste konata en la Okcidento kiel en la Oriento" (*Юй-Чжи*, 1962, p. 181).

La verkoj de Vasilij Eroŝenko estas ekzemplo de la sintezo de slavaj kaj orientaj spiritaj tradicioj, romantismo kaj simbolismo, ili organike eniris la trezorejon de la miljara rafinita kulturo de Japanio kaj Ĉinio (*Патлань*, 2000). Lusin nomis Vasilij



Kolekto da verkoj de Vasilij Eroŝenko, publikigita en brajlo, 1977 (foto de neidentigita fotisto)

Afiŝo, dediĉita al la 24-a Kongreso de la Asocio de Esperantistoj en Ukrainio, okazinta en Lvivo, en 2018. En la supra parto de la afiŝo – la emblemo de tiu kongreso, en la malsupra parto – foto de la memortabulo malfermita dum la kongreso, dediĉita al Vasilij Eroŝenko. En la memortabulo estas bronza portreta bareliefo de V. Eroŝenko kun la nomo kaj familia nomo en ukraina lingvo kaj en Esperanto, datoj de naskiĝo kaj morto (foto el la persona arkivo de la aŭtoro)

Afiŝo ĉe la strato havanta nomon de Vasilij Eroŝenko (foto de neidentigita fotisto)

Eroŝenko „tute travidebla revulo kun granda animo“ (*Ерошенко*, 1977, p. 28). Multaj el tiuj, kiuj skribis pri li en la eksa Sovetunio, insistis pri distanciĝo de lia naiveco, riproĉis al li la malkonsekvencon en lia mondkoncepto, la mankon de universale akceptitaj kanonoj de realismo. Sed ĉu oni povas kulpigi la naivan revulon, homon kiu en libro „La knabino kun malgrandaj piedoj“ skribis: „Dezirante iri la vojon de vivo, vi bezonas ne grandajn piedojn, sed grandan koron. Dezirante gajni en la vivbatalo, vi bezonas ne tigrajn piedegojn, virĉevalajn hufojn, sed firman volon, helan menson, kuraĝan koron, justan kaj honestan spiriton, profundan konon de la mondo“ (*Ерошенко*, 1977, p. 117) Publikaĵoj de Vasilij Eroŝenko en la rusa kaj ukraina lingvoj jam delonge fariĝis bibliografia raraĵo (*Патлань*, 2000). Unu el la kaŭzoj de la multjara forgeso pri tiu ĉi verkisto en lia patrujo estis la subtakso de profunda interna spiriteco de liaj verkoj. Tio kio donis al li la fortojn lasi klaran spuron sur la koroj de liaj amikoj kaj admirantoj en la Oriento, en lia patrujo tra la jaroj turnis sin kontraŭ li. La internacia lingvo Esperanto fariĝis por Vasilij Eroŝenko la ŝlosilo al la mondo, sed samtempe ĝi limigis la vojon por liaj verkoj al pli vasta rondo de legantoj, tre komplikis lian vivon pro persekutado de esperantistoj en la eksa Sovetunio.

Vojaĝoj helpis al Vasilij Eroŝenko „vidi“ la mondon, lia scio de multaj lingvoj permesis al li kompreni kaj malfermi la mondon en simbolaj fabeloj, sed tuto de tio fariĝis la kaŭzo de suspekto kaj persekutado en Hindio, Japanio kaj eĉ en la patrujo. Vasilij Eroŝenko ne estis anarkiisto, sed li estis maldungita el la Orienta Komunista Universitato pro anarkiismaj opinioj. Li rifuzis subaŭskulti la telefonajn konversaciojn de eksterlandanoj en Moskvaj hoteloj, sed li estis akuzita pri spionado pro komunikado en multaj lingvoj per malkomprenebla brajlo. Li studis la historion kaj filozofion de religio, registris la legendojn kaj fabelojn de multaj popoloj, sed nome lia mondkoncepto, bazita sur spirita Orienta tradicio, kristanismo, budhismo, la instruo de Lev Tolstoj estis kialo por ne publikigi multajn el liaj verkoj: ĝis nun, al rusa kaj ukraina lingvoj nur kvinono de tio kion li verkis en la dudekaj jaroj, estas tradukita (*Киценко*, 1991). Per sia vivo kaj vojaĝoj en la 20 a jarcento, Vasilij Eroŝenko daŭrigis la tradicion de blindaj ukrainaj rakontistoj, kobzaroj, vagantaj kleruloj, de kiuj, unu el la plej elstaraj reprezentantoj estis la poeto, vojaĝanta filozofo Hrihorij Skovoroda (*Сковорода Григорий Саввич*, 1722–1794) (*Патлань*, 1794).

La verkaro de Vasilij Eroŝenko elstaras pro subtila simboleco kaj ĝi memorigas la literaturan stilon de Nikolao Roerich (*Никола́й Константи́нович Ре́рих* 1874–1947). La simboloj de la suno, fajro kaj flamo estas la plej gravaj en plimulto de liaj noveloj kaj fabeloj („La koro de la aglo“, „La vintra fabelo“, „La fajro de la mondo“, „Sur la bordo“). La verkisto majstre uzis ripetojn, la ritmon de la vorto, ekzemple, en la fabelo „Koro de aglo“, kies ĉefmotivo – la kanto de agloj, revante atingi la „eterne varman kaj eterne helan sunon“. La heroo de „La popla knabo“ diras: „Kiam mi plenkreskos, mi devas transformiĝi en brullignon aŭ fariĝi torĉo, ke fordonante mian

lumon kaj varmon mi varmigus aŭ lumigus tiun ĉi mondon". Tio estas la destino de poplo. Kaj por bruli pli arde kaj por lumi pli hele, oni bezonas signon – signon de amo" (*Ерошенко*, 1977, p. 94). Vasilij Eroŝenko ne malkaŝas al ni, kia estas tiu signo, sed la vortoj de Nikolao Roerich povas esti la klarigo: „La lingvo de koro kaj de amo estas la sama. Se la signo de kolero estas minuso, akra kiel sago, tiam la signo de amo estas pluso, eterne brilanta kruco, kiu de pratempoj lumigis la konscion kaj kontribuis al la levigo de la vivo" (*Рерих*, 1998, p. 346).

Ni legas hindajn rakontojn pri Baital, rakontojn pri Budho-Gautama, legendon de Birmo, kiun Eroŝenko registris en lokaj lingvoj kaj publikigis en la japana. La Granda Princo malfermas sian bruston por surverŝi per sango la floron de Justeco, kiun li kultivas. Per sia potenca piedego, la tigro malfermas la kaĝojn, kie la ŝafoj agonias pro timo de libereco. La junulo iras al Revlando tra la Ĉielarka Ponto. Agloj ŝvebas pli kaj pli alten, revante forflugi al la suno. Tio estas nur kelkaj bildoj el la fabeloj de V. Eroŝenko. Kaj malantaŭ ĉio tio kaŝas sin kredo, ke ĉiuj homoj estas fratoj, kaj blinduloj povas vivi kaj vojaĝi en tiu ĉi mondo ne pli malbone ol vidantaj (*Харьковский*, 2012).

Hodiaŭ Vasilij Eroŝenko estas menciata kune kun la vojaĝantoj kiuj helpis komenci pli proksimajn ligojn kun la homoj de Orientaj landoj. Tiaj homoj estis la muzikisto Gerasim Lebedev (*Гера́сим Степа́нович Ле́бедев*, 1749–1817), la fondinto de teatro en Hindio Vasilij Mamalyga (*Василий Пантелеймонович Мамалыга*, 1865–?), kiu organizis ribelon kontraŭ la koloniistoj en Indonezio, Osip Goškėvič (*Иосиф (Осип) Антонович Гошкевич,* 1814–1875), kiu trifoje vojaĝis ĉirkaŭ la terglobo kaj dediĉis sian vivon al Japanio (*Шагинян*, 1985). Vasilij Eroŝenko vivis en la Orientaj landoj dum proksimume dek jaroj, lasante la plej videblan spuron en Japanio kaj Ĉinio.

En septembro 1987, jam ĉe la pinto de Perestrojko, dank al klopodoj de instruisto el la blindula lernejo en Aŝgabato, Nikolaj Osipenko (*Николай Осипенко*), en Aŝgabato estis fondita klubo de blindaj lernantoj „Poisk" („Serĉado") kies celo – kolekti kiel eblas pli multe da informoj pri Vasilij Eroŝenko. La membroj de ĉi tiu klubo registris multe da rememoroj. Granda pozitiva eco de tiuj serĉoj estis, ke blindaj lernejanoj komunikis kun blindaj plenkreskuloj, iamaj lernantoj de Vasilij Eroŝenko, kio grandigis la fidon kaj malfermitecon de la respondantoj (*Патлань*, 2019). En la deka jardeko de la 20-a jarcento la blindullernejo en Aŝgabato dum iom da tempo havis la nomon de Vasilij Eroŝenko, kaj funkciis la menciita serĉklubo por kolektado de informoj pri Vasilij Jakovleviĉ. Nikolaj Osipenko konstatas, ke siatempe, pro kresko de la naciisma politiko ĉe la nova registaro en Turkmenio, la antaŭaj nomoj de urboj, stratoj, kompanioj, lernejoj kaj eĉ de la monatoj de la jaro estis ŝanĝitaj. La estraro de la blindullernejo estis renovigita, kaj en 2004 ankaŭ la nomo blindullernejo estis ŝanĝita – estis forigita la nomo de Eroŝenko (retaliro: http://www.libe.slikom.info/Erosxenko-Konkurso/Nikolaj%20Osipenko%20(Rusio).htm). Lian nomon ne sukcesis konservi ankaŭ la internejo Nr. 1 de blindaj infanoj kie lernis Vasilij Eroŝenko.

La lernantoj de la blindullernejo en Aŝgabato ĉe la portreto de Vasilij Eroŝenko, pentrita de A. Suchatov (foto de neidentigita fotisto)

Vimploj por marki la 100-an datrevenon de la naskiĝo deVasilij Eroŝenko, 1990 (fotoj de neidentigita fotisto)

La emblemo de la Bonfara Fonduso de Vasilij Eroŝenko „Espero", fondita en 2007

Insigno de Vasilij Eroŝenko kreita de neidentikigita aŭtoro (retaliro: http://ay.by/lot/znak-vasilij-yakovlevich-eroshenko-esperantist-pisatel-simvolist-1890-1952-5029817215.html)

Por ke la nomo de tiu ĉi homo ne estu forgesita multe klopodis la japanoj, kiuj konis lin. Profesoro Takasugi Ichiro, esplorante la verkaron de Vasilij Eroŝenko, instigis la fondon de muzeo en la naskiĝloko de la poeto, dediĉitan al li. En siaj leteroj, la profesoro turnis sin al la gvidantoj de Staryj Oskol. La 13-an de januaro, 1990, menciante al la 100-an datrevenon de naskiĝo, en la vilaĝo de Obuĥovka la domomuzeo de Vasilij Eroŝenko estis rekonstruita, ĝi nun estas la filio de la Stary Oskol-Muzeo pri loka historio. La ekspozicio enhavas personajn posedaĵojn de la verkisto: fotojn, bustojn, librojn, meblojn, dokumentojn. La leteroj de japana profesoro Takasugi Ichiro estas la plej valoraj dokumentoj de tiu ĉi muzeo.

En 1995, en Japanio esperantlingve estis publikigitaj konservitaj de Zinaida Šamina kaj de Anatolij Masenko transskribitaj el brajla stenografio kvar fabeloj, kreitaj de Vasilij Jeroŝenko komence de la sesdekaj jaroj: „Tri ĝemeloj", „Ĉiela", „Alikhan Timemulo", „La kruĉo da saĝeco" (*Патлань*, 2012c).

Okaze de la 110-a datreveno de la naskiĝo, la muzea personaro anoncis esean konkurson pri la verkisto por lernejanoj. Gajnintino de la konkurso, lernantino de dek unua klaso Natalia Borisova en la eseo „Okuloj de la animo" skribis: „Li estas blindulo. Liaj okuloj ne vidas. Ili ne vidas nek ĉielon, nek sunon, nek vizaĝojn. Tia estas la destino: lin rimarkinte, forprenis liajn okulojn. Li estas tia. Konsiderante sin honesta, li diris: „Ĉi tiu homo havas tro da riĉaĵo, do mi deprenos de li okulojn." Ne iĝis por li pli malbone, ĉar li havis alian vidkapablon. La okuloj de lia animo estis tre sentemaj. La okuloj de lia animo vidis ĉion: kaj la ĉielon, kaj la sunon kaj la vizaĝojn. Li estas blindulo?!" (*Пискаль*, 2000, p. 4).

La nomo de Vasilij Eroŝenko estas ofte menciata en esperantistaj kongresoj. La memormedalo eldonita en 2007, kun la bildo de Vasilij Eroŝenko, estas dediĉita al

Memormedalo, kun la bildo de Vasilij Eroŝenko, dediĉita al la 96-a Kongreso de Esperantistoj, okazinta en Jokohamo, 2007.

Memorkoverto dediĉita al Vasilij Eroŝenko, 1989. Pentristo V. Zaitsev; sur la koverto estas portreto de V. Eroŝenko en la fono de liaj publikigitaj libroj; notoj en la rusa kaj Esperanto: „Rusa sovetia verkisto kaj edukisto, esperantisto V. J. Eroŝenko. 1880–1952“ (foto el la persona arkivo de la aŭtoro)

Memorkoverto dediĉita al Vasilij Eroŝenko. Pentristino O. Žuravel; sur la koverto estas portreto de V. Eroŝenko sur la fono de antikva japana arkitekturo kaj strofo de lia poemo; subskribo: „Vasilij Eroŝenko (1880–1952) (foto el la persona arkivo de la aŭtoro)

Memorkoverto, kun afiŝo de la Bonfara Fonduso de Vasilij Eroŝenko „Espero“, kie estis uzita la portreto de Vasilij Eroŝenko, pentrita en la jaro 1920, de Curuto Goro. Manskribita surskribo de la gvidanto de la fonduso en Esperanto: „Al estimata profesoro s-ro Vytautas Gudonis kun sinceraj salutoj de Eŭheno Kovtonjuk, 2020“
(foto el la persona arkivo de la aŭtoro)

Poŝtmarkoj, eldonitaj en la jaro 2007 de Ukrainia poŝto, inciatitaj de la Bonfara Fonduso de Vasilij Eroŝenko „Espero“ kun la bildoj de la verkisto (fotoj de neidentigita fotisto)

la 96-a Internacia Kongreso de Esperantistoj okazinta en Jokohamo (Japanio). Ĝia averso prezentas bildon de la verkisto surbaze de la desegnaĵo de la japana artisto Curuto Goro.

En 2018 en la 24-a Kongreso de Esperantistoj de Ukrainio, okazinta en Lvivo la 19–2-an de oktobro, Eŭheno Kovtonjuk – prezidanto de la Asocio de Esperantistoj de Ukrainio kaj de la Bonfara Fonduso de Vasilij Eroŝenko, legis la raporton pri la vivo kaj laboro de Vasilij Eroŝenko. La memoro pri la verkisto estis eternigita dum la kongreso per inaŭguro de la memortabulo en Lvivo. Ne nur la plej longa strato en la naskiĝvilaĝo Obuĥovka, en la urboj Stary Oskol kaj Lvivo, sed ankaŭ la Belgoroda Ŝtata Biblioteko por Blinduloj, Internacia Helpfonduso por Blindaj esperantistoj havas lian nomon. En Kievo la strato de Richard Sorge estas anstataŭigita per nomo de Vasilij Eroŝenko (Kovtonjuk, 2023). Kun lia bildo estis eldonitaj la poŝtmarko kaj memorkovertoj.

En 1990, laŭ la scenaro de J. Kokoška, en la Rostova Studio de Kinokroniko pri la verkisto estis kreita la dokumenta filmo „Verda stelo de Vasilij Eroŝenko" de reĝisorino Ada Laz. Japana reĝisoro Rikis Simiziu surscenigis teatraĵon pri Vasilij Eroŝenko. Kvankam Vasilij Eroŝenko kreis nur unu teatraĵon, „La persikkolora nubo", tamen fakuloj opinias, ke ankaŭ aliaj liaj verkoj taŭgas por dramaj kaj pupteatraj scenejoj.

Pri la vivo kaj verkoj de Vasilij Eroŝenko publikigitaj estas multaj artikoloj. Krom eta fasko da artikoloj pri Vasilij Eroŝenko en Esperanto, japana, ĉina, rusa lingvoj la plej multaj el la publikaĵoj aperis post lia morto.

Menciitaj estas nur tiuj aŭtoroj kiuj publikigis pli ol unu eldonaĵon, ĉar tio montras, ke ili interesiĝis pri la fenomeno de Vasilij Eroŝenko pli profunde kaj dum pli longa tempo. (Alov, 1937, 1962, 1964; Andrianova, 1968, 1967, 1968, 1970; Andrianova – Gordienko, 1968, 1973, 1977, 2004; Anikejev, 2004, 2005; Beznosik, 2003, 2005; Bezuglova, 1962, 1964; Belousov, 1961, 1962, 1963, 1964, 1969, 1975, 1977, 1985; Bogdanov, 1962, 1964; Ĥarkovskij, 1968, 1973, 1974, 1977, 1978; Ĉmil 1982, 1988; Glebov, 1964, 1970; Elshin, 1974, 1979; Gorō, 1962, 1964, 1969, 1977; Gudonis, 1986, 1889, 1990a, 1990b, 1991, 2001, 2008, 2020a, 2020b, 2023a, 2023b, 2023c, 2023d, 2023e, 2023f, 2023g, 2023h, 2023i, 2023y; Ichiro, 1956, 1972, 1993; Hu Yuzhi, 1962, 1964, 1969, 1977; Kepok, 1987, 1988; Kepov, 1961, 1962, 1963; Kicenko, 1988,1989; Kiesi, 1921, 1962, 1964, 1977; Kovtoniuk, 2004, 2005, 2006, 2007, 2008, 2010, 2020; Korotkevič, 1963, 1969, 1970, 1990; Lusin, 1921, 1922, 1953, 1961,1962, 1963, 1964, 1967, 1969, 1971, 1977, 1991; Olifirenko, 2001, 2005; Osikov, 1969, 1970, 1973, 1978, 1980, 1990; Pankov, 1970, 1973, 1976, 1990, 2002; **Patlan**, 2000, 2003, 2004, 2005, 2006, 2012a, 2012b, 2012c, 2013, 2014a, 2014b, 2014c, 2015, 2016, 2017a, 2017b, 2017c, 2017d, 2018, 2019, 2020, 2020b, 2020c, 2021, k.t.p.; Pašniov, 1971, 1973, 1989, 2002; Perŝin, 1964, 1989, 1991, 1998, 2004; Poliakovskij, 1989, 1990, 2000, 2001, 2002, 2004; Proĥorov, 1971, 2000, 2002, 2005, 2006; Seiti, 1962, 1964; So-

La domo-muzeo de Vasilij Eroŝenko en Obuĥovka, estis fondita en 1986, celebrante la 100-an datrevenon de naskiĝo de la verkisto (retaliro: https://www.shkolazhizni.ru/biographies/articles/75937/)

Ekspozicio de la domo-muzeo de Vasilij Eroŝenko en Obuĥovka 1 (retaliro: prieiga internete http://www.museum.ru/M2847)

lomonov, 1992, 2004; Stadnikova, 1989, 1990; Ŝamina, 1961, 1962, 1964; Ŝeĥovcov, 1982, 1984, 1988, 1990, 1994; Ŝojev, 1963, 1964; Taraniuk, 2005, 2009, 2010, 2012, 2020; Tokariova, 1961, 1962; Akita-Ujaka, 1935, 1962, 1977 kaj aliaj. Restas bedaŭri, ke nur malgranda parto de la artikoloj estis publikigitaj dum la verkisto vivis.

Kiel jam estas menciita, apartan atenton al la memoro de Vasilij Eroŝenko donis reprezentantoj de japana kulturo. Nome pro ilia iniciato oni ordigis la tombon de la verkisto, fondis lian domon-muzeon en Obuĥovka, kaj memorfestas en Japanio la

Ekspozicio de la domo-muzeo de Vasilij Eroŝenko en Obuĥovka 2 (retaliro: https://oskol.city/news/culture/10624/)

Ekspozicio de la domo-muzeo de Vasilij Eroŝenko en Obuĥovka 3 (retaliro: https://oskol.city/news/culture/10624/)

Emblemo de projekto „Eroŝenko 125“ (desegnaĵo de Yazima Hirosi) (retaliro: http://www.espero.com.cn/2015-01/29/content_34686145.htm)

La 12-an de januaro 2015, membroj de la projekto „Eroŝenko 125“ festis la naskiĝtagon de Vasilij Eroŝenko en la restoracio „Nakamura-ya“ (retaliro: http://www.espero.com.cn/2015-01/29/content_34686145.htm)

datrevenojn de lia naskiĝo kaj morto. La iama direktoro de la blindullernejo Hikita Akio, kie pli frue studis Vasilij Eroŝenko, iama instruistino de la sama lernejo Isaki Michiko kaj Murata Kazuyo preparis la projekton „Eroŝenko 125“ por memorigi la 125-an datrevenon de naskiĝo de la verkisto.

La organiza komitato de la projekto okaze de la 125-a datreveno de Vasilij Eroŝenko (prezidanto Junichi Shibayama) publikigis „15 fabeloj de Eroŝenko. Eljapanigitaj“ Temas pri 15 verkoj de Vasilij Eroŝenko, verkitaj en la japana kaj ankoraŭ ne tradukitaj al Esperanto. Ilin tradukis la esperantistoj kiuj partoprenis en tiu ĉi projekto, redaktis Junichi Shibayama, Hisashi Kudo kaj Jun Hoshida. Pro la iniciato de tiu ĉi projekto, en 2015, en Tokio, en Esperanto kaj japana lingvo estis publikigita kolekto de artikoloj, verkitaj de Tatiana Novikova, Anatolij Masenko, Tanabe Kunio, Sasaki Teruhiro, Shi Chengtai, Aoyama Tooru, Julia Patlan.pri la biografio kaj verkado de Vasilij Eroŝenko

La projekto inspiris pli da iniciatoj: la verkojn de Vasilij Eroŝenko oni komencis intense ciferigi, estis organizitaj prelegoj, ekspozicioj, la naskiĝtago de Vasilij Eroŝenko estis festita en la restoracio Nakamura-ya (Murata Kazuyo, 2015). Laŭ la pentraĵo de Yazima Hirosi por la emblemo de la projekto „Eroŝenko – 125“ en Japanio estis eldonita la insigno.

Esploroj de la biografio kaj de verkara heredo de Vasilij Eroŝenko

La unua konata al ni pubikaĵo pri Vasilij Eroŝenko, estas la artikolo „Vojaĝo de rusa blindulo al Londono“ publikita en 1912 samtempe en du revuoj: „Вокруг света“ („Ĉirkaŭ la mondo“) kaj „Слепец“ („Blindulo“). Tiutempe, tiu ĉi vojaĝo egalis al sensacio – blindulo vojaĝas sen akompananto!

La unua en la iama Sovetunio pri Vasilij Eroŝenko la artikolon „Amiko de rusoj Lusin“. verkis en 1958 ĉinologo, tradukisto kaj ĵurnalisto Vladimir Rogov. La artikolo estis presita en la revuoj „Знамя“ („Flago“) kaj „Жизнь слепых“ („Vivo de blinduloj“). La publikaĵo en revuo „Знамя“ vekis la intereson kaj estis kelkfoje represita en Ĉinio kaj Japanio. La informoj, de kiuj japanoj eksciis pri la preciza dato de la morto de Vasilij Eroŝenko, iĝis la preteksto por eternigi la memoron pri verkisto. En Tokio okazis la memorinda renkontiĝo de la amikoj de Vasilij Eroŝenko, kie oni decidis kolekti kaj represi liajn verkojn. En 1959 la japana profesoro Ichiro Takasugi publikigis trivoluman kolekton de ĉiuj verkoj de Eroŝenko. Kaj en la iama Sovetunio iom post iom komencis aperi publikaĵoj pri Vasilij Eroŝenko. La 30-an de decembro, en 1960, Aleksandr Kepov pretigis eseon pri Eroŝenko destinitan al lia 70-a datreveno kaj publikigis ĝin en la regiona gazeto de Stary Oskol „Путь октября“ („Oktobra vojo“). En aprilo de 1961, la Ĥarkova revuo „Труд слепых“ („Laboro de blinduloj“) represis „La komedio de la anasoj“ de Lusin kun komentario „Pri la aŭtoro kaj la heroo“ dediĉita al Vasilij Eroŝenko kaj eldonis ĝin brajle. Tamen tiuj artikoloj en la regiona, malgrandkvante eldonanta revuo „Слепец“ („Blindaj“) kaj en eksterlandaj eldonaĵoj restis sen atento. Novan impulson al la sovetia disvolviĝo de studoj pri Vasilij Eroŝenko donis la artikolo „La sorto de la poeto“ de aktorino kaj verkistino Jelizaveta Auerbach (*Елизавета Бори́совна Ауерба́х,* 1912–1995), metita en la gazeton „Московская правда“ („Moskva Vero“) en majo de 1961. Nome ŝi ekinteresigis la junan ĉinologon, kunlaboranton de „Литературная газета“ („Literatura gazeto“) Roman Belousov, kiu poste kolektis multajn valorajn dokumentojn pri Vasilij Eroŝenko (retaliro: http://ru-jp.org/belousov_arhiv_01.htm). R. Belousov publikigis artikolojn pri Vasilij Eroŝenko: „La amiko de Lusin“ en la gazeto „Литературная газета“ („Literatura gazeto“), septembro, 1961), „La protektanto de la subprematoj” en la bulteno de la Tutrusia Societo de Blinduloj (1962), „La sorto de verkisto” en „Восточный алманах“ („Orienta Almanako“, 1962), „Blinda verkisto Vasilij Eroŝenko“ en la gazeto „Волжская заря“ („Volga aŭroro“, en brajlo, 1962), „V. J. Eroŝenko” en la libro „V. Eroŝenko. La koro de aglo“, (1962), „Rakonto pri unu vivo“) en la libro „En mil hieroglifoj“ (1963), „V. J. Eroŝenko“ en la libro en brajlo „V. Eroŝenko“ (1964), „Rusa verkisto V. Eroŝenko – amiko de Lusin“ en la revuo

„Проблемы Дальнего востока“ („Problemoj de Malproksima Oriento“, 1975), „Revoj de vaganto“ en la libro „V. J. Eroŝenko, Elektita verkaro“, 1977) kaj aliajn.

10 jarojn post la morto de Vasilij Eroŝenko, en 1962, la Belgoroda Libroeldonejo publikigis la libron de la verkisto „La koro de la aglo“ kaj en 1964 tiun eldonaĵon ripetis la eldonejo „Просвещение“ („Klerigo“). En 1969, la menciita libro, nomita „Floro de justeco“, estis publikigita en Kievo en ukraina lingvo. En 1977 la eldonejo „Наука“ („Scienco“) eldonis kolekton da verkoj de Vasilij Eroŝenko („Избранное“), komencis aperi libroj pri li: N. N. Gordienko-Andrianova „Mi ekflamigis fajron en la koro“ (Kievo: Veselka, 1973, 1977), la dokumenta novelo de A. S. Ĥarkovskij „La viro, kiu vidis la mondon“ (1978), okaze de la 100-a datreveno de la naskiĝo de Vasilij Eroŝenko estis eldonita la broŝuro de B. I. Osykov „Muzikisto, vojaĝanto, poeto, instruisto“ (1989), de A. I. Sizova. „Por la 100-a datreveno de de Vasilij Jakovleviĉ Eroŝenko” (1990), libro de V. J. Lazarev kaj V. G. Perŝin „Impulso de Eroŝenko“ (1991), de A. Poliakovskij – „Blinda pilgrimo“ (1998), „Homo de la mondo“ – eldonaĵo dediĉita por memorfesti la 120-a datrevenon de la naskiĝo de Vasilij Eroŝenko (2010), de T. S. Novikova kaj T. A. Zacharov „Eroŝenko“ (2018), en la jaroj 2014 kaj 2016 en Belgorodo estis eldonitaj kolektoj da fabeloj de Vasilij Eroŝenko kun biografio de la verkisto. En 2018, en Belgorodo estis eldonita la libro „Eroŝenko“ (ene de la libroserio „Belgoroda familia biblioteko“) (*Парасюк*, 2018). Amasiĝas la kvanto de artikoloj, kiuj priskribas la vivon kaj verkadon de Vasilij Eroŝenko. Tiaj artikoloj estas publikigitaj en perioda gazetaro de Litovio, Rusio, Ukrainio, Germanio kaj en la periodaĵoj de aliaj landoj.

Oni komencis aranĝi la bibliografiojn pri verkaro de Vasilij Eroŝenko: en la rusa lingvo E. Usova kompilis „Bibliografio de la verkoj de Vasilij Eroŝenko“ (2020), V. Taraniuk kaj E. Kovtoniuk en la ukraina kaj Esperanto kompilis „Bibliografio de verkoj de Vasilij Eroŝenko“ (2020

Laŭ iniciato. S. M. Prohorov (Kolomna) kaj kunlaborantino de Nacia kultura centro „Muzeo de Ivan Gonĉar“ (Kiev) J. Patlan estis kolektita la internacia grupo de esploristoj „Vasilij Eroŝenko kaj lia epoko”. Ekde la jaro 2002 tiu grupo unuigas sciencistojn el Rusio, Ukrainio, Japanio, Germanio, kaj Usono esplorantajn la krean heradaĵon de Vasilij Eroŝenko, laŭ tiu temo estas organizataj konferencoj.

La unua tasko de la grupo estis formi la pli kompletan bibliografion de Vasilij Erošenko kaj fari la liston de la artikoloj pri li en Esperanto, japana, ĉina, rusa, ukraina, angla kaj aliaj lingvoj. Nuntempe la esploristoj de biografio kaj kreado de Vasilij Eroŝenko havas tiajn taskojn:

1. Identigo de arkivaj dokumentoj pri la verkisto en arkivoj de Rusio, Ukrainio, multaj landoj de Eŭropo (Britio, Germanio, Finnlando, Francio,) Japanio kaj Ĉinio.

2. Analizo de historiaj fontoj, interalie ankaŭ per Esperanto kaj japana lingvo, analizado kiu permesus kompletigi la breĉojn faritajn de cenzuro en sovetiaj libroj kaj artikoloj pri la verkisto.

3. Identigo de arkivoj kaj publikaĵoj pri Vasilij Eroŝenko de orientalistoj V. Alekseev, R. Belousov, V. Rogov, L. Pozdnejeva, V. Semanov kaj aliaj (*Патлань*, 2014c).

Al la plej elstaraj esploristoj de la biografio kaj de la krea heredaĵo de Vasilij Eroŝenko, oni devus atribui filologinon, ĉefesploristinon en la ukraina popolkultura centro „Muzeo de Ivan Gonĉar", Julia Patlan. Ŝi ekde 1997 tradukas la tekstojn de la verkisto el Esperanto kaj japana lingvoj, aktive publikigas esplorrezultojn, organizas diversajn sciencajn forumojn laŭ temoj de la vivo kaj verkado de la verkisto. Julia Patlan kunlaboras kun la laborantaro de la Domo-Muzeo de Vasilij Eroŝenko en Obuĥovka kaj kun la Loka Historia Muzeo en Stary Oskol, korespondadas kun esperantistoj el Japanio, kie loĝis kaj kreis la verkisto.

La bibliografio kompilita de Julia Patlan enhavas pli ol mil artikolojn pri Vasilij Eroŝenko. La analizo de la poetiko en la tekstoj de la verkisto ebligis argumentite aserti, ke liaj tekstoj apartenas al la literaturo de simbolismo. En la jaro 2010 la Internacia Ligo de Blindaj Esperantistoj kaj Rusia Esperanto-Asocio de Blinduloj organizis konkurson de eseoj pri la rolo de Vasilij Eroŝenko en la vivo de blinduloj. En 2012 estis anoncita konkurso por la plej bona literatura traduko de poemoj de Eroŝenko al la rusa lingvo. Tradukoj estis ricevitaj el Rusio, Ukrainio, Portugalio (*Патлань*, 2013).

La samajn celojn levas por si la organizo de blindaj esperantistoj, kies membroj tradukis 14 fabelojn de tiuĉi verkisto el japana al Esperanto (*Sabelli*, 2019). Al la popularigo de la heredaĵo de la verkisto aliĝas ankaŭ aliaj publikaj asocioj:

En 2000, memore al la 110-a datreveno de la naskiĝo de la verkisto, la Rusia Ŝtata Biblioteko por Blinduloj en Moskvo organizis „La legadoj de Eroŝenko".

En 2002, okaze de la 50-a datreveno de la morto de la verkisto, okazis la konferenco „Vasilij Eroŝenko kaj lia epoko".

En aprilo 2006 en la konferenco „Mitologio kaj ĉiutaga vivo – literaturo kaj amaskomunikaro: folkloro –

Julia Patlan, tenante en ŝiaj manoj skulptaĵeton pri Vasilij Eroŝenko (retaliro: https://vk.com/Patlan_yu?z=photo22926822_237139986%2Falbum22926822_0%2Frev)

Profesoro Ichiro Takasugi kun edzino ĉe la forumo dediĉita al la 100-a datreveno de la naskiĝo de Vasilij Eroŝenko (foto de neidentigita fotisto)

literaturo – komunikiloj“) en Sankt Peterburgo estis legitaj la prelegoj de J. V. Patlan kaj S .M. Proĥorov „La premiso de la unua studo en kreado de la mito pri la poeto“.

Dum la 28-30 de septembro, 2007 en la internacia scienca konferenco „Jesenin kaj monda kulturo“ okazinta en Konstantinovo estis legitaj la tekstoj de prelegoj de J. V. Patlan kaj S. M. Proĥorov: „La lerneja vivo de Vasilij Eroŝenko“ kaj „Pri la mondkoncepto de Vasilij Eroŝenko“.

En 2010, en Belgorodo okazis la unua forumo dediĉita al la verkisto Vasilij Eroŝenko.

En 2012 por memorfesti la 100-an datrevenon de V. Eroŝenko, en Belgorodo estis organizita la dua forumo „Homo de la mondo”, kiun partoprenis pli ol 200 partoprenantoj, inter ili gastoj el Moskvo, Kursko, Kievo kaj Ĥarkovo. La forumo okazis en diversaj lokoj. Dum la forumo oni prelegis, okazis trejnadoj, seminarioj kaj aliaj aranĝoj.

Japana profesoro Takasugi Ichiro, jam en 1959, en Japanio, kompilis kvin volumojn de „Finpretaj verkoj de Eroŝenko“ eldonitaj de Misuzu Syoboo. Profesoro sukcesis plenumi sian malnovan revon – viziti Belgorodon, Stary Oskol kaj Obuĥovka. En tiu vojaĝo li estis akompanita de la iama lernanto de Vasilij Eroŝenko, Viktor Pershin, kiu mortis en oktobro de 2002. Unu el liaj eseoj estis titolita „Memoro en la koloro de tristo“.

En 2012 memorfestante la 60-an datrevenon de la morto de Vasilij Eroŝenko, en la 78-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj, okazinta en Ukrainio, pri la vivo de Vasilij Eroŝenko prelegis Tanebe Kuno, esperantisto el la Lando de la Leviĝanta Suno, (Valenta, 2012).

En 2012, memore al la 60-a datreveno de la morto de la verkisto, estis organizita konkurso de tradukado de poemoj de Eroŝenko el Esperanto al la rusa kaj aliaj lingvoj (partoprenis ankaŭ tradukistoj el Ukrainio kaj Portugalio).

Dum la 21-22-a de oktobro, 2014 en Belgorodo okazis la tria forumo pri Vasilij Eroŝenko. En la programo de la forumo – la interregiona muzika festivalo „Ni estas kune – ni estas fortaj!“, ekspozicio-foiro de kreajoj de viddifektitaj kaj aliaj handikapuloj, la prezentado de la galerio de paralimpikaj sportistoj „Herooj de Olimpo“, organizitaj „Bataloj sen reguloj“ kun studentoj de la medicina kolegio ĉe Belgoroda Ŝtata Nacia Esplora Universitato.

Dum la 20-21a de aprilo 2016 en Belgorodo okazis la kvara forumo pri Vasilij Eroŝenko, kies ĉefa organizanto estis la Belgoroda Ŝtata Speciala Biblioteko por Blinduloj.

En 2018, en Belgorodo okazis la kvina forumo pri Vasilij Eroŝenko, kies ĉefa organizanto estis la Belgoroda Ŝtata Speciala Biblioteko por Blinduloj.

La 18-an de decembro, 2020 memorfestante la 130-a datrevenon de Vasilij Eroŝenko kaj la 30-an datrevenon de la memormuzeo en Obuĥovka, la kultura sekcio de la urba administracio en Stary Oskol kaj la laboristaro de la loka historia muzeo en Stary Oskol organizis internacian sciencan-praktikan konferencon „La eminenta blindulo“ kaj publikigis la materialojn de prelegoj.

En Japanio „Japana Esperanto Librokooperativo“ eldonis libron kun noveloj kaj fabeloj de Eroŝenko, verkitaj en Esperanto aŭ en la japana lingvo: „Lumo kaj ombro“ (1979), „La tundo ĝemas. El vivo de la ĉukĉoj” (1980), „Cikatro de amo“ 1996), „Malvasta kaĝo“ (1981), „Stranga kato“ 1983); „La kruĉo de saĝeco“, (1995) kaj aliajn (Kerziouk, 2014).

Julia Patlan mencias, ke estis eldonita kolekto de verkoj „Siberiaj rakontoj de Vasilij Eroŝenko“. Ĉiuj kvar tekstoj de la verkisto pri Ĉukotka estis kunigitaj en kolekto eldonita en la japana de la Japana Esperanto-Libro-Eldonejo. En la aŭtuno de 2019, en la arkivo de la plej eminenta japana esploristo kaj verkisto Ichiro Takasugi, kiu estis preskaŭ centjara (mortis en 2008) lia studento Oota trovis la japanan tradukon de la novelo „Tri ŝakmovoj” de V. Eroŝenko (1947). Tiun tekston, verkitan en Esperanto, al la japana tradukis Ichiro Takasugi, post kiam la blinda esperantisto Anatolij Masenko kaj lia amiko Aleksandr Pankov transskribis la tekston el Esperanto en brajlon kaj publikigis ĝin „samizdate“ en Sovetunio meze de la 1970-aj jaroj. Do la teksto, kiu nun jam estas alirebla kaj por vidantaj legantoj, unue venis el Japanio. Tie, „Mine Yoshitaka“ la eldonisto de la verkoj, enmetis ĝin en la duan kompilitan eldonaĵon de la tekstoj de Vasilij Erosenko „La tundro gemas“ (1983), en Esperanto. Tiu ĉi broŝuro longan tempon estis bibliografia raraĵo. La traduko trovita de Ichiro Takasugi jam estis publikigita en la dua volumo de kompleta verkaro de Eroŝenko, de eldonejo Misuzu Shobo (1974), sed tiu ĉi eldono jam delonge estas disvendita. Grupo de japanaj esperantistoj, kiuj havis longan kaj fruktodonan kunlaboron kun japanaj blindullernejoj, en 2015 eldonis kolekton „Vivis, vojaĝis, verkis“ en la japana kaj Esperanto, dediĉitan al la 125-a datreveno de la verkisto. La menciitaj entuziasmuloj aranĝis kaj eldonejo „Misuzu Shobo“ publikigis en japana lingvo ankoraŭ tri trovitajn tekstojn el la verko „Ĉukotka“ de Eroŝenko. La kolekton kompletigas eseo de Yasuko Tanaka, la plej aĝa filino de la profesoro Ichiro Takasugi „Rememoroj pri mia patro Ichiro Takasugi“. La nova eldono estis senpage dissendita al 73 blindullernejoj de Japanio (Patlan, 2021).

Japanaj, ĉinaj, rusaj kaj litovaj aŭtoroj skribis pri Vasilij Eroŝenko, liaj verkoj estis publikigitaj en Japanio, Ĉinio, Litovio kaj en la lastaj jaroj aperis pli da intereso pri lia verkaro en Ukrainio. Unu el la plej grandaj publikaĵoj de liaj verkoj en la Lando de la Leviĝanta Suno – trivoluma eldono de liaj verkoj, redaktita de Mine YYoshitaka estas la sesvoluma eldono de la verkaro de Vasilij Eroŝenko, kaj kelkaj libroj pri li. Multaj homoj kiuj konis Vasilij Eroŝenko nomis lin hela homo. El la epitetoj diritaj pri la aŭtoro, ni povas formi sufiĉe detalan bildon de tiu ĉi persono: „amiko de la subprematoj“ (Hu Yuzhi), vivoamanto (Z. Ŝamina), mentoro (Z. Tokajeva), simpla kaj humana (D. Alov), brila homo (M. Bezuglova), modesta, ĉarma (F. Burtseva). „Homo sentas sin kompleta nur laborante“ – tiel diris Vasilij Eroŝenko al la blindiĝinta V. Bogdanov (citita laŭ *Muraŝkovska, Мурашковский*, 1986–1987). **Oni opinias, ke Vasilij Eroŝenko havis tri celojn, kiujn li klopodis atingi dum sia tuta vivo:**

1) krei kaj efektivigi sistemon de edukado kaj trejnado por blinduloj, kiu permesus al ili en eduko atingi la nivelon de vidantoj;

2) batali por justeco per politikaj rimedoj;

3) krei literaturon de justeco (*Мурашковска, Мурашковский,* 1986–1987).

Pozitive taksenda estas tio, ke aperas aŭtoroj, kiuj provas pritaksi la agadon de Vasilij Eroŝenko, en kelkaj aspektoj. Kiel ekzemplo povas servi Ingrida kaj Julij Muraškovskij, kiuj en 1986–1987 publikigis la artikolon „Mi ekflamigis fajron en mia koro". Ni povas ĝoji pro la provo de la aŭtoroj interpreti kelkajn faktojn de la vivo de la verkisto, tamen en artikolo ankaŭ estas parto da senbazaj konkludoj pritaksante la pedagogian kontribuadon de Vasilij Eroŝenko:

Pedagogiaj rezultoj:

1. Estis kreita kompleksa sistemo por edukado kaj trejnado de blinduloj, surbaze de praktikaj agadoj.

2. Tiu-ĉi sistemo estis efektivigita kaj provita praktike en du lernejoj kaj en multaj apartaj institucioj.

3. Por la turkmena lingvo estis kreita brajla skribo.

4. Kreitaj la novaj principoj pri instruado de fremdlingvoj (*Muraŝkovska, Мурашковский*, 1986–1987).

En tiuj ĉi konkludoj oni senbaze asertas, ke Vasilij Eroŝenko kreis la kompleksan sistemon de edukado kaj trejnado de blinduloj, ĉar nek la aŭtoro mem, nek aliaj aŭtoroj priskribis tian sistemon. Same oni povas diri pri liaj principoj en instruado de fremdaj lingvoj. Pri brajla skribo, la aŭtoroj verŝajne volis diri, ke Vasilij Eroŝenko kreis reliefan sespunktan alfabeton de la turkmena lingvo. Oni povas plene konsenti kun la aserto, ke la edukadon kaj trejnadon de blindaj infanoj de Vasilij Eroŝenko bazigis sur praktikaj agadoj, kiuj estis elvokive priskribitaj de la aŭtoro mem.

Multe pli konvinkaj, krom kelkaj momentoj, estas la pensoj de la menciitaj aŭtoroj pri la valoro de laboro farita de Vasilij Eroŝenko en la literaturo. Literaturaj rezultoj:

1. La unuaj fenomenoj de romantismo en Orienta literaturo.

2. Unuafoje, romantismo estas kreita sur larĝa folklora bazo, uzante la tipan sistemon de orientaj alegorioj.

3. Kun verkoj de V Eroŝenka en Orientan literaturon venas la ĝenro de satira fabelo (simila al la fabeloj de Saltykov-Ŝĉedrin).

4. En la japana literaturo unuafoje aperas nova speco de heroo – fremdlandano.

5. Sufiĉe vaste estis disvolvita la temo de kontraŭkoloniismo kaj socia justeco, la plej aktuala por Oriento tiutempe. Tio baziĝis sur la loka folkloro.

6. La unuan fojon kaj grandskale la folklora romantismo aperis en Esperanta literaturo.

Preskaŭ en ĉiuj konkludoj kategorie oni emfazas „la unuan fojon". Tia supozo postulas bonan konon de romantisma literaturo en Orientaj landoj kaj Eŭropo. Kiam

tiaj scioj mankas ne eblas nek nei, nek subteni la demandon de unuaeco. Oni povus konsenti kun la supozoj faritaj de tiuj aŭtoroj ke „romantismo kiu elmodiĝis en Eŭropo ne povas esti populara tie, despli ĉar ĝi estas bazita sur la malmulte konataj al eŭropanoj simboloj de Orienta folkloro. La verkoj de Vasilij Eroŝenko por la eŭropa gusto ŝajnas iel simpligitaj, mentoraj". Konfirmi aŭ malkonfirmi ĉi tiujn supozojn eblus nur post enketado de legantoj de verkoj de Vasilij Eroŝenko. Vasilij Jeroŝenka bone konis la rusan kaj mondan literaturon, do ne hazarde la herooj de liaj verkoj similas al Danko de Maksim Gorkij, al princoj de Oscar Wilde kaj Antoine de Saint-Exupéry, al Asol de Alexander Green. Liaj rakontoj, kiujn li nomis fabeloj, ne estas fabloj, sed prefere alegorioj kaj komparacioj. Malgraŭ tuta simpleco, liaj tekstoj estas tre profundaj, kontraŭdiraj kaj plenaj de la plej diversaj eŭropaj kaj orientaj simboloj (*Nevzorova*, 2020).

Al la popularigo de la verkista heredaĵo kontribuas literaturaj fakuloj, specialistoj pri laboro kun blinduloj, publikaj organizoj. Tial estas kredeble, ke la blankaj makuloj en la biografio de la verkisto Vasilij Eroŝenko malpliiĝos, kaj la verkaro ricevos detalan pritaksadon de literaturologoj.

Blankaj makuloj en la biografio

Estas kompreneble, ke la biografio de Vasilij Eroŝenko atendas precizigon kaj komplektigon, kaj la krea heredaĵo – detalan studadon. La precipe grandajn esperojn oni havas pri la internacia grupo de esploristoj „Vasilij Eroŝenko kaj lia epoko", en kiu ekde 2002 partoprenas sciencistoj el Japanio, Usono, Rusio, Ukrainio kaj Germanio.

Hou Zhiping en la ĉinlingva artikolo „Lusin kaj Eroŝenko", rimarkas, ke Lusin decidis pli amplekse konatigi la socion de Ĉinio kun la verkoj de tiu ĉi blinda poeto. La unua de li tradukita verko estas „La mallarĝa kaĝo", kie li prezentante la verkon analizis la kaŭzojn, kial la blinda poeto estis forpelita de la lando. Lusin kredis, ke Japanio kaj Britio estas aliancitaj kaj havas amikajn rilatojn. Ĉar Eroŝenko estis forsendita el Britio, li ankaŭ devis esti forsendita el Japanio. Tamen ĉifoje aldoniĝis la insultado kaj batado. Lusin skribis: „En la fabeloj verkitaj de Eroŝenko por japanoj en Japanio, ne estas iu odoro de danĝeraj ideoj. Li havas nur infanecan, sed belan kaj puran koron. La limigoj de mondo ne povas limigi liajn revojn" (citaĵo laŭ *Hou Zhiping*, retaliro http://www.elerno.cn/movado/movado198.htm). Unuan fojon en la literaturo pri Vasilij Eroŝenko, estas menciite, ke li estis forsendita el Britio. Restas malklare kial Vasilij studis en la Reĝa Akademio de la Blinduloj nur dum du monatoj. Oni povas supozi, ke Vasilij Eroŝenko diris al Lusin la kialojn de mallongdaŭra studado en klerejo de la blinduloj, kaj reveninte al tiama Sovetunio pri tio paroli ne volis aŭ ne povis. Ni volas kredi, ke en estonteco esploristoj de verkista biografio kaj verkaro trovos la dokumentojn pri la akcepto kaj forigo de Vasilij Eroŝenko el la Londona eduka institucio por blinduloj kaj ke vero iĝos klara.

Inter la problemaj demandoj en la biografio de la verkisto, ĝis nun restas malklara la demando pri la nacieco de Vasilij Eroŝenko. Liaj gepatroj translokiĝis el Ukrainio al la tiama Kurska Gubernio de Rusio. Rusoj konsideras lin rusa verkisto, ukrainoj – ukraina. En Obuĥovka, la surskribo sur la memorŝtono de la monumento estas: „Eroŝenko Vasilij Jakovleviĉ (1890–1952). Fama rusa verkisto, poeto, pedagogo, vojaĝanto, publika aganto".

Kelkaj aŭtoroj atentigas, ke Vasilij Eroŝenko neniam verkis en rusa lingvo. Aliaj asertas la malon. Eldonitaj libroj en la rusa, estas plej ofte tradukoj de liaj verkoj el japana lingvo aŭ Esperanto. Vizitinte duonon de la mondo, sciante multajn lingvojn, Vasilij Eroŝenko neniam forgesis la lingvon de sia infanaĝo. Li vizitis Kievon, Ĥarkovon, Ĉernihivon, bone konis la ukrainan literaturon, tre ŝatis ĝin, li mem kantis ukrainajn popolkantojn, respektis ukrainojn pro ilia regalemo kaj gastamo. „Mi preskaŭ ne parolas la ukrainan, sed mi amas kaj memoras ukrainajn kantojn. Ĝi estas la memoro de instinkto. Mi ne elektis la kanton, ĝi elnaĝis memstare, memorigis pri si mem kaj tentis min sekvi ĝin" (citita laŭ Полаяковский, 2000). Dum la postdiplomaj studoj en Peterburgo, aŭtoro de la libro loĝis en la studenta hejmo kun burjata kolego, aspiranto biologo Bair Ŝakdurov, kiu ne konis la burjatan lingvon, sed ĉiam konsideris sin kiel

Atestilo pri atribuo de V. Eroŝenko nomo al la stelo en Virgo-konstelacio, 2008 (foto de neidentigita fotisto)

burjato. Estas kompreneble kial Vasilij Eroŝenko estis nomita ruso en eksterlando. Plej multaj eksterlandanoj opiniis, ke en iama Sovetunio loĝas nur rusoj. Ankaŭ aŭtoro de tiu-ĉi libro devis tion sperti. Ne malofte en eksterlandaj konferencoj, prezentante min, ke mi estas de Litovio kaj pardonpetante pro mia malbona angla lingvo, mi diradis, ke la angla – mia tria lingvo, la rusa mia dua. Oni ne malofte demandis min: kia estas mia unua lingvo... Tiam, kvazaŭ ofendita, mi respondadis, ke mi estas litovo, mi loĝas en Litovio kaj mia gepatra lingvo estas la litova. Tial, ne estas mirinde, ke en la biografio de Eroŝenko en la „Enciklopedio de Esperanto" oni skribas ke li estas ruso.

Ĝis nun estas malfacile respondi, kiun naciecon – ukrainan aŭ rusan – elektis Vasilij Eroŝenko. Pli da konataj faktoj parolas pri tio, ke verkisto atribuis sin ukrainoj. Tiel asertis ankaŭ la fratino de la verkisto Maria: Vasilij konsideris sin al ukraino. En la poŝtkarto de Maria, sendita la 2-an de decembro, 1967 estas skribite, ke „... Vasja ĉiam skribis „ukraino", ĉar lia avo kaj patro estis ukrainoj kaj ĉiam la ukrainan oni parolis hejme..."



Poŝtkarto de Maria, la fratino de Vasilij, verkita la 2-an de decembro, en la jaro 1967 (foto el arkivo de N. Andrianova-Gordienko)



Parto de la stela ĉielo en 2008 kun la stelo Eroŝenko en la Virgo-konstelacio (foto de neidentigita fotisto)

Unu el la ĉefaj direktoj de la laboro de esploristoj pri la biografio kaj verkado de Vasilij Eroŝenko estas revizio de multaj mitoj pri la verkisto kaj pri historiaj kaŭzoj kial ili aperis. Esploristoj distingas kelkajn mitojn:

1. La mito pri Eroŝenko kiel klasikulo de japana infana literaturo (ekzistas en Rusio kaj Ukrainio).

2. La mito pri Eroŝenko kiel ukraina verkisto (ekzistas en Ukrainio, pene revivigita dum la lastaj 20 jaroj en la nivelo de ĵurnalismaj kaj studentaj tekstoj);

3. Mito pri Eroŝenko kiel blinda rusa poeto.Tiu ĉi mito fortikiĝis en Japanio pro la titolo de monografioj pri la verkisto de Ichiro Takasugi en 1956 kaj 1982 (*Патлань*, 2016).

Ĥarkovskij en la dokumenta novelo „La viro, kiu vidis la mondon" skribis, ke „Akita kaj multaj el la amikoj de Eroŝenko erare kredis, ke la patrujo de Eroŝenko – ne Rusio, sed Ukrainio" (*Харьковский*, 1978, p. 77). Akita-Ujaka kaj liaj aliaj amikoj en Japanio ne povis mem elpensi la historion pri Ukrainio. Estas pli kredeble, ke Vasilij Eroŝenko mem parolis al ili pri sia nacieco. Alia fakto, kiu parte konfirmas la supozon, ke Vasilij Eroŝenko estis ukraino, estas ke en 2008, enternigante la memoron de la verkisto, je lia nomo estis nomita stelo. Kaj en la internacia certigilo, atestanta, ke unu stelo en la Virgo-konstelacio estas nomita laŭ la familia nomo de la verkisto (*Єрошенко Василь Яковлевич*), same kiel en la stelfolio lia familia nomo estas skribita en ukraina (*Єрошенко*).

La Novan Jaron 1952, Vasilij Eroŝenko renkontis en Moskvo en la familio de Ŝamina. Li al neniu rakontis pri sia malsano, sed ĉiuj rimarkis, ke li estas pala kaj tre magra. Kiam oni

petis lin kanti ion, li kantis en la ukraina: : „Як умру, то поховайтэ мэнэ на могыли, сэрэд стэпу шырокого на Вкраини мылий“ („Kiam mi mortos, enterigu min en tombon, meze de la stepo kiu estas larĝa en kara Ukrainio“ (*Харьковский*, 1978 p. 276). **Ĝis nun, ukrainoj, presante kovertojn kun la bildo de Vasilij Eroŝenko, skribas, ke li estas ukraino kaj rusoj, ke li estas ruso.** En Ukrainio, la bazo de la mito de nacieco estas la ukraina familia nomo kaj la origino de Eroŝenko. Kvankam la esploristino Julia Patlan trovis la enskribon „rusa“ en unu el la demandaroj de Vasilij Eroŝenko, la aŭtorino mem konstatas, ke ŝajne, en diversaj vivsituacioj, la verkisto povis identigi sin kiel ukraino el Sloboĵanŝĉina kaj ruso – kiel civitano de la rusa imperio, naskiĝinta en miksita familio. (*Патлань*, 2014c).

La unua biografo de Vasilij Eroŝenko estis japano Takasugi Ichiro (高杉一郎, 1908–2008, la vera nomo Ogawa Gorō) – literatura recenzisto, romanverkisto kaj tradukisto, ekde 1929 – esperantisto. Naskiĝis en Shizuoka, gubernio Izu. En 1932 li eniris la Pedagogian fakon de la Tokia Universitato de Humanitaraj kaj Naturaj Sciencoj, post la fino de tiuj studoj, li transiris al la fako de Angla Literaturo de la sama universitato. En 1933 li laboris en la redakcio de la revuo „Kaizō“, poste – kiel ĉefredaktoro de la revuo „Bungei“. En 1944 li estis mobilizita kaj sendita al Manĉurio. Post la kapitulaco de la japana armeo, li estis kaptita proksime de Ĥarbin kaj dum 1945–1949 estis en koncentrejo por japanaj militkaptitoj, proksime de Taiŝet, en la Irkutska regiono. Li verkis pri tio la libron „Ombre de la Nordaj Lumoj“ (1950). Reveninte al Japanio, ekde 1950, li instruis la anglan lingvon kaj literaturon en la Universitato de Shizuoka, laboris kiel profesoro. En 1956, li kiel apartan libron publikigis la biografion de Vasilij Eroŝenko (*Аникеев, Takeda,* 2017). Tiamaniere japanaj legantoj pli frue ol en la patrujo de Vasilij Eroŝenko eksciis pri la vivo de la verkisto. Kvankam jam en 1956, biografio de Vasilij Eroŝenko kiel aparta libro estis eldonita en Japanio, tamen ĝis nun ankoraŭ restas multaj demandoj en la vivhistorio de tiu ĉi verkisto, instruisto de blinduloj kaj vojaĝanto, kiujn respondi devus la nuntempaj esploristoj.

Eĉ tri variantoj de la biografio de Vasilij Eroŝenko estas verkitaj de la japana aŭtoro Ichiro Takasugi. Kiel asertas Anikeev kaj Takeda, ĉiuj tri versioj de la biografio de Eroŝenko estas fikciaj historioj, ĉar ilia bazo – rememoroj de homoj, kiuj konis Vasilij Eroŝenko aŭ aŭdis pri li de aliaj. Ichiro Takasugi, en biografio verkita en la jaro 1982, unuafoje inkludis plenajn alineojn el la „memuaroj“ aŭ „taglibro“ de Eroŝenko, pruntepreniteajn el la libro „La viro, kiu vidis la mondon“ (1978). Aŭtoro de tiu libro, sovetia ĵurnalisto kiu en 2019 mortis en Usono, Aleksandr Ĥarkovskij tiel respondis al demando de siaj kolegoj: „Mi verkis la taglibron de V. E. (Vasilij Eroŝenko), kiu ŝajne estis tiel konvinka ke Takasugi transprenis ĝin de mi. Mi verkis la novelon, ne la sciencan studon“. (*Аникеев, Такеда*, 2017).

Eblus ne jugi tiel severe la faktojn el biografio de verkisto, prezentitajn de Takasugi Ichiro, ĉar Vasilij Eroŝenko ne verkis la detalan aŭtobiografion, tial ĉiu provo skribi biografion de tiu homo estas taksata pozitive. Laŭ opinio de aŭtoro de tiu-ĉi libro, kiel de pedagogo pri instruado de blinduloj, psikologo kaj homo, kiu dum multaj jaroj rekte

laboris kun blinduloj, eĉ la dokumenta novelo de Aleksandr Ĥarkovskij „La homo, kiu vidis la mondon“ (1978) estas bonega rakonto pri verkisto, vojaĝanto, instruisto de blinduloj, donanta al la leganto multe da scio pri la potencaj eblecoj de blinda homo. Eĉ relegante ĉi tiun libron ne unufoje, ne eblis trovi ie ajn neadekvatan bildigon de blindulo. Por prezenti al la leganto la plej kolorplenan bildon de Vasilij Eroŝenko, la aŭtoro de ĉi tiu libro uzas ankaŭ la adekvatajn trajtojn de la blindulo, kiujn A. Ĥarkovskij atribuas al Vasilij Eroŝenko.

Tiel, ne konvenus malgravigi la faritan laboron de *Takasugi Ichiro*. La profesoro konsekvence laboris kolektante la materialojn, li vizitis la iaman Sovetujon, zorgis pri publikigo de la biografio de la verkisto en aparta libro kaj trovis la eblecon alveni kun sia edzino al la naskiĝloko de Vasilij Eroŝenko kaj partopreni en jubilea memorfesto de verkisto, viziti lian tombon.

Restas malkare kiel Vasilij Eroŝenko verkis siajn tekstojn. Oni povas supozi, ke Vasilij Eroŝenko diktis siajn verkojn al Kamichika, Akita-Ujaka, kaj eble al aliaj amikoj kaj tiuj skribis ĉion per hieroglifoj kaj prezentis al eldonistoj.

Profesoro Takasugi Ichiro ĉe la tombo de Vasilij Eroŝenko kun la malnova tomboŝtono (retaliro: https://izi.travel/fr/d46a-v-pamyat-v-ya-eroshenko/ru)



	あ段 *a dan*	い段 *i dan*	う段 *u dan*	え段 *e dan*	お段 *o dan*	
あ行 *a gyō* *bare vowels*	あ *a*	い *i*	う *u*	え *e*	お *o*	
						
か行 *ka gyō: k-* *dan + dot 6*	か *ka*	き *ki*	く *ku*	け *ke*	こ *ko*	
						
さ行 *sa gyō: s-* *dan + dots 5&6*	さ *sa*	し *shi*	す *su*	せ *se*	そ *so*	
						
た行 *ta gyō: t-* *dan + dots 3&5*	た *ta*	ち *chi*	つ *tsu*	て *te*	と *to*	
						
dな行 *na gyō: n-* *dan + dot 3*	な *na*	に *ni*	ぬ *nu*	ね *ne*	の *no*	
						
は行 *ha gyō: h-* *dan + dots 3&6*	は *ha*	ひ *hi*	ふ *fu*	へ *he*	ほ *ho*	
						
ま行 *ma gyō: m-* *dan + dots 3,5&6*	ま *ma*	み *mi*	む *mu*	め *me*	も *mo*	ん *n*
						
や行 *ya gyō: y-* *dan lowered* *+ dot 4*	や *ya*		ゆ *yu*		よ *yo*	*-y-*
						

ら行 *ra gyō: r-dan + dot 5*	ら *ra*	り *ri*	る *ru*	れ *re*	ろ *ro*	
わ行 *wa gyō: w-dan lowered*	わ *wa*	ゐ *wi*		ゑ *we*	を *wo*	*-w-*

Japana brajla alfabeto (retaliro:: https://en.wikipedia.org/wiki/Japanese_Braille)

Kredeble, Vasilij Eroŝenko en Instituto por Edukado de Blinduloj en Tokio lernis uzi la japanan brajlan skribsistemon de alfabeto, kiu estis kreita jam en 1890 kaj vaste uzata en lernejoj por blinduloj. Oni povas supozi, ke Vasilij Eroŝenko ekde 1920 sendadis siajn verkojn, skribitajn brajle, al la Esperanto-revuo por blinduloj „Aŭroro“, kiu estis eldonata en la iama Ĉeĥoslovakio. La brajla revuo „Mutsuboshi-no hikari“ („La lumo de ses steloj“) estis eldonata ĉe la Tokia Lernejo por Blinduloj (*Патлань*, 2020). Vasilij Eroŝenko povis proponi siajn verkojn al tiu revuo en japana brajlo.

Tamen ankoraŭ restas malklare, kiel la verkoj de la blinda verkisto atingadis la redakciojn de revuoj, eldonataj en videbla skribo. Estas menciita nur unufoje, ke Vasilij diktis sian verkon al Kamichika kaj ŝi skribis ĝin en la japana kaj sendis al la redakcio de la revuo. Eblas, ke al Vasilij Eroŝenko laborhelpis lia japana amiko Akita-Ujaka, kies patro estis blinda. Eble Akita-Ujaka sciis la japanan brajlon kaj transkribinte la tekstojn de Vasilij per videblaj hieroglifoj, sendis ilin al la redaktoroj. Tamen eblas supozi, ke plej ofte la verkisto diktis siajn verkojn al la japanaj amikoj kaj tiuj notis. Aliaj amikoj tradukadis liajn verkojn el Esperanto al la japana.

En la literaturo pri Vasilij Eroŝenko nenie eblis trovi eĉ aludon per kia maniero li korespondis. Li povis skribi brajle al siaj blindaj kolegoj. Oni povas supozi, ke al siaj vidantaj amikoj li diktis la leterojn kiujn registris la persono, kiu sciis la necesan lingvon. Same la ricevitajn leterojn por li legis la vidantoj. Iom pli da informoj ĝisvivis pri la vojaĝoj de la verkisto.

Nur pli malpli precize eblas retrovi la vojaĝvojojn de Vasilij Eroŝenko, loĝlokojn kaj la specojn de liaj agadoj, ĉar parton de eventoj malsamaj aŭtoroj fiksas kun malsamaj datoj.

La 12-an de januaro, 1890 en la vilaĝo Obuĥovka, distrikto Starooskolsky, provinco Kursk naskiĝis Vasilij Jakovleviĉ Eroŝenko.

1894 en vintro, li blindiĝis pro morbilo en la aĝo de kvar jaroj.



Geografia mapo de la vojaĝoj de V. Eroŝenko (foto el la libro en Esperanto „V. Eroŝenko. La tundro ĝemas“. Tokio, 1980)

1899–1907 li studis en Moskva Lernejo por Blinduloj.

1907–1914 li ludis en la orkestro de blinduloj en Moskvo. Ana Ŝarapova instruis al li Esperanton.

1911, somere, kun la orkestro li vojaĝis en Kaŭkazio.

1912, februaro – septembro – vojaĝo al Anglio. Li studis ĉe la Reĝa Instituto por Blinduloj.

1913 li studis la japanan, prepariĝis por la vojaĝo al Japanio.

1914, en aprilo li foriris al Japanio.

Septembro de la 1914 – junio de la 1916 – li studis ĉe la Tokia Lernejo por Blinduloj.

1915, li konatiĝis kun japana dramisto Akita-Ujaka. Li prelegis en la kunvenoj de esperantistoj.

1915, somere li forveturis al la insulo Hokajdo.

1916, kun la helpo de Akita-Ujaka publikigis siajn verkojn en la japana.

29-an de aprilo, 1916 li partoprenis en la 3-a Kongreso de Japanaj Esperantistoj.

1916, majo – disputo kun Rabindranath Tagore kiu famigis Vasilij Eroŝenko en Tokio. Tiun disputon priskribis Takasugi Ichiro en sia libro „La blinda poeto de Japanio“.

La 3-an de julio en 1916 li foriris al Sudorienta Azio.

Julio, 1916 – januaro, 1917 – li provis fondi blindullernejon en Bangkoko (Tajlando). Post la fiasko de provo malfermi lernejon, vojaĝis tra la lando.

Januaro–novembro, 1917 – li laboris kiel direktoro de la Moulmein-lernejo por blinduloj en Birmo.

Novembro, 1917 – marto, 1918 – vivo en Kalkato.

Septembro, 1918 – junio, 1919 – vivo en Hindio. Aresto kaj deportado. Eskapo el la ŝipo en Ŝanhajo.

La 3an de julio, 1919 li revenis al Japanio.

1920, japanaj artistoj Nakamura Tsune kaj Tsuruta Gorō pentris la portretojn de

Vasilij Eroŝenko.

La 1-an de majo en 1921 li partoprenis en la manifestacio de la 1-a de majo. La unua aresto de Vasilij Eroŝenko.

La 9-an de majo en 1921 li partoprenis en la 2-a Kongreso de Japana Socialista Ligo. La dua aresto de Vasilij Eroŝenko.

La 28-an de majo, 1921 – la tria aresto kaj deportado de Vasilij Eroŝenko el Japanio al Vladivostoko, Rusio.

La 6-an de junio, 1921 li alvenis al Vladivostok.

1921, en junio, li vojaĝis tra Primorije (Rusio).

1921, dum julio – oktobro li vivis en Harbin (Ĉinio).

1922, inter la 7-a de oktobro, 1921 – la 17-a de februaro li laboris ĉe la Instituto de Mondlingvoj en Ŝanhajo (Ĉinio).

La 24-an de februaro de 1922 Vasilij Eroŝenko alvenis en Pekino kaj ekloĝis en la domo de Lusin.

Februaro, 1922 – aprilo, 1923 – li estis instruisto en Pekina Universitato kaj Virina pedagogia kolegio.

1922 en julio, li foriras al Finnlando, kie kiel reprezentanto de Ĉinio, partoprenas en la 14-an Internacian Kongreson de Esperanto en Helsinko.

1922, post la kongreso li denove renkontiĝis kun Vada Kiitiro kaj akompanita de li vizitis sian naskiĝlokon Obuĥovka.

La 4-an de novembro en 1922 – li revenis al Pekino. Denove li instruis rusan literaturon en Pekina Universitato kaj en la Virina kolegio de tiu ĉi universitato.

1923, dum studentaj ferioj li vojaĝas tra Ĉinio.

La 16-an de aprilo en 1923 li revenis el Ĉinio al Rusio

Julio, 1923 – aŭgusto, 1923 – li partoprenis en la 15-a Internacia Kongreso de Esperantistoj en Nürnberg.

Aŭgusto, 1923 – aŭgusto, 1924 – vojaĝoj tra Eŭropo. Vasilij Eroŝenko loĝis en Parizo, Göttingen, Leipzig.

En julio – aŭgusto de 1924, li-partoprenis en la 16-a Internacia Kongreso de Esperantistoj kaj la kongreson de blindaj esperantistoj en Vieno. Partoprenis en establo de la Asocio de Blindaj Esperantistoj.

1924, dum septembro – decembro li estis en Obuĥovka (Rusio).

Inter la 20-a de decembro, 1924 – junio, 1927 – laboro de tradukisto en la Orienta Laborista Komunista Universitato, en Moskvo.

En 1927 li tradukadis al Akita-Ujaka en Moskvo.

De 15-a de septembro, 1927 ĝis 1932 li laboris en estraro de la Centro de Tutrusia Blinda Societo en Moskvo.

1929 – „Vojaĝo al Ĉukotka“, Siberio. Tiu fakto ne estas konfirmita nek per fotoj, nek per aliaj dokumentoj.

Inter 1929–1931 li laboris kiel instruisto en Novgoroda Faklernejo por blinduloj.

1932 – li partoprenis en la 24-a Internacia Kongreso de Esperanto en Parizo. Dum hazarda renkontiĝo, li ludis ŝakon kun la tiama mondĉampiono de ŝako Aleksandr Aleĥin.

Dum la 10-a de septembro, 1932–1934 li laboris kiel korektisto en la ŝtata brajla presejo en Moskvo.

En 1933 li redaktis la revuon de blindaj verkistoj: „Almanako".

En 1933 li piediris parton de la Kartvela Milita Vojo kun sia fratino Maria kaj ŝia edzo.

En 1934, aŭtune – vivo en Aŝgabato. (Turkmenio)

Dum la 1-a de aprilo, 1935 – 19-a de julio, 1942 – Vasilij Eroŝenko estis la direktoro de la unua blindullernejo en Turkmenio.

De julio 1942 ĝis 1-a de junio, 1945 – li estis la instruisto de lernejo en Turkmenio.

1945–1946, li laboris en Zagorsk kiel instruisto de brajlo, rusa lingvo kaj literaturo en la muziklernejo por plenkreskuloj, blindigitaj dum la milito.

Dum la 1-a de oktobro, 1946 – la 16-a de aprilo, 1948 li laboris ĉe la Moskva Lernejo por Blinduloj kiel instruisto de angla lingvo.

En 1948, li vojaĝis al Meza Azio, kie okazis la Uzbeka Kongreso de Blinduloj. Reveninte, survoje, li vizitis Aŝgabato kaj Krasnovodsk, vojaĝis tra la Kaspia Maro kaj la rivero Volga.

De la 12-a de decembro,1949 ĝis la 7-a de julio, 1951 li laboris kiel instruisto ĉe la „Lernejo por Likvido de analfabeteco por blinduloj" en Taŝkento. (Uzbekio). Aliaj aŭtoroj asertas, ke li forvojaĝis al Taŝkento en aŭgusto 1950, fondis la vesperan lernejon por blinduloj, kie instruis fremdajn lingvojn.

1951–1952 – estis la lastaj vojaĝoj al Jakutio, Donbaso, Karelio.

En aŭgusto, 1952 li alvenis al Obuĥovka. Li organizis siajn arkivojn, verkis la lastan verkon.

La 23-an de decembro, 1952, Vasilij Eroŝenko mortis.

La listo estas kunmetita surbaze de la libro „La viro, kiu vidis la mondon" (*Харьковский*, 1978), kolekto da artikoloj „Vivis, vojaĝis, skribis", dediĉita al la 125-a datreveno de Vasilij Eroŝenko (2015), kompletigita per datumoj de Julia Patlan kaj aliaj aŭtoroj. La datumoj prezentitaj de malsamaj aŭtoroj diferencas. Oni volus kredi, ke la esploristoj de la biografio de Vasilij Eroŝenko en estonteco precizigos prezentitajn ĉi-tie la faktojn kaj datojn el la vivo de la verkisto.

Oni povas supozi, ke la geografio de la vojaĝoj de Vasilij Eroŝenko povis havi la negativajn konsekvencojn por la verkisto – li povis trafi en la liston de nefidindaj homoj de la tiama registaro, tial, li ne povis esperi havi bonan laboron. Nun eblas kompreni, ke, laŭ la samtempuloj, la lasta periodo de la vivo de Vasilij Eroŝenko en la eksa Sovetunio kaŭzis al li multajn grandajn kaj malgrandajn problemojn. (*Шамина*, 1962).

Mi neniam ĉesas admiri la du geniulojn – Louis Braille, la kreinton de la re-

liefa sespunkta alfabeto por blinduloj, kaj Ludoviko Lazer Zamenhof, la kreinton de la lingvo Esperanto. Reliefa brajlo, kvankam ne tuj, sed estis akceptita en la tuta mondo. Estas bedaŭrinde, ke la monda socio ne aprezis ĝuste Esperanton. Restas nur revi, kio okazus, se en lernejoj tra la mondo infanoj lernus Esperanton. Lingvaj baroj, kiuj malhelpas komunikadon, malaperus. Mi admiras la unuecon kaj altruismon de la tiutempaj esperantistoj.

Oni povas supozi, ke la semon de altruismo semis mem la kreinto de Esperanto Ludoviko Zamenhof, kiu praktikis medicinon en Veisiejai, en Litovio kaj en Varsovio, en Pollando Kvankam lia familio ne estis riĉa, li kuracis multajn malriĉulojn senpage kaj subtenis la mizerulojn. En la libro de Anatolo Koch „Miaj memoroj pri d-ro Zamenhof“ oni diras: „Doktoro Zamenhof estis la sola kuracisto en Varsovio, kiu kuracis malriĉulojn unu tagon en semajno senpage.“ (citita laŭ *Ping Xiao*, retaliro: http://www.elerno.cn/movado/movado174.htm). Supozeble, la atruismon de Zamenhof transprenis liaj adeptoj – esperantistoj.

Ekzakte same ne unu esperantisto helpadis al Vasilij Eroŝenko: disponigis loĝlokon, manĝon kaj alian subtenon. Vasilij Eroŝenko estis akceptita por vivi:

en Londono, en 1912 de angla instruisto William Fillimore,

en Londono, en 1912 de blinda esperantisto William Merrick,

en Tokio, en 1914 de esperantisto, profesoro Nakamura Kiyo,

en Tokio, en 1915; 1919; 1920 de Sōma Kokko, posedantino de la butiko kaj restoracio „Nakamura-ya“,

en Bangkok, en 1916 de la tajlandano Bunji,

En Kalkato, en 1917, de blinda baptista pastro Lal Bihari Shah,

en Osako, en 1919, de blinda japana studento Ivachasi Takeo,

En Vladivostoko, en 192, esperantisto Vanago,

Charbin, en 1921 – japano Nakane Hiroshi,

en Ŝanhajo, en 1921, esperantisto Hujucz,

en Pekino, en 1922, ĉina verkisto Lusin,

en Leipzig, en 1923, germana esperantistino Marta Bunge.

Kaj kiom da bonfarantoj restas nenomitaj?

Mi ĝojas ankaŭ pri la nuntempaj esperantistoj – honorcivitano de la urbo Šiauliai, esperantisto Zenonas Sabalys, kiu peris la tradukon de tiu ĉi libro al Esperanto kaj esperantistino Gražina Opulskienė, kiu bonvole helpis tiun-ĉi libron ekhavi en Esperanto, Ed Robertson, skota esperantisto, kiu redaktis la Esperantan version, prezidanto de la Litova Esperanto Asocio Povilas Jegorovas, kiu helpis la libron eldoni.

***

Kolektante la materialon por ĉi tiu libro, mi eksciis, ke unu el multaj studentoj de

Vasilij Eroŝenko estis kandidato de pedagogiaj sciencoj, multmerita kulturlaboristo, membro de la Moskva Unuiĝo de Ĵurnalistoj, veterano de ĵurnalismo, honora estrarano de la Tut-Rusia Societo de Blinduloj, blindulo Jevgenij Dmitrijeviĉ Ageev (1930–2018). J. Agejev de 1967 ĝis 2009 estris la revuon „Наша жизнь“ („Nia vivo“), kiu antaŭe estis eldonita sub la nomo „Жизнь слепых“ („Vivo de blinduloj“). Dum miaj studoj en ĉeesta postdiploma kurso en la tiama Ŝtata Pedagogia Instituto en Leningrad je la nomo de A. Gerzen, kun tiu homo min konatigis unu el miaj tiamaj instruistoj, estro de la Fako de Blindulpedagogio, doktoro pri psikologio, profesoro Aleksiej Grigorjeviĉ Litvak (1937–1999). Jevgenij Agejev lasis la impreson de intelektulo, inteligenta, tolerema kaj bonkora homo. Li tre interesiĝis pri mia unua disertacio pri la lernmotivoj de blindaj plenkreskuloj, kaj proponis, ke mi publikiĝu artikolojn en la revuo, kiun li estris. Kompreneble, mi ne rifuzis ĉi tiun proponon. Li ne permesis lin nomi per lia patronomo, dirante ke li scias, ke en Litovio oni ne uzas patronomojn, kaj litovoj malfacile memoras ilin. Tuj kiam mi trovis la mesaĝon, ke Jevgenij Agejev estis studento de Vasilij Eroŝenko, mi rapidis serĉi tiun homon. Bedaŭrinde, en interneto mi trovis nur lian foton kun nigra rubandeto kaj mallongan mesaĝon, ke Jevgenij Agejev mortis en 2018. La ĉagreno estis senlima. Mi perdis la rememorojn de Vasilij Eroŝenko el la buŝo de lia studento. Eble ĉi tiu libro lumus per aliaj koloroj...

Akita-Ujaka, priskribante la vidpunktojn de Vasilij Eroŝenko, nomis lin absoluta humanisto, romantikulo kaj individuisto. Kaj vere, la fruaj verkoj de verkisto reflektis „eternajn temojn“: amo kaj morto („La princino de la maro kaj la fiŝkaptisto“), la strebo al perfekteco („Kibosi diaĵo“, „Ŝipo de feliĉo“), la unueco de homoj („Por la homaro“, „Printempa nokta sonĝo”). Kelkfoje en liaj verkoj oni sentas filozofiajn, budhismajn kaj bahaajn motivoj („Pluvas“). Homoj en la fruaj rakontoj de Eroŝenko ne estas kribritaj al malriĉaj kaj riĉaj, sed al bonaj kaj malbonaj, kaj ili ĉiuj, laŭ la aŭtoro, vivante en harmonio kun la naturo kaj inter si, povas fine atingi perfektecon kaj feliĉon. Tiusence simbola aspektas la finalo de la fabelo „Printempa nokta sonĝo: „sur la vojo de la vivo man en mano iras la aristokrata knabino kaj la kamparana knabo. Kaj la heroo de „Stranga kato“ asertas, ke ĉiuj sur la tero, inkludante mastrojn kaj servistojn, estas fratoj. „Mi vivas por tio ke konstruus por ĉiu la oran ŝipon“, – diris la heroo de „Ŝipo de feliĉo“. „Por la homaro“ – tiel nomiĝas kaj la fabelo kaj la kolekto de verkoj de Eroŝenko. Koro de ilia aŭtoro brilis kiel fajro por ĉiuj homoj. La certa abstrakteco de la bildoj estas kutime karakteriza por la romantikaj verkoj de multaj verkistoj. Eguchi Kan prave rimarkis, ke la mondo en kiu vivis la verkisto kaj liaj herooj ne estis tute reala. Tio estas lando de bela estonteco, utopia libera lando – poezia, preskaŭ fabela mondo. Tamen, la tempo kuris kaj la fabelmondo de Eroŝenko pli kaj pli komencis reflekti la realan mondon, li vidis la diferencojn inter malriĉaj kaj riĉaj homoj, komprenis la lukton de la prematoj por siaj rajtoj. La kamparanoj el „Turo por fali“, malestimas la aristokratojn,

La unua kaj la nuna tomboŝtonoj de Vasilij Eroŝenko en la vilaĝo de Obuĥovka (retaliro: http://neinvalid.ru/vasilij-eroshenko-slepoj-puteshestvennik/)

kiuj konstruas pompajn palacojn, penante superi unu la alian (*Харьковский*, 1978).

Kial en iama Sovetunio la verkaro de Vasilij Eroŝenko longe ne estis aprezata. La respondon al tiu ĉi demando ni trovas en la analiza artikolo de S. Anikeev kaj A. Tokomada pri Vasilij Eroŝenko. La aŭtoroj konstatas, ke en la kunteksto de la kultura vivo en Sovetunio de tiu periodo, tia sindeteno aŭ singardemo anoncante la nomojn de novaj aŭtoroj ne estas surprizaj, la situacion plibonigis la periodo de „politika varmiĝo“, sed ankaŭ tiam konatiĝi kun verkisto, kiu revenis aŭ estis repatriita, kiu dum dek jaroj vivis en eksterlando kaj verkis nenion en la rusa, estis riske. Krome, la ideoj de la verkisto neniel kongruis kun la taskoj de konstruado de socialismo kaj sovetia patriotismo en la 1960-aj kaj 1970-aj jaroj. La esploristojn de Orienta kulturo limigis la speciale striktaj ideologiaj gvidlinioj, kaj ĉi tiu manko de libereco limigis la elekton de temoj por esploroj. Do, tiutempe estus malprudente kaj eĉ danĝere por esploristoj preni la temon „Eroŝenko“, ĉar sur la reveninta en patrujon Vaslij Eroŝenko jam falis la ombro de la malfido: internaciisto, pacifisto, anarkiisto, kosmopolito, esperantisto – ĉio sur la fono

de oficiala scienco estis nedezirata esplorobjekto (*Аникеев, Токомада,* 2017).

La familio de Vasilij Eroŝenko en la 20-aj kaj 30-aj jaroj de la 20-a jarcento multe suferis dum la socipolitika reorganizo de la lando: en la jaro 1920 domo kun butiko estis intence bruligita, la patro dum incendio estis serioze brulvundita kaj preskaŭ pereis en la fajro. Fine de la dudeka jardeko de la 20-a jarcento, pro tio ke la familio ne volis aliĝi al kolĥozo, iliaj parceloj kaj posedaĵoj estis konfiskitaj. Dum iom da tempo, la familio vivis ĉe parencoj. Poste la gepatroj loĝis ĉe sia plej aĝa filo Alexander, en Voskresensk proksime de Moskvo kaj en la vilaĝo Dzhairakh en Ĉeĉenio, poste revenis al Obuĥovka. La sorto de la fratoj de Vasilij Eroŝenko ankoraŭ restas malklara. Laŭ lia nepo, Alexandro Eroŝenko estis arestita en 1941 kaj mortis en iu koncentrejo. Kaj laŭ la pli vaste disvastigita versio, li malaperis aŭ mortis ie en Turkmenio, kiam konfiskadis la ĉevalojn ĉe la homoj por la fronto. Preskaŭ nenio estas konata ankaŭ pri la plej juna frato Ivan, kiu estis malliberigita dum pluraj jaroj pro spekulado kaj, laŭ la fratinoj kaj vilaĝanoj, li restis por loĝi ie en la nordo (*Патлань*, 2020). Vasilij Eroŝenko naive kredis, ke la devizo de la Granda Franca Revolucio, „Libereco, egaleco, frateco", kiun citis ankaŭ la rusaj revoluciuloj, estos efektivigita en Rusio post la revolucio. Li invitis homojn al sia inventita Lando de Ĉielarko. La tragedio de la verkisto estis, ke li mem ne konis la vojon al tiu lando. Ĉu la verkisto Vasilij Eroŝenko, kiu estis konstante persekutata kaj ne meritis fidon ĉe la fino de sia vivo konsciis ke la Ĉielarka Lando, kie por ĉiuj homoj estas bone, estas nur iluzio? Vasilij Eroŝenko vere estis nek anarkiisto, nek marksisto. Li naive kredis, ke eblas realiĝi la ideon de justeco, unueco kaj egaleco. Ĉiuj tiuj ideoj reflektiĝis en liaj verkoj. La tekstoj de Vasilij Eroŝenko estas unikaj pro multaj aspektoj kaj povas ekinteresigi la japanajn lingvistojn, esploristojn de la poetiko en rusa simbolismo, kaj psikologio de blinduloj (*Патлань*, 2014c).

Post kiam la familio de Vasilij suferis pro la nova registaro, restas malklare ĉu, alfrontante la senkompatan realon de la vivo li ankaŭ ĉe la fino de sia vivo, restis fidela al en juneco vartitaj ideoj pri libereco, egaleco kaj frateco de la homoj en la tuta mondo. Eble li skribis pri tio en sia lasta verko, kiu bedaŭrinde estis bruligita,

Iom antaŭ lia morto, Albert Poliakovskij, la aŭtoro de la novelo pri V. Eroŝenko „Blinda pilgrimo", translokiĝis el Turkmenio al Pereslavl-Zalesskij. Baldaŭ la semajna gazeto „Alfavit" („Alfabeto") publikigis liajn memoraĵojn pri pilgrimado al la nuna Belgoroda regiono, kune kun la okdekjara profesoro Takasugi Ichiro de la Universitato de Tokio. Tiu respekton meritanta aŭtoro de kelkaj biografioj pri Vasilij Eroŝenko staris ĉe lia tombo dum longa tempo pensante, kaj poste silente citis Lusin: „Mi komprenis la tragedion de homo, kiu revis, ke homoj amu unu la alian" (citita de *Бухтияров*, 2012).

Por la fino estas deziro refoje atentigi, ke la veran rekonon Vasilij Eroŝenko ricevis en 1920, kiam pro siaj esprimplenaj vortoj en la Lando de la Leviĝanta Suno li estis

Monumento de skulptisto V. Kolesnikov al Vasilij Eroŝenko en Obuĥovka. Sur la piedestalo de la busto, post la nomo, familia nomo, patronomo, datoj de naskiĝo kaj morto estas la surskribo: „Vivis, vojaĝis, verkis“ (retaliro: https://verdalampo.info/stati/sxtrihi.html)

nomita poeto, maturiĝinta inter japanaj literaturistoj. Jam en Japanio oni rimarkis, ke la verkoj de Vasilij Eroŝenko distingiĝas per la originaleco de la arta koncepto, lingvo kaj komponado (*Аникеев, Такеда,* 2017). Lia nomo apud la plej famaj verkistoj kaj kulturagantoj estas inkluzivita al la nuntempa enciklopedio de japana literaturo kaj en enciklopedio de Esperanto. Tiuj-ĉi faktoj – estas la plej alta pritakso de la laboro de Vasilij Eroŝenko, kaj lia tuta vivo atestas la grandegan potencialon de blindaj homoj.

La fundamenta ideo de la bahaa kredo, rekonita de la simbolisma verkisto, pacisto Vasilij Eroŝenko, ke homaro estas unu familio, kreita de li mem kaj transdonita en la formo de fabeloj, la modelo de la ideala mondo kaj komunikado inter homoj, dolore kontrastas kun la realaĵoj de la hodiaŭa vivo. Aperas dubo ĉu ni vere estas inteligentaj homoj. Homo sapiens montriĝis ne matura kiam rifuzis la internacian lingvon Esperanto, direktis siajn sciencajn malkovrojn al produktado de detruaj armiloj, ne lernis solvi konfliktojn pace, ne lernis agnoski la valoron kaj protekti sian planedon Teron. Oni devas konsenti kun la opinio de fantastoj-verkistoj, ke nia planedo bezonas alian mastron kiu povas krei kaj protekti la harmonion en la Tero. Hodiaŭ, por la humanisto Vasilij Eroŝenko akcepti ĉi tiujn realaĵojn de la vivo estus multe pli dolorige ol estas por ni.

Literaturo

A World Language: why not Esperanto?, by Margaret L. Blaise. London: The link, 1916. Retaliro: https://www.bl.uk/collection-items/world-language-why-not-esperanto (konsultita 2023-03-21).

Agnes Alexander (1875 – 1971) – usona verkistino, elstara iniciatintino de la bahaa kredo. Retaliro:https://prabook.com/web/agnes.alexander/3775994#gallery (konsultita 2022-05-01)

Andrew F. Jones (2011). Developmental Fairy Tales: Evolutionary Thinking and Modern Chinese Culture. Harvard: Harvard University Press, 2011 – p. 272.

Aoyama Tooru. (2015). Rakontoj de velkinta folio. Kolekto de Artikoloj „Vivis, Vojagis, Verkis". Tokio, Japanio, p. 36 – 38.

Bernhard Struc (2021). 'I kindled a fire in my heart' A blind Esperanto wanderer, Japanese anarchists, and a Moravian Eskimo chief Retaliro: https://www.transnationalhistory.net/esperanto/en/2021/12/10/Vasilij-eroschenko/ (konsultita 2023-07-11)

Braille Louis (1809–1852) – franca pedagogo, orgenisto, kreinto de la reliefa punktoalfabeto por blinduloj. Retaliro:. biography https://louisbraillebio.weebly.com/biography.html (konsultita 2022-04-12)

Chengtai, Shi (2017). La akrvida blindula poeto. Retaliro: http://esperanto.cri.cn/2521/2017/04/18/173s192667.htm (konsultita 2023-06-23)

Enciklopedio de Esperanto. Red. Ivan G. Širjaev, Lajos Kökény, Vilmos Bleier. Literatura Mondo, 1933. (Ŝanĝita al cifereca formo 2006 m.)

Erošenko, V. (1977). En Izbranna.1977. Kunmetita de R. Belousov. Moskva eldonejo Nauka, p. 262 Ilustrita, 21 cm. En Esperanto.

Erošenko, V. (1984). El vivo de la čukčoj. Originale verkita en esperanto. Kompilis A. Masenko, A. Pankov. [Brajle] 1984. – 1 libro. – Vilnius: Lietuvos Aklųjų draugijos leidykla.

Erošenko, V. (2021). Erošenko no Shiberia monogatori.2021. Eldonejo: Takasugi Ichiro. Osako: japana Esperanta kooperativo. P. 113.

Erošenko, V. (1992). El vivo de la ĉukĉoj: originale verkita en Esperanto. Kompilis: A. Masenko, A. Pankov. 1992. Moskvo, Rutenio. P. 47.

Erošenko, V. (1980). La tundra ĝemo: el vivo de la ĉukĉoj. 1980. Eldonejo: Mine Yoshitaka. Toyonaka-si: japana Esperanta kooperativo. P. 82.

Erošenko, V. (1979). Lumo kaj ombro, 1979. Eldonejo: Mine Yoshitaka.TOYONAKA-si: Japana Esperanta kooperativo. P. 94.

Erošenko, V. (1995). La unua eksterlanda vojaĝo, 1995. Origino: Toyonaka.

Erošenko, V. (1923). La ĝemo de unu soleca animo: poemoj kaj skizoj pri ĉina vivo. kreita en la originalo. 1923. Eldonejo: REN SONKIO. Ŝanhajo: Orienta Esperanto-Propagando instituto. P. 90.

Erošenko, V. (1981). Malvasta kaĝo. 1981. Eldonejoj: Mine Yoshitaka. Miyamoto Masao (1913–1989). Toyonaka-si: Japana Esperanta Kooperativo. P. 86.

Erošenko, V. (2015). Ruĝa bileto. 2015. Eldonisto Vadym Karpenko, Kyiv, P. 54. 21 cm. En ukraina – Esperanto.

Erošenko, V. (1995). La kruĉo da saĝeco: verkoj. 1995. Kompilis Mine Yoshitaka, eldonita de Japana Esperanta kooperativo.

Erošenko, V. (1983). Stranga kato. 1983. Kompilis Mine Yoshitaka, eldonis: Japana Esperanta Eldonkooperativo. P. 82.

Erošenko, V. (1930). Turo por fali. Ca 1930. 29 paĝoj. Ŝanhajo: La verda librejo.

Erošenko, V. (1962). Serdce orla. 1962. Preparis: R. S. Belousov. Belgorod, Knižnoje Izdatelstvo. P. 212.

Esperanto Brailio raštas. Retaliro:https://eo.wikipedia.org/wiki/Esperanta_brajlo (konsultita 2022-09 28)

Busto de kreinto de Esperanto Liudviko Lazaro Zamenhof en parko de palaco de Veisiejai (Litovio) Retaliro: https://www.lazdijai-turizmas.lt/lankytinos-vietos/esperanto-kalbos-kurejo-liudviko-lazario-zamenhofo-biustas/ (konsultita 2022-09-16)

Esperanto-Numismatika Asocio Retaliro: http://ena.frali.bplaced.net/ (konsultita 2022-12-28)

Goze no Yurei – The Yurei of the Blind Female Musician. Retaliro: https://hyakumonogatari.com/2013/10/15/goze-no-yurei-the-yurei-of-the-blind-female-musician/ (konsultita 2023-03-22).

Gudonis, V. (1990a). Aklasis, nustebinęs pasaulį. [Apie neregį esperantininką, rašytoją – simbolistą, keliautoją, tiflopedagogą Vasilijų Jerošenką, 1890–1952]. *Šiaulių naujienos*, laikraštis, lapkričio 11, p. 9.

Gudonis, V. (1989). Aklieji fenomenai. [Apie neregį esperantininką, rašytoją – simbolistą, keliautoją, tiflopedagogą Vasilijų Jerošenką, 1890–1952]. *Šiaulių naujienos*, laikraštis, liepos 4, p. 3.

Gudonis, V. (2023c). Anglijoje: „Sužinojau, kad chuliganas – anglų kalbos žodis (3). [Apie neregį esperantininką, rašytoją – simbolistą, keliautoją, tiflopedagogą Vasilijų Jerošenką, 1890–1952]. *Atolankos*. *Šiaulių krašto* laikraščio kultūros, meno, literatūros leidinys – priedas. 2023 m. vasario 18 d. p. 7, 8.

Gudonis, V. (2023f). Baltos dėmėsVasilijaus Jerošenkos biografijoje (6). [Apie neregį esperantininką, rašytoją – simbolistą, keliautoją, tiflopedagogą Vasilijų Jerošenką, 1890–1952]. *Atolankos*. *Šiaulių krašto* laikraščio kultūros, meno, literatūros leidinys – priedas. 2023 m. kovo 28. p. 7, 8.

